

Sten Johansson

# Kiam la vento turniĝos

Novelaro



Kovrila teksaĵo de Signild Johansson

Bit-libra eldono de la aŭtoro, 2015

*Oni ofte rekomendas verki nur pri aferoj intime konataj kaj reale spertitaj. Tiel oni evitus la riskon fari stultajn erarojn.*

*Jen rekomendo tre saĝa, sendube. Sed ankaŭ tre teda. Kial mi verku pri tio, kion mi jam konegas? La literaturo por mi estas ilo por vastigi la realon, por trovi ion trans la enua vivo ĉiutaga. En la realo ja prudentas eviti riskojn, por vivi longe kaj sane. Sed en la literaturo riskoj ne evitindas. Male, tie indas esplori kaj provi ĉion.*

*En ĉi tiu novelkolekto mi verkis pri lokoj kaj tempoj, kiujn mi mem tute ne konas, aŭ eble vizitis nur okaze. Per tio mi ja riskis diri stultaĵojn. Mi tamen fidas, ke tiuj stultaĵoj forbloviĝos, kiam la vento turniĝos.*

*La aŭtoro*

#### **Enhavo:**

|                                    |     |
|------------------------------------|-----|
| Tomatoj el Nederlando .....        | 3   |
| Geedziĝo .....                     | 9   |
| Ĉe Narva Strato .....              | 14  |
| Pordo al la maro .....             | 24  |
| Marika.....                        | 28  |
| Diana en lunlumo .....             | 43  |
| Verda ondado.....                  | 48  |
| Secuko .....                       | 57  |
| Tri legendoj .....                 | 60  |
| Vasta domo .....                   | 66  |
| Nova amiko de sinjoro Brunner..... | 74  |
| Kiam la vento turniĝos.....        | 82  |
| Vojaĝo kun Hans Glas .....         | 96  |
| Calle Zacamil .....                | 105 |

# Tomatoj el Nederlando

2006

Isolde sidas sur malnova rusta rako por tapiŝpurigado surkorte malantaŭ la butikoj de Panjo. Estas aŭtuno, kaj malvarma vento kirlas sekajn foliojn kaj balaaĵon inter la domaj muroj. Ŝi frostas. Panjo volas, ke ŝi staru ĉe la antaŭa flanko, surtrotuare ekster la butikpordo kun la slipo Tuj Revenos. Se aperos kliento, ŝi diru ke Patrino devas viziti la poŝtoŝefojn, sed ke la butikoj de donacaĵoj denove malfermiĝos post deko da minutoj. Isolde tamen ne emas stari surtrotuare por mensogi. Kiam Panjo havas ulon en la butikoj, ŝi ĉiam poste ellasas lin per la malantaŭa pordo, tra la postkorto. Tiam li preteriras Isolden, kaj se li rekonas ŝin, povas okazi ke ŝi ricevas monon de li. Roger, kiu nun estas kun Panjo, eble anstataŭe venigos ŝin al kafejo por aĉeti glason da biero al si mem kaj laktokafon kun korneto al ŝi.

La anguloj de la korto komencas mallumiĝi. Odoras je rubaĵo kaj io mucida aŭ putra. Ĉio estas kvietaj kaj silenta. Videblas eĉ ne la nigra kato, kiu kutimas kuŝi gvate ĉe la kela ŝtuparo. Ŝi metis la lernejan dorsosakon sur la rakon kaj sidas sur ĝi por ne makuli la ĝinon per rusto. Ŝi frostotremas kaj pensas pri tio kion faras Panjo kaj Roger. Kiel ili aspektas kaj sonas? Kiam ŝi estis pli juna, ŝi ofte ektimis vekigante nokte, kiam Panjo umadis kun iu viraĉo. Sed nun apenaŭ plu iu vizitas Panjon hejme. Ŝi ja havas la ejon malantaŭ la donacobutiko. La virejon, pensas Isolde.

Ŝi eksaltas pro tio ke Roger staras tuj apud ŝi. Li odoras je cigareda fumo kaj la sapo de Panjo el la duŝejeto.

“Saluton, katineto! Kiel vi? Damne, vi aspektas tute frostigita. Kiel glacipeco! Ĉu vi kuniros preni tason da?”

“Kial ne?” ŝi respondas, sentante lian grandan manon mole ĉirkaŭpreni ŝian nukon kaj iom dikfingrumi ĝin.

“Ne forgesu la sakon!” li memorigas, kaj ŝi surmetas la dorsosakon, kvankam ŝi preferus lasi ĝin. Ŝi volus anstataŭe havi mansaketon, ĉar kun tiu dorsaĵo ŝi sentas sin troege lerneja.

Kiam ili sidas en la kafejo, aspektas kiel plena nokto eksterdome, kvankam estas nur la kvina kaj duono. Roger ŝajne konas la kelnerinon, ĉar li petolas kun ŝi. Eble ŝi pensas ke li venis kun sia filino. Isolde preferus ke li konduku kiel kiam ili estas duope. Ke li ĉirkaŭprenu ŝian nukon kaj simile. Se ŝi evitas rigardi lian dikulan ventron kaj la erinacajn vangojn, ŝi povas fantazii ke li estas ŝia kunulo.

Kiam ŝi revenas hejmen, ĉio estas kiel kutime. Neniu spuro de ia ajn vespermanĝo. Ŝi prenas paketon da fruktosuko kaj du kokosajn ŝaŭmbulkojn kaj provas ŝteliri en sian ĉambron.

“Via instruistino telefonis”, Patrino krias kiel saluton. “Helena Rathén aŭ kiel ajn ŝi nomiĝas. Kial vi ne estis en la lernejo hodiaŭ?”

“Mi ja estis”, Isolde provas. “Antaŭtagmeze, sed poste mi ekhavis kapdoloron.”

“Vi devas diri al la instruisto se vi malsaniĝas, ĉu ne?”

“Kiel do? Vi mem provu serĉi tiun virinaĉon kiam la kapo krevas al vi!”

Ŝi silente fermas post si la pordon antaŭ ol Panjo trovos respondon al tio. Damna Rato! Ĉu necesas telefoni por klaĉi post unu mizera tago? Por venĝi ŝi decidus bojkoti la matematikan hejmtaskon, kaj cetere ŝi ne kunportis tiun libron hejmen. Anstataŭe ŝi elserĉos iun antikvan numeron de knabina magazino, kiun ŝi delonge ne relegis.

Roger renkontas ŝin apud benzinejo ĉe la ŝoseo alsuden, kiel li promesis. Densa nebulo kuŝas sur ĉio laŭ la tuta vojo suden ĝis Trelleborg. Kiam la kamiono suriras kaj forlasas la pramon, ŝi devas kuŝi sub plejdo en la dormejo, ĉar ŝi ne posedas pasporton. Sed Roger diras, ke estas neniuj problemoj, kaj li devus scii tion, ĉu ne, ĉar li ĉiusemajne iradas ĉi tie. Panjo neniam

iras eksterlanden, krom al Kopenhago, kie ŝi havas iujn malnovajn kunulojn.

Isolde telefonas hejmen je la dekunua vespere el iu aŭtoŝosea manĝejo. Ŝi sukcesas diri nur ke ili survojas por transporti tomatojn el Nederlando, antaŭ ol Panjo postulas paroli kun Roger. Sed li sidas en la restoracio kun glaso da biero, babilante kun kelkaj aliaj ŝoforoj, do ŝi ŝajnigas ke jam elĉerpiĝas la unumarkaj moneroj, kiujn li donis al ŝi.

“Oni baldaŭ rompos, mi pensas. Mi telefonos denove kiam ni reiros, se mi havos okazon. Ĝis!”

Poste ŝi premas la forkon suben kaj alkroĉas la arĝentkoloran aŭskultilon.

En Nederlando ili haltas meze de la nokto sur grandega kamiona parkejo kaj ambaŭ dormas malantaŭ la sidlokoj en la ŝoforejo. Estas sufiĉe da spaco por du homoj. Isolde trovas tion ekscita kaj plenkreskula, kaj li rajtus ĉirkaŭpreni ŝin iomete pli forte. Roger endormiĝas antaŭ ŝi, kaj ŝi kuŝas dum kelka tempo kun la mano interfemure pensante pri la virejo en la butikoj de Panjo.

Kiam ŝi vekigis, la ekstero plenas de sunlumo kaj Roger estas for, nur lia ŝvito restas en la kovrilo kaj kuseno. Dum iom da tempo ŝi flaras ĝin, sed ŝi estas ege pisema kaj malsata, do ŝi surmetas la ĝinzon kaj puloveron kaj rigardas eksteren. La kamiono staras apud longa griza konstruaĵo el lado sen fenestroj. Ŝi vidas kelkajn virojn stari, paŝi kaj veturigi ĉarelojn kun amaso da kartonskatoloj sur paledoj, sed neniu Roger. Fine ŝi memoras, ke apud la ŝofora loko kuŝas kolao kaj paketo da keksoj. Ŝi sidiĝas tie kaj ŝtopas sin per kekso post kekso, sed ne kuraĝas trinki.

“Baldaŭ mi pisis surplanke, se li ne venos”, ŝi diras rekte al la antaŭglaco, sed ĝuste tiam la pordo malfermiĝas, kaj Roger ensaltas, forpuŝas ŝin kaj ekigas la motoron.

“Atendu, mi devas iri en necesejon!” ŝi krias tra la motorbruo.

“Certe, katineto. Sed ni devas moviĝi, venas aliaj kiuj bezonas lokon. Do vi stringu iomete.”

“Kie vi estadis? Mi atendis longege!”

“Kolektis nederlandajn tomatojn”, diras Roger kaj okulumas al ŝi, dum li gapas fikse en la retrospegulojn kaj stiregas maldekstren kiel frenezulo.

Fine li tamen movis la kamionon kelkan distancon kaj akompanas ŝin al apuda konstruaĵo, kie troviĝas necesejo. La planko estas naŭze kota kaj la seruro ŝajnas nefidinda, sed ŝi ne havas elekton. Lavante la manojn ŝi ekvidas egan pornobildon surmure anstataŭ spegulo. Estas nigra virino kuŝanta sur leda sofo kun la kruroj vaste dise. Interne ŝi estas tute rozkolora.

Isolde ne trovas Nederlandon tre ĉarma. Ĝi konsistas ĉefe el ŝoseoj, benzinejoj kaj nubskrapuloj. Kaj en Okcidenta Germanio estas fabrikoj kaj ŝoseoj. Post kelkaj horoj ŝi vidas montetojn kun arbaro, tio almenaŭ estas eta ŝanĝo, sed ĉiuj arboj jam perdis siajn foliojn kaj aspektas nigre kaj deprime. Ŝi preferas ne telefoni al Panjo, kiam ili haltas por manĝi. Anstataŭe ŝi aĉetas germanajn dolĉaĵojn per la moneroj de Roger. Ŝi devas fingromontri, ĉar la kioska virino ŝajne komprenas neniom da angla.

Dum la pramveturo ŝi povas dormi en la kajuto de Roger, sur propra supera lito, tamen ŝi ne endormiĝas, ĉar estas tro frua vespero. Roger glutas du bierojn kaj poste ronkas kiel porko dum horoj. Ŝi ŝatus rondiri en la pramo, sed sen bileto kaj pasporto ŝi ne kuraĝas tion. Anstataŭe ŝi malrapide eltrinkas lian trian bieron. Ĝi ne bongustas, sed kun iom da memtrudo ĝi tamen glutiĝas. Ŝi rigardas Rogeron kiu kuŝas sur la suba lito kun barbostoploj sur la duobla mentono kaj iom da salivo gutanta el la buŝangulo. Nun ŝi trovas infanaĵo fantazii ke ŝi estas kunulino de tia viraĉo. Tamen estis bone kiam li palpis ŝian nukon, kaj kiam li brakumis ŝin kuŝante en la kamiona dormejo. En la virejo, ŝi pensas.

Survoje al Gotenburgo ŝi poste dormas sola en tiu ejo, kaj ŝi vekiĝas al grize pluva mateno dum Roger liveras kelkajn tunojn da nederlandaj tomatoj al granda staplo norde de la rivero. Tamen ŝi sentas sin malfreŝa kaj tute ne findorminta.

Krome ŝi sentas ioman naŭziĝon pro veturmalsano. Estos agrable ripozi en la propra lito. Ŝi nur esperas, ke Panjo estos en la butikoj, tiel ke mankos ŝia admonado pri la lernejo kaj tiaĵoj. Panjo neniam vere koleras, sed ŝi povas plendadi dum horo post horo ĝis Isolde tute tediĝas.

Sed Panjo ne estas enbutike, kaj Isolde ne rajtos dormi. Pri la lernejo oni tamen ne parolas. Anstataŭe oni veturigas ŝin kaj Panjon al la policejo por paroli kun policistinoj. Isolde ŝajngigas ne kompreni kion ili scivolas, kvankam ili demandas ĉefe kie ŝi dormis kaj kion faris Roger kiam li ne stiris la kamionon. Ŝi rimarkas ke ili tute ne kredas ŝin, kaj ne iĝas pli bone kiam ŝi implikiĝas kaj kontraŭdiras sin mem.

“Vi certe komprenas ke via patrino maltrankvilas pri vi, Isolde. Tiu Roger ja faris krimon.”

“Li nenion faris! Ĉiuokaze ne al mi!”

“Nu, li almenaŭ forkondukis vin sen permeso de via patrino. Tio estas krimo.”

Isolde ne respondas. Ŝi sentas kvazaŭ ŝi estus nura posedaĵo kiun Roger prunteprenis senrajte. Ŝi mem ja petis ke ŝi iru kun li! Ŝi trovis tion ege ekscita. Nu, ĉiuokaze antaŭe. Kaj ioman eksciton ŝi ja efektive havis. Kiam ili dormis en la kamiono, ekzemple. Sed tion ŝi ne povas diri, ĉar ŝi jam asertis, ke ŝi neniam dormis en la aŭto. Prefere ŝi ne pli impliku sin.

Finfine tamen la policistinoj laciĝas, sed tiam oni veturigas ŝin al hospitalo kie sekvas pluaj demandoj. Flegistino, aŭ eble ŝi estas doktoro, volas scii ĉion kio okazis.

“Nenio! Okazis nenio!”

“Ni tamen volas ekzameni vin zorge por esti certaj.”

Ŝi ne volas ke kuracisto ekzamenu ŝin, precipe ne tie sube. Sed ŝajne tute ne gravas kion ŝi diras, do eblas nur fari laŭ ilia volo. Panjo tamen devas atendi ekstere, alie Isolde hontus ĝismorte. Ŝi devas demeti la ĝinzon kaj la kalsoneton kaj grimpi sur specialan seĝon, kiu aspektas kiel aparato por torturi homojn. La kuracistino kliniĝas inter ŝiaj fleksitaj genuoj kaj rigardas tie sube. Isolde fermas la okulojn kaj klopodas pensi

pri nederlandaj tomatoj kaj germanaj dolĉaĵoj. Tio ne tre prosperas al ŝi. La sola afero kiu aperas en ŝia imago estas la bildo en tiu nederlanda necesejo. Ŝi scivolos ĉu ĉiuj homoj havas saman koloron interne, kvankam la eksteroj malsamas. La doktoro palpas ŝin tie sube, kaj fine ŝajnas ke ŝi esploras ankaŭ en la postaĵo. Post tio ŝi rajtas revesti sin.

Poste la doktoro nenion plu demandas. Ŝi lavas la manojn, frapetas al ŝi la ŝultron kaj diras:

“Nu, tio ja ne estis tro terura, ĉu? Ĉio aspektas bone, ne indas maltrankvili.”

Kvazaŭ Isolde estus tiu, kiu maltrankvilis!

Ŝi ne aŭdas kion diras la kuracisto al Panjo kaj al la policisto, kiu atendis ekster la ekzamenejo. Sed ili ŝajne estas kontentaj, ĉar finfine ŝi rajtas iri hejmen.

“Mi diris ja, ke li nenion faris!” ŝi siblas, kiam ili estas duope en la apartamento. “Kial vi neniam kredas min?”

Panjo provas diri ion, sed ne eblas aŭdi kion, ĉar meze de ĉio ŝi ekploregas. Ŝajnas kvazaŭ ŝi preferus ke io estu okazinta.

Isolde sentas ĉion karusele turniĝi ĉirkaŭ ŝi. Ŝi iras en sian ĉambron kaj kuŝiĝas sub la kovrilo sen demeti la vestaĵojn. El la vestiblo aŭdiĝas singultado de Panjo. Kiam ŝi fermas la okulojn ŝi peziĝas kaj samtempe malpeziĝas, la sonoj de ploro fadas kaj anstataŭe ŝi vidas la montrofenestron kaj pordon de la donacobutiko, kie Panjo pendigas la slipon Tuj Revenos kaj iras en la ejon malantaŭ la butiko. Sed ne eblas vidi kun kiu.

*La supra novelo gajnis la 3an premion de la branĉo Prozo en la Belartaj Konkursoj de 2006.*

*Ĝi estis unue publikigita en Fonto n-ro 309, 2006.*



# Geedziĝo

2007

Mi komprenis ke la onidiroj pravos, kiam li ne tuŝis min en la nupta nokto. Dum kelkaj horoj mi kuŝis sendorma, aŭskultante lian spiradon. Jen kaj jen li ĝemetis, eble en songo, sed finfine ankaŭ mi sukcesis endormiĝi. Matene mi vekigis malfrue. Tiam mi prenis la boteleton kun kokina sango, kiun panjo antaŭe donis al mi, kaj verŝis ĝin sur la littukon tie, kie ĝi plej ĉifigis dum mi tordadis min nokte. Iom poste avino venis, ŝiris la littukon el la lito kaj pendigis ĝin de la fenestro. Mi aŭdis la najbarojn fajfi kaj aplaŭdi. Ŝajnis, ke kelkaj el ili rikanas.

“Ĉu vi plu restas?” diris Jozefo vekiginte. “Iru fari matenmanĝon. Mi esperas ke via patrino almenaŭ tion instruis al vi.”

Hejtante akvon kaj preparante ĉion, mi pensadis pri la geedziĝa festo. Ĝi plaĉis al mi. La muziko, la abundo de manĝaĵoj, la homoj kiuj dancis antaŭ ni surkorte sub la aŭgusta luno. Mia edziniĝa robo ĝisatingis la piedojn, por ne montri mian malbonan kruron dum mi sidis. La plej multaj gastoj estis ĝentilaj al mi, ankaŭ liaj familianoj. Supozeble ili estis kontentaj finfine edzigi lin malgraŭ ĉio. Kelkiuj rigardis min kolere, kvazaŭ mi kulpus pri kia li estas.

Mi ĝuis mem mastrumi. Lia pli juna fratino Hanna kelkfoje venis helpi. Precipe pri la lavado, ĉar pro la kruro estis malfacile al mi pendigi vestojn por sekigi ilin. Ŝi estis amika kaj helpema. Dum la lasta deko da jaroj mi al kutimiĝis al kompataj rigardoj de miaj samaĝulinoj. La viroj dume neniam rigardis min. Sed Hanna estis nur dektrijara kaj ne zorgis pri mia aspekto. Mi vere amis ŝin. Sed nokte mi plu estis sola.

“Kia li estas?” panjo demandis post kelkaj semajnoj. “Ĉu li traktas vin bone?”

“Nu, jes.”

“Ĉu vi bone akordiĝas pri ĉio?”

“Li ne multe parolas. Mi faras, kiel mi mem trovas bone.”

“Sed mi pensas pri la noktoj.”

“La noktoj? Nu, nenio. Ĉio en ordo, panjo.”

“Se vi rimarkos, ke li faras ion nenaturan, sendu mesaĝon al ni. Vi ne toleru ion tian!”

Mi demandis min, kion ŝi celas. Kion mi ne devas toleri? La nenatura afero estis, ke li tute ne atentis min. Li plejparte estadis kun siaj amikoj, kiel antaŭe. Kelkaj pli junaj fraŭloj. Ili vizitis kafejon, iris al la banejo kaj al kokoluktoj. La sola afero, kiun mi faris kun mia edzo, estis viziti la preĝejon ĉiudimanĉe. Kaj por atingi tion mi devis petegi.

Mi zorge pripensis kaj planis ĉion. Kiam li endormiĝis, mi kuŝis longe kun mano interfemure, pensante pri aferoj kiujn mi amas. Pri la akvo fluanta laŭ la sveltaj brakoj de Hanna, kiam ŝi pendigas la lavitaĵon. Pri la muskoloj de onklo Aron, moviĝantaj dum li laboras en la forĝejo. Pri la nudaj ŝultroj de la fremdulinoj. Pri la dancantoj en la nuptofesto. Mi klopodis ne pensi pri Simon, tamen li aperis.

Kiam mi sentis ke mia korpo pretas, mi levis la kovrilon de Jozefo. Li kuŝis surdorse, spirante trankvile. Lia brusto ondis kviete, kvankam sen la muskoloj de Aron. Mi malrapide nudigis lin.

Ĝi estis pli malgranda ol tiu de Simon. Mi prenis ĝin mane, levis ĝin kaj alblovis la pinton. Tiam ĝi komencis vekigi, kvankam li mem plu dormis. Mi tiris kelkfoje tien-reen, kaj poste mi levis mian malbonan kruron trans lin kaj sidiĝis sur lin disfemure.

“Kio do?” li murmuris malfermante la okulojn.

Mi palpis kaj fingrumis por enigi ĝin.

“Maria, kion vi faraĉas?”

Li provis sidiĝi, do mi ŝovis min antaŭen kaj repuŝis lin per la mamoj. Tiam ĝi glitis en min, kaj mi komencis mian vivon de edzino.

“Ĉesu, Maria! Vi sufokos min.”

Mi ne respondis, nur plu moviĝis. Kiom da tempo necesos? En la jaroj, kiam Simon igis min tiradi lian longan ilon supren-suben, la afero ĉiam okazis rapide, dank’ al Dio. Mi kutime imagis, ke mi melkas kaprinon.

Jozefo tamen bezonis pli da tempo. Mi anhelis, miaj haroj kovris la okulojn, ŝvito fluis inter la mamoj gutante sur lian ostecan korpon. Li ne plu protestis, nur ĝemis. Fine li ekjelpis, kaj kiam lia ilo poste elglitis, mi supozis ke la afero estas preta. Volonte mi daŭrigus, sed tio ne eblis, do mi ruliĝis flanken por ripozi.

“Ĉiuj diradis, ke vi estas freneza”, li diris, sonante kvazaŭ li maĉus la vortojn mueldente. “Sed vi estas pli ol freneza, vi estas sukubo.”

“Kial vi edziĝis al mi?”

Eble mi devintus demandi tion antaŭ la edziniĝo.

“Nu, tio certe ne estis mia ideo”, li diris.

“Ĉu pro la bieno? Pro la heredaĵo?”

“Ĉu vi pensas ke via ridinda bieneto ion signifas?”

Subite li sidiĝis enlite.

“Kien vi?” mi demandis.

“Ne zorgu. Mi ne povas resti ĉi tie kun frenezulino!”

“Vi iros nenien. Jen nia lito, jen vi dormos dum vi estas mia edzo. Se ne, mi rakontos ĉion al via patro.”

Dum kelka tempo li silentis. Poste li elsputis:

“Kvazaŭ vi havus ion por rakonti! Kvazaŭ mia patro atentus, kion babilas frenezulino!”

Tamen li restis sidanta. Post iom li rekuŝiĝis. Do ni kuŝis tie flankon ĉe flanko, edzo kaj edzino. Neniu el ni diris ion pluan. Mi sentis la liton balanciĝi, kiam li turnis sin. Mi mem estis pli laca ol delonge. Ĉi tiu estis la unua nokto, kiam mi endormiĝis antaŭ li.

Mi faris tion ne ĉiusemajne, tamen preskaŭ. Plej ofte sabate vespere, kiam li estis laca post semajno da laboro kaj iom ripozis en kafejo kun amikoj. Kelkfoje mi pensis pri tio, kion li

eble faris kun iu el tiuj amikoj, se la onidiroj vere pravis, sed mi laŭeble forpelis la pensojn. Estis kiel la afero pri mi kaj Simon. Nenio farebla kaj nenio nenecese pripensinda.

Post kelkaj fojoj li ĉesis rezisti. Mi ne scias, ĉu la afero plaĉis al li, sed ŝajne li komprenis, ke tiel estas, kiam oni havas edzinon. Mi mem pli kaj pli bezonis tion. Ofte li ne eltenis tiel longe kiel necesis al mi, sed mi havis du manojn, kiuj kutimis labori. Kaj mi estadis sola dum tiom da jaroj.

Post Kristnasko mi jam certis, ke mi gravediĝis. Mi diris nenion al Jozefo sed pluis kiel antaŭe. Nur malfrue printempe mia patrino komprenis, ke tio estas pli ol mia natura graso.

“Dankon al Dio”, ŝi diris farante krucosignon. “Dankon ke Vi kondukis ĉi du povrulojn sur la ĝustan vojon.”

Prefere min ŝi devus danki, mi pensis.

Suzana naskiĝis la dudekkvinan de aŭgusto, pli ol jaron post la geedziĝo. La akuŝistino incitiĝis, ĉar mi plurfoje demandis ŝin, ĉu la kruroj estas en ordo.

“Rigardu mem!” ŝi diris, tenante la infanon antaŭ mia vizaĝo. “Du belaj kruretoj, precize egale longaj. La sola misaĵo, kiun mi vidas, estas ke ŝi baraktas per ili furioze kvazaŭ ŝi estus knabo. Sendube vi devos bridi ŝin strikte, kiam tiu tempo venos.”

Post kiam Suzana naskiĝis, Hanna venis helpi min plentempe. Estis malfacile por mi porti infaneton, paŝante kun bastono enmane. Komence Hanna estis iomete malpacienca, sed iom post iom ŝi alkutimiĝis kaj prizorgis la knabinon same bone, kiel se ŝi estus ŝia propra.

“Hanna”, mi diris. “Vi estos tre bona patrino, kiam estos tempo.”

Ŝi mienis iom embarasite.

“Vi baldaŭ havos amason da svatiĝantoj”, mi pluis. “Ĉar vi estas ege bela. Cetere, ĉu vi ne trovas, ke Suzana iom similas vin?”

Ŝi rigardis sian nevinon kaj poste min. La unuan fojon mi vidis, ke ŝi pensas pri mia aspekto.

“Mi ne scias”, ŝi elbuŝigis.

“Jes ja”, mi diris kaj poste turnis min al la infano. “Jes ja, Suzana, certe vi similas vian ĉarman onklineton.”

Mi kisetis ilin ambaŭ. Ricevi infanon igis min kondukti tute ridinde. Kaj neniu iam ajn kisis min. Certe ne mia edzo Jozefo.

Do mi estis ege feliĉa pro Suzana, sed la parencoj – kaj la miaj, kaj tiuj de Jozefo – malkontentis, ĉar ŝi estis nur knabino. Mi memorigis al li tion, kiam ŝi aĝis du monatojn. Dum kelka tempo mi indulgis lin, sed nun mi trovis, ke estas taŭga momento por rekomenci. Jen ĉiuokaze la celo de geedziĝo. Kaj li ne vere kontraŭis. Eble li ne volis, ke la iama onidiro ekhavu novan forton.

Vere por mi ne tre gravis naski filon. Entute ne gravis dua infano. Al mi Suzana plene sufiĉis. Sed mi al kutimiĝis havi Jozefon ĉemane en la lito. Kaj mi estis edzino, do mi rajtis je tio. Tamen mi ĉiam pensis pri Hanna, dum mi rajdis ŝian pli aĝan fraton kun fermitaj okuloj. Bela, facilmovva Hanna kun la sveltaj brakoj, la kolo kiu jen kaj jen vidiĝis, kiam ŝiaj haroj glitis flanken, kaj la buŝo, la ruĝbrunaj lipoj kiujn mi tiel amis kisi. Tial, se necesis ke mi nasku filon por plu havi ŝin kiel helpon en la mastrumado, bone, do estu tiel.

*La supra novelo estis unue publikigita en Beletra Almanako n-ro 10, 2011.*

# Ĉe Narva Strato

2007

Grigorij akompanis ŝin al la unua loko kaj helpis interpreti. Tri horojn ĉiuĵaŭde matene kaj same lunde. La laboriloj estis bonaj. La apartamento havis tri grandajn ĉambrojn kaj amason da anguloj, kiuj sufiĉus kiel loĝejo por ŝi. Sed ŝi devis resti surmatrace ĉe Griŝa.

La loĝanto estis emerita majoro. Li vere aspektis maljuna, tamen iel freŝa, kredeble sana kaj forta. Li tute ne odoris oldulaĉe.

“Li certe senĉese gvatos min por kontroli ke mi laboras”, ŝi diris al Griŝa antaŭ la unua fojo.

“Fajfu pri tio, Sveta. Lasu lin gapi. Eble vi povus eksciti lin por havi pli bonan pagon.”

“Ĉesu do!”

Sed la majoro ŝajnis ne tro kontrolema. Li malmulte babilis, kvankam li plej ofte hejmis. Ŝi purigis en paco, kaj lunde lavis la vazojn. La pagon ŝi ricevis enmane ĉiuĵaŭde. Kvarcent okdek kronojn, kio signifis kvincenton, ĉar ŝi zorgis neniam kunporti apunton. Komence ŝi trovis tion multege, sed poste, kiam ŝi volis sendi ion hejmen al panjo kaj Anna, ŝi spertis kiel malmulte tio estas, kvankam ŝi baldaŭ ekhavis duan lokon. Kaj kvankam Griŝa ne postulis monon por gastigi ŝin.

Forirante ŝi enmemorigis la adreson por esti certa retrovi ĝin. Narva Strato n-ro 20. Jen vere stranga koincido. Ŝi demandis sin, ĉu Griŝa serĉis specife ĉe tiu strato, sed kial li farus tion? Li ne estis Narvano. Sendube estis pura hazardo, sed ŝi trovis tion bona signo.

La dua loko samstrate estis tute alia. Plena familio. Oni klare rimarkis, ke tiun hejmon mastras la virino. Ŝi aspektis kvardekjara, tamen bela kaj elegante vestita. La viro ŝajnis pli juna. Li ne partoprenis en la interparolo.

“Bone do, Svetlana. Vendrede, kvar horojn. Fridays, okay? De tagmezo ĝis la kvara. Jen mia filo Orvar, kiu aĝas ok, kaj kvinjara Anna. Kaj jen mia edzo Fredrik. Mi mem nomiĝas Pia.”

“Knabino Anna, ĉu? Mi ankaŭ knabino Anna!”

“Pardonu? Ĉu vi volas diri – ĉu vi havas filinon? You have a daughter?”

“Jes! Knabino. Girl. Ŝi ankaŭ kvin. Five year.”

“Ha! Precize kiel nia Anna! Nekredeble! Ĉu ŝi estas kun vi en Svedio?”

Sveta ne komprenis kaj skuis la kapon.

“Is she here in Sweden? Stokholmo?”

“No, no. Ŝi en Estonio. Mia patrino en Narva.”

La virino turnis sin al sia filineto.

“Ĉu vi komprenis tion, Anna? Ankaŭ Svetlana havas knabinon, kiu nomiĝas Anna kaj havas vian aĝon. Sed ŝi vivas ĉe sia avino en Estonio.”

Ankaŭ la knabo volis atenton.

“Mia paĉjo loĝas en Anglio!” li diris al Sveta.

“Ne kamprenas. Patro Anglio?”

“Jes, mia vera patro loĝas tie. Fredrik estas mia vicpatro.”

Supozeble tio signifis, ke la virino edziniĝis duafoje. Sed kiel strange renkonti kvinjaran Anna ĉi tie! Ankaŭ tio estis bona signo. Tamen sveda Anna aspektis pli aĝa ol ŝia Annuŝka. Espereble ĉio estas bona pri ili hejme. Se panjo nur estas sana kaj Anna ne tro malobeemas.

Kiam ŝi venis vendrede tagmeze por purigi, kutime nur la edzo estis hejme. Li laboris ĉe komputilo. Poste kelkfoje Orvar revenis de sia lernejo, kaj fine Pia kune kun eta Anna kaj amaso da sakoj el manĝobutiko. Sed tiam estis tempo por Sveta ricevi sian pagon kaj foriri.

Ŝi ĉiam facile lernis lingvojn. Tamen daŭris tri jarojn por trapasi la lingvoekzamenon. Tri jarojn antaŭ ol ŝi povis peti civitanecon. Kaj ĉiuj paperoj, kiujn necesis akiri de buroaj limakoj. La naskiĝatesto por prui ke ŝi naskiĝis en Estonio. La

atesto, ke ŝi estas nepunita de tribunalo. La dokumento de identeco. Poste finfine ŝi povis akiri la pasporton, la bluan kun leono. La ŝlosilon al la cetera Eŭropo.

Ŝi planis unue serĉi laboron en Helsinko, pensante ke oni tie komprenos ŝian pene lernitan estonan lingvon. Sed la du vizitoj ne donis bonan impreson. Ŝi ne komprenis ilin, kaj ili ne havis paciencon aŭskulti, kion ŝi volas diri. Tie ne gravis la koloro de ŝia pasporto. Ŝi estis nur unu el amaso da rusoj, kiuj volis gajni kelkajn eŭrojn.

Tiam iu diris al ŝi, ke Grigorij Malkov estas en Stokholmo, kaj ŝi sukcesis kontakti lin. Li memoris ŝin de la teksfabriko kaj akceptis helpi ŝin, se ŝi faros la vojaĝon. Griŝa laboris en restoracio, kaj ŝi esperis trovi laboron tie. Li dividis antaŭurban loĝejon kun Jurij kaj Larisa, du geedzoj el Rusio. Ŝi ricevis matracon por dormi en lia ĉambro.

“Sveta, venu al mi enlite.”

“Ne, mi volas dormi.”

“Kompreneble vi dormos. Sed ĉi-supre estos pli agrable por vi ol sur tiu matraco.”

“Mi estas laca. Lasu min en paco.”

Tiam li anstataŭe venis suben al ŝi. Ŝi ne vere kontraŭis tion, tamen ne plaĉis al ŝi ke li rigardas tion memkomprenebla. Li povus almenaŭ diri ion pozitivan. Ke ŝi estas bela. Aŭ alloga. Almenaŭ ion. Ne simple “jen venu”, kvazaŭ al hundo.

Tamen li pravis, ke la lito estas pli komforta. Do ŝi al kutimiĝis. Sed restoracian laboron ŝi ne ricevis. Anstataŭe li metis slipojn sur arboj laŭlonge de strato, kie loĝis riĉuloj. Jen kiel ŝi trovis la majoron kaj la patrino de sveda Anna.

Eksciante, ke ŝi venas el Narva, la majoro vigliĝis.

“Ĉu el Narva? Diable! Ĉu hodiaŭ io restas de la fortikaĵo?”

“Ne kamprenas forkaĵo.”

“Fortikaĵo. Kastelo. Castle, fuorto.”

“Aha, zamok! Jes, jes. Granda forkaĵo. Malnova.”

“Ha, do, vi venas de tie, knabineto? Ĉu vi scias, ke ĝi iam estis sveda, Narva?”



“Jes, scias. Sveda armeo granda, granda kampanija en Narva. Sed caro Pjotr granda armeo, prenas Narvu.”

La majoro alportis dikan libron kaj elserĉis mapon, kiu ŝajne temis pri iu milito en Narva. Li gurdis pri sia dekdua Karlo kaj Petro la Granda, kaj amason kiun ne eblis kompreni. Al li tio ŝajnis esti sveda venkego. Tamen laŭ ŝia kompreno, caro Petro finfine konkeris Narvon de la svedoj. Sed ŝi neniam kontraŭdirus al majoro. Se li kredis ke Svedio venkis, do li kredis tion. Sed tiukaze ŝi hodiaŭ estus svedino. Eble tiam ŝi ne bezonus purigi ĉe emerita majoro en Stokholmo.

Ŝi pensis, ke li eble vigliĝos tiugrade, ke li petos specialan servon. Ŝi demandis sin kiun pagon li ofertos. Efektive li estas sufiĉe alloga, eleganta sinjoro. Unuafoje ŝi renkontas iun kiel li. Sed la militmemoroj ŝajne ne ardigis lin tiel. Ŝi ne sciis, ĉu li iam estis edzo. Eble li estas vidvo kiu ankoraŭ sopiras je sia edzino.

Vendrede, reveninte el la infanejo kun sia patrino, sveda Anna ĉiam klopodis venigi Svetlanan en sian ĉambron por montri al ŝi siajn pupojn. Ŝajne la patrino ne kontraŭis tion. Ĝenerale ŝi ne estis severa mastro. Anna babiladis kaj prezentis etajn scenojn per siaj pupoj. Komence Sveta komprenis malmulte, sed ŝi rapide lernis. Sveda Anna estis sufiĉe sperta, kompare kun ŝia filino. Ekzemple ŝi sciis bone legi, do Sveta konatiĝis kun sveda teksto en kelkaj infanlibroj. La vortoj ne ĉiam aspektis, kiel ŝi atendis aŭdante ilin. Sed la plimulto estis deĉifrebla. Feliĉe ŝi sciis legi estone. Ja temis pri la sama alfabeto, plimalpli.

Iutage Pia havis ideon.

“Anna havas tiom da ludiloj, kiujn ŝi neniam uzas. Kion vi pensas, Svetlana, ĉu ĝenus vin se ni kolektus iom en paketo por sendi al via knabino en Estonio?”

“Ĉu paketo? Al Anna?”

Kiam ŝi komprenis kaj akceptis, la ideo montriĝis mal-facile plenumebla. Ĉio, kion oni prenis el kestoj, estis la plej kara aĵo de sveda Anna. Fine Pia ĉesigis la klopodojn.

“Ni atendu. Mi mem aranĝos tion poste.”

“Panjo, vi ne rajtas donaci malnovan Urseton! Mi estos vere malĝoja!”

“Ne, li do restu. Sed vi mem povas elpensi ion, kion vi volas sendi al estona Anna.”

Ŝi turnis sin al Sveta.

“Aŭ ĉu ni diru rusa Anna?”

“Ni loĝas en Estonio kaj ni rusaj.”

“Sed kio vi estas plej multe? Kiel vi sentas vin?”

“Ni ne pensas tiel. Lando unu kaj – kiel oni diras – nacio alia. Ne sama afero.”

Pia ne montris, ĉu la klarigo kontentigas ŝin. Jen kiel estis ĉi-lande. Homoj preskaŭ ĉiam kondukis ĝentile, sed ne eblis vidi, ĉu ili efektive estas kontentaj aŭ malkontentaj, koleregaj aŭ feliĉaj. Eble ili mem vidis, sed por Sveta ne eblis tion distingi.

Post semajno Pia flustris, ke ŝi pretigas paketon. Sed ne necesas montri al Anna kion ŝi sendos.

Post ilia interparolo pri rus-sveda milito ĉe Narva, la majoro iĝis pli amikema. De temp’ al tempo li ŝercis. Unufoje li donacis al ŝi botelon da ŝaŭmvino. Ŝi demandis sin, kion li atendas reciproke, sed li nenion aludis.

Iulunde li malfermis vestite en negliĝo el vinruĝa, silkeca ŝtofo, kiun li kuntenis mane ĉe la brusto. Li konfuzite rigardis la manartikon, kie mankis horloĝo. Li tamen remastris sin, enlasis ŝin kaj malaperis dormoĉambren.

Troviĝis pli ol sufiĉe por fari kuireje. Sveta forĵetis rubon, skrapis manĝorestaĵojn, verŝis akvon en la lavpelson. Poste ŝi trovis glasojn, botelojn kaj plenplenan cindrujon en la salono. Survoje reen kun la purigita cindrujo ŝi koliziis kun knabo.

“Izvenite!” ŝi diris aŭtomate. “Pardonan!”

La knabo rigardis ŝin kun surprizo sed nenion diris. Tamen io en lia rigardo ŝajnis hejmeca. Same en la vizaĝo, tiu larĝa, kaj la malhelblonda hararo. Li aspektis apenaŭ dekokjara.

“El kie vi venas?” ŝi diris ruse.

Li rigardis dorsen. La dormoĉambra pordo estis fermita.

“Ĥarkovo. Kaj vi?”

“Narva en Estonio.”

“Li certe ne ŝatus ke ni interparolu”, diris la knabo.

Ŝi pripensis.

“Kial ne? Li estas afabla.”

La knabo paŭtis. Tamen li diris nenion pluan sed iris al la pordo, malfermis kaj trairis.

“Ĝis iam, eble”, li diris fermante la pordon.

Fredrik, la patro aŭ vicpatro de sveda Anna, ekkutimis elpaŝi el sia laborĉambro por oferti bieron. Ili sidiĝis sursofe, kaj ŝi vidis lin ekzameni ŝiajn kruojn. Tion li ja rajtis. Nenio mankis al ili. Ŝi esperis ke daŭros longe ĝis ili iĝos kiel tiuj de panjo.

“Kie vi loĝas en Stokholmo?”

“Albi.”

“Kion vi diris? Ha, Alby. Tio estas sude, ĉu ne? Ĉu sola?”

“Ne, kun viro de Estonio kaj du de Rusio.”

“Viro? Ĉu via edzo? La patro de via filino?”

“Ne, ne. Li nur amiko. Mi kaj li laboro fabrika en Estonio.”

Ŝi rekonis la esprimon en liaj okuloj. Tamen estis io malvarma en lia rigardo. Ŝi ne aparte surpriziĝis, kiam iutage li ŝteliris al ŝi en la vestiblo kaj karesis al ŝi la sidvangojn. Ŝi rektigis la dorson kun ŝvabrilo enmane kaj turnis sin kontraŭ li.

“Kio volas?”

Li ridetis superece, ŝajnis. Tamen li ne renkontis ŝian rigardon sed gapis suben al ŝia bluzo. Kaj jen li forte ekpemis ambaŭ ŝiajn mamojn.

Ŝi retroiris unu paŝon.

“Ne! Mi purigas. Laboras puriga. Ne alia.”

Li revenis apud ŝin.

“Ne estu tiel malema! Vi ja havas tempon por iom da plezuro. Ĉio jam estas pura, ĉu ne? Vi havos alion por fari. Je kiu aĝo vi naskis vian filinon?”

Li kaptis ŝian brakon.

“Ĉu tio ne plaĉas al vi? Ĉu vi eble volas pagon? Kiom vi kutime ricevas?”

Ŝi ŝire liberigis sin kaj ne respondis, nur staris atende.

“Diru kiom vi postulas! Krome, tio estas. Vi jam ricevas por labori ĉi tie.”

Ŝi sentis momenton da hezito. Kiom li pretos pagi por kuŝi kun ŝi? Eble kvincent? Tamen ne mil, certe. Sed kvincent ne estas multe, kaj li estas tiel abomena. Ne, ŝi ne faros tion. Ne kun li. Eble, se temus pri la majoro. Sed ne kun la patro de sveda Anna, la edzo de Pia. La vicpatro, kiel diris Orvar.

Ŝi duafoje retropaŝis.

“Ne. Mi nur purigas. Ne alia.”

“Mi montros al vi kie purigi. Venu!”

Li denove kaptis ŝian brakon, jam pli forte, kaj ektiris ŝin direkte al la banĉambro. Ŝi ne liberiĝis, sed ŝi plu tenis la malsekan ŝvabrilon en la dekstra mano. Ŝmac! La ŝvabrilo trafis lin meze inter la okuloj. Li malkaptis ŝin sed ŝajnis preta ĵeti sin al ŝi. Ŝi kaptis la ŝvabrilon ambaŭmane kaj refoje batis. Pum! Kaj refoje. Akvo gutis tra la vestiblo.

“Mi ne volas!”

Nun li fine cedis. Li viŝis sian vizaĝon kaj silente gapis al ŝi. Poste li turnis sin kaj iris en sian ĉambron.

Sveta preskaŭ ekridis sed poste rimarkis, ke ŝia korpo tremas. Tio tamen pasis po iom dum ŝi plu ŝvabris la plankon vestiblo kaj kuireje.

Kredeble mi ne havos pli da proponoj de li, ŝi pensis. Same bone. Mi ne ŝatus fari tion eĉ por mil kronoj. Ne kun li.

Je la sekva fojo la majoro estis kiel kutime. Eble iom pli silenta. Sveta ne povis eviti pensi pri li kun la Ĥarkova knabo.

Ŝi scivolis, ĉu li iĝis tia, ĉar li estas oficiro. Mankas virinoj tie. Sed svedaj militistoj sendube ne multe vivas ĉefronte, ĉar ili neniam militas. Tamen nun ŝi sciis, kial li neniam elpaŝis al ŝi. Ne estas pro ŝia manko.

Domaĝe ke la vicpatro ne estas tia, ŝi pensis. Nu, kia stult-aĵo, tiuokaze li ne estus edzo! Tamen, iuj laŭdire ja estas ambaŭemaj.

“Oni maldungis vin”, diris Griŝa.

“Kion?”

“Tiu virino, ĉe kiu vi purigas, maldungis vin. Ŝi telefonis hodiaŭ.”

Sveta tute frostiĝis.

“Kial?”

“Ŝi ne diris rekte. Eble ĉar vi provis perfiki pli da mono el ŝia edzo. Estu delikata, damne! Ne lasu la inon ion rimarki!”

“Ne frenezu, Griŝa! Ĉu vi pensas ke mi estas tia? Li tion volis, mi rifuzis kaj batis lian muzelon per lavilo.”

“Ha ha! Vi estas ridiga, Sveta! Ridige stulta, tio estas. Kompreneble vi petu monon pro tio.”

“Mi ne volis. Li estas naŭza.”

“Kio do? Vi devas perlabori, ĉu ne? Tiu polvosuĉado ja ne donas multe. Pli bone suĉi kelkajn riĉulojn. Ne malbonas preni monon pro tio.”

“Ĉu? Do vi povas iom pagi.”

“Ĉu pagi? Kion mi do faras, diable? Vi loĝas ĉi tie, ĉu ne? Kaj la manĝon, viaj moneretoj ne sufiĉas por multo.”

“La manĝaĵojn vi ŝtelas laboreje! Mi povos refoje meti slipojn urbocentre.”

“Certe, sed tio ne facilas. La plej multajn laborojn oni akiras per kontaktoj. Rekomendoj. Pro tio necesas esti iom amika al la mastroj, ĉu ne?”

Sveta metis novajn slipojn. Nun ŝi sciis mem skribi ilin, kvankam eble ne perfekte. Kaj ŝi vere trovis novajn taskojn. Du horojn semajne ĉe maljunulino kun dek milionoj da ornamaj vazetoj. Kaj kvar horojn ĉe familio, sed tio daŭris nur semajnon.

Kion Fredrik diris al sia edzino? Ĉu, ke Svetlana ofertis al li seksumon kontraŭ pago?

Eble ŝi iru tien por diri la veron, kiam Pia venos de sia laboro? Ne, tio maleblis. Ŝi neniam kredus al ŝi. Eble ŝi vokus la policon. Neleĝa alilandano ĝenas la familian vivon.

Ŝi scivolis ĉu Pia jam sendis la paketon. Kredeble ne. Ŝi estis tro okupita dumtage. Same bone. Kial Annuŝka ludu per uzitaj aĵoj, kiujn tiuj snoboj ne plu volas konservi? Tamen ŝi certe ĝojus kaj ŝatus la ludilojn. Ŝi ne zorgus de kie ili venas.

Ĉu ŝi rezignu kaj reveturu hejmen? Kiel nun estas, ŝi perlaborus same multe en la teksfabriko kiel ĉi tie. Per kvinobla peno, kompreneble. Sed tiam ŝi almenaŭ renkontus Annan semajnfine. Ja ŝi devus krome toleri la plendadon de panjo. Sveta scivolis, kiel estas al ili hejme en Narva. Se panjo nur estas afabla al la knabino. Certe ŝi estas tia. Ĉiam la nepino pli plaĉis al ŝi ol la propra filino, ŝajnis. Kvankam ŝi furiozis tiufoje, kiam Sveta venis hejmen graveda.

En la lasta tago de marto, kiam ŝi revenis al la apartamento, Larisa kaj Jurij pakis.

“Ni devos foriri.”

“Kial?”

“Ni nur subluas. La domposedanto ne akceptas nin.”

Evidente Griŝa estis sub-subluanto. Ŝi kuŝiĝis surmatrace por pense eskapi de ĉio.

Vespere Griŝa revenis de la restoracio, rifuzis foriri kaj uzis la sekvan tagon por kvereli kun Jura. Vendrede Sveta revenis de la vazo-virino trovante siajn aferojn en du papersakoj en la vestiblo. Ŝi reportis ilin enĉambren. La matraco estis for, do ŝi kuŝiĝis surlite.

Post iom Jura hejmenvenis, puŝis ŝin el la apartamento kaj prenis ŝian ŝlosilon.

“Eble Larisa kaj mi rajtos resti, sed tiam Griŝa kaj vi devos foriri”, li diris.

“Do kien mi?”

“Jen via problemo. Iru al Estonio per via damnita pasporto. Aŭ pozu ĉe stratangulo en la Stokholma urbocentro.”

Ŝi sidis ŝtupare ĝis Griŝa venis kaj enlasis ŝin. Tiunokte ŝi kuŝis en lia lito, dormetante kaj re kaj re vekigante pro la kverelado de Griŝa kaj Jura.

“Ni devas foriri, diris Griŝa dimanĉe matene. La mastro ŝanĝos la seruron, kaj oni minacis voki la policon.”

“Do kien ni iros?”

“Mi dormos ĉe kolego. Vi mem elpensu ion. Mi ne plu povas helpi vin. Memoru, se la polico demandas, vi restas en Svedio nur de monato kaj serĉas laboron. Leĝan laboron.”

Post du horoj ŝi staris kun du sakoj enmane en la metrostacio de Alby. Trajno alvenis, ŝi eniris kaj sidiĝis en preskaŭ senhoma kupeo. Sed kien? La sola ŝanco restanta estis la majoro. Sed ĉu li volus helpi ŝin? Se li almenaŭ ŝatus knabinojn! Kial ŝi havu tian malbonŝancon labori ĉe ulo kiu emas je knaboj?

Tamen jen ŝia sola eblo. La restanta mono ne sufiĉus por pramo al Talino. Eble se ŝi ion rakontus al li pri Narva? Ŝi elpensu ion. Ŝi diru, ke caro Petro tie grandioze fiaskis. Ke la Narvanoj sopiras je la bona sveda tempo. Kiel ŝi kapablu dirition svedlingve? Sed Narva restas ŝia lasta atuto, ĉar ŝi ne estas knabo.

La stacinomoj preterglitis unu post la alia. Baldaŭ ŝi elvagoniĝos ĉe Karla Placo kaj portos siajn sakojn en Narvan Straton. Ĝi estu bona signo, kiel ŝi imagis, unuafoje vidante la nomon.

*La supra novelo estis unue publikigita en La Espero, 2007.*

# Pordo al la maro

2008

Sur deklivo malsupre de la preĝejo aro da dometoj premas sin unu al la alia, ŝultro ĉe ŝultro, laŭlonge de la strato. Ili estas diverskoloraj stukitaj, havas pordojn el malhela ligno, kaj laŭ la sokloj floras alteoj. En la fenestroj videblas pelargonioj inter kroĉtrikitaj kurtenoj. La domoj dense subtenas unu la alian. Oni facile pensus, ke ankaŭ iliaj loĝantoj faras tion.

Dorsflanke ĉiuj domoj havas abunde verdajn ĝardenetojn. Tiuj plenas de perenoj, minimumaj legombedoĵoj kaj berarbustoj. Apude staras budoj kaj iuloke kunikla kaĝo. Ĉiu ĝardeno havas sian lignan pordeton, kiu kondukas eksteren al pado laŭlonge de la marborda klifo. El la ĝardenoj oni vidas parton de la markolo. Transakve videblas la ĉeftera bordo, krom kiam pluvas aŭ nebulas.

En tia ĝardeno kun pordo al la maro maljuna virino ofte staras sub pirarbeto, kiu jam longe bezonus tondadon. Ŝi gapas al la maro kvazaŭ atendente, ke iu malaperinto revenu piede, marŝante supren laŭ la deklivo de la haveno, kun sia marista sako surŝultre.

La kvina de majo estas la Tago de Liberiĝo. Vespere ŝi iras ducent metrojn ĝis la placo. Ĝi estas la plej malgranda placo en la plej malgranda urbo de ĉi tiu landeto. Jen sur la pavimo antaŭ la urbodomo la urbanoj metas brulantajn kandletojn en granda cirklo. Ankaŭ ŝi alportas kandleton, kiun ŝi ekbruligas per unu el la aliaj, kaj metas iuloken, kie estas interspaco en la lumanta rondo. Poste ŝi staras dum kelka tempo kaj silente kontemplas la brulantajn kandelojn, dum la printempa vespero senhaste krepuskiĝas. Ŝi parolas kun neniuj kaj neniuj alparolas ŝin. Nun tamen neniuj piedpremas ŝian kandleton, kiam ŝi alturnas la dorson por foriri. Ne plu restas multaj el tiuj, kiuj spertis la aferon.



Poste ŝi staras dum iom da tempo ĉe sia ĝardena kradpordo, rigardante al la malluma maro. Kelkaj lumaj punktoj moviĝas transe. Supozeble ili estas aŭtoj. Lanternoj de barkoj malofte videblas ĉi-sezone. Somere la maro ĉi tie plenas je veloj. Sed komence de majo ne, kaj precipe ne en la vespera krepusko.

Sub la klifo situas tendumejo. Somere ĝi plenas je homoj. Familioj kun infanoj, kiuj laŭte krias ludante kaj kurante tien-reen. Tiam de temp' al tempo iu familio aŭ juna paro promenas sur la pado ekster ŝia ĝardena pordo. Juna sunbrunigita viro kun nuda brako ĉirkaŭ juna sunbrunigita virino kun nudaj ŝultroj.

Ankaŭ li estis juna kaj sunbrunigita, kaj li metis sian fortan brakon ĉirkaŭ ŝin. Kaj ŝi estis juna, tamen ne tiel bruna. Kaj neniam ŝi iris kun nudaj ŝultroj.

Kelkaj el la preterirantoj venas el tie for. Ŝi daŭre bone komprenas la lingvon. Sed ili babilas nur pri etaĵoj. Kion ili faris hodiaŭ, kion ili planas por morgaŭ. Ŝajne ili vivas plene en la nuno. Ili ne povas helpi ŝin klarigi, kio okazis, aŭ kial li malaperis.

Tiam ŝia patrino kutime staradis gvatante ĉe la ĝardena pordo. Ne al la maro, sed al la strando. La patrino faris tion por ekvidi ŝin, por konstati, ĉu ŝi revenas hejmen sola aŭ kun li.

Søren neniam staris gvatante. Se li estis hejme, li sidis legante iun hektografitan folion en formato de bildkarto. Konvena por rapide kaŝi enpoŝe. Aŭ li sidis kun orelo premita al la radioricevilo, aŭskultante malpermesitan novaĵelsendon de BBC.

Li estis du jarojn pli juna, tamen li volis decidi pri ŝi. Kiun ŝi rajtis renkonti kaj kiun ne. Vidinte ŝin promeni sur la moleo kun Reinhold, Søren volis vergi ŝin. Sed tiam la patrino intervenis. Ne estis tasko de pli juna frato, eduki sian fratinton. Efektive tio estis tasko de la patro, sed li jam de ok jaroj estis mortinta. Li dronis, kiel tiom da fiŝistoj. Kaj la patrino ne havis

forton malpermesi. Ŝi povis nur admoni, peti ŝin pripensi kion ŝi faras. Pripensi, kio okazos estonte.

Sed ĝuste tio ne eblis, kiam ŝi estis kun Reinhold. Tiam ekzistis neniu estonteco, nur granda nuno.

Ankaŭ Søren multe parolis pri la estonteco. Pri iu tempo, kiam oni ĵetos ilin en la maron. Kaj sendube ĝuste tion li provis fari; li atakis Reinhold por ĵeti lin maren. Tio fiaskis. Neniu el ili estis ĵetita en la maron, sed Søren restis surstrande, pafmortigita per la arma pistolo de Reinhold. Al Søren venis neniu estonteco. Nur tombo en la preĝeja tombejo, tie super la borda klifo. Tombo rigardanta la maron.

Ankaŭ Reinhold malaperis. Venis aliaj al la dometo, kie nun jam restis nur patrino kaj filino. Oni pridemandis ilin, sed nek ŝi nek la patrino sciis, kion Søren planis. Kaj ĉiuj hektografitaj novaĵbultenoj estis zorge bruligitaj. Ili do elturniĝis. Se eblas nomi tion elturniĝi. Entombigi dekokjaran filon kaj fraton.

Sed la najbaroj sciis ĉion. Ĉiuj sciis, kio okazis. Kion Søren provis fari, kaj kial. Kion ŝi faris kun Reinhold. Ĉion, kion ili sciis, kaj ĉiun flustran klaĉaĵon oni konservis por la estonteco. Kaj iutage alvenis la estonteco. La kvinan de majo. Tiam la kamaradoj de Søren decidis, kio estas vera kaj malvera, kion ŝi faris kaj ne faris. Kaj kion meritas tiaj inoj, kiel ŝi.

Tio neniam iĝis afero de la polico. Neniu iĝis afero de la polico. Tio ne necesis. Ĉiuj sciis ĉion, eĉ sen tio. Kaj la dometo en vico de aliaj dometoj ne plu apogis sin al la najbaroj. Ĝi estis premata inter ili. Ĝi kunpremiĝis kaj ŝrumpis, iĝis la plej malgranda domo en la plej malgranda urbo de ĉi tiu landeto.

Ŝi restis en la dometo. Ŝia patrino ŝrumpis, baldaŭ iĝis la plej malgranda patrino de la lando, kaj fine estis enterigita en la tombejo. Sed ŝi mem restis. La haroj denove elkreskis, sed la buŝo rigidiĝis kaj la okuloj iĝis evitemaj. Eble ŝi devintus foriri de ĉi tie. Forvojaĝi al lia lando, serĉi lin. Sed intervenis la tomboj de Søren kaj de la patrino super la klifo.

De temp' al tempo ŝi supreniras kaj metas kandleton ankaŭ tie, surtombe. Poste ŝi iras sur la pado laŭ la klifa rando,

malsupren al sia ĝardeno kradpordo. Ŝi malfermas kaj eniras, restas momenton, rigardas al la maro. Kompreneble ŝi scias, ke neniu revenos de tie. Stari ĉi tie atendente estas nura kutimo. Stari ĉi tie ĉe pordo al la maro estas io, kio restis en ŝi, dum ŝi atendis la estontecon.

*La supra novelo estis unue publikigita en **Vizaĝoj. Novelaro 2000-2009.** Stockholm 2010, Eldona Societo Esperanto.*

# Marika

2009

Li preskaŭ tuj komprenas kiu telefonas, kvankam pasis jaroj de kiam li aŭdis tiun voĉon. Kiam li ekscias kio okazis, forta puŝo trairas lian bruston, la koro akceliĝas kaj li devas ekstari por rondiri en la ĉambro. Eble li devus atendi tion. Marika aspektis konsumita, kiam ŝi aperis ĉe li post pluraj jaroj da foresto. Nervoza, nekapabla sidi senmove. La manoj kvazaŭ plukadis ion sur la brakoj. Krome ŝi estis maldika; absolute ne videblis, ke ŝi gravedas. Li bedaŭras, ke ili disiĝis tiel, sed li ne suspektis, ke li eble vidas ŝin la lastan fojon.

Jen aferoj pri kiuj János cerbumas ĉi tiun sabaton, dum li veturas per la blua metrolinio ĝis la finstacio, kie atendas antaŭurba trajno. Post dek minutoj ĝi ekiras, serpentas tra la sudorientaj urbopartoj kaj pluas en la kamparon. Ĝi ne rapidas; kaj la trako kaj la vagonoj jam malnovas. Tio ne gravas; jam nenio plu urĝas.

Se li traktus ŝin alie, agus kun ŝi alimaniere, ĉu tiam okazus same? Ne eblas scii. Poste oni ĉiam devintus ĉion antaŭvidi.

La trajno klaktinte antaŭeniras inter pli-malpli zorgataj ĝardenoj, disaj domegoj kaj fabrikoj. Jen kaj jen staras grupoj el poploj, kiel avertaj krisignoj en la ebena pejzaĝo. La horo jam proksimas al la dekunua kaj duono, sed ĉi tiu novembra tago estas nekutime griza kaj malgaja, kun fora nebuleto, tra kiu arbustoj kaj arboj ŝajnas pezaj pro la pluvo falinta nokte. La malseko penetras ĝis en la kupeo, kaj li sentas malvarman trablovon ĉiufoje, kiam la trajno haltas por ellasi vojaĝantojn. Ĉi-loke malmulto ŝanĝiĝis en jardeko. La stacinomaj tabuloj plu apenaŭ videblas, do li kalkulas la haltojn, kiel Marika tiam instruis al li. Ĉe la naŭa halto li devas elvagoniĝi, sed tuj antaŭe li ekvidos la lagojn.

Ĉi-semajnfine li devus kromlabori pri domkonstruado, kiun la firmao okazigas norde de la urbo, malgraŭ financa krizo kaj malbona konjunkturo en lia branĉo. Sed li konvinkis kolegon anstataŭi lin. Homoj ankoraŭ respektas entombigojn, kvankam malfacilis al li klarigi, kiam la kolego demandis, kiun parencon li perdis.

Post iom pli ol duonhoru dekstre aperas la unua grizakva lageto. Ankaŭ aliflanke io ekbrilas inter arboj; li scias, ke tio estas la lago kun strando, kiun oni nomas la tria. Ŝajnas esti sufiĉe da novaj unufamiliaj domoj ĉirkaŭ ĝi. Kelkaj el ili nur duone pretas, tamen li vidas neniun aktivadon tie. Eble pro la krizo, aŭ oni nur havas liberan sabaton. Nu, por li jam estas tempo elvagoniĝi.

Imre, ŝia patro, venas renkonte, kiel li promesis telefone. Ili mansalutas kaj ekpromenas, ne suden al la domo, sed reen laŭ la fervoja trako kaj poste dekstren, kie turniĝas la vilaĝa strato. Evidente la nombro de domoj kreskis en la lastaj jaroj, tamen la vilaĝo restas miksaĵo el malnova kaj nova, granda kaj malgranda, stukaĵo, brikoj kaj betono, kreskinta kaj ĵus plantita. Li imagis ĝin pli verda, sed eble tio estas memoro de somero, aŭ de enamiĝo. Nun estas aŭtuno.

Ili preterpasas la ordinaran flavan preĝejon; jen troviĝas tomboj, sed ne el la ĝusta speco. Nek li estas tia, tamen Imre neniam tion menciis. Male, jam dekomence János sentis sin akceptita de li.

Tiam, antaŭ dek jaroj, li kvin- aŭ sesfoje akompanis ŝin ĉi tien, kaj la patro ĉiam traktis lin amike. Li ŝajne volis, ke János zorgu pri Marika, kaj tion li sendube farus, se ŝi permesus.

Kun la patrino li neniam interŝanĝis multajn vortojn dum tiuj vilaĝaj vizitoj. Ŝi restadis kuireje, zorgis pri manĝoj kaj pri Ernő, la filo. Oni ĉiam regalis ilin per tagmanĝo, sed nur la patro, Marika kaj li manĝis ĉe la salona tablo. La patrino kaj la filo sidis kuireje. Oni rimarkis, ke ili hontas pri Ernő, eble plej multe kiam li manĝis, ĉar li sufiĉe malpurigis sin. Tamen li

ŝajnis tre kara al la patrino, kiu ege okupiĝis pri li. Ŝi ŝajne ne multe atentis pri Marika, nek pri János.

Post iom ili atingas pli malgrandan preĝejon, blankan kun tureto altiĝanta nur kelkajn metrojn super la tero. Ili ne eniras ĝin sed pluiras en la tombejon. Ĝi estas ĉirkaŭata de fagoj, kiuj ankoraŭ ne perdis siajn malsekajn, ruĝe brunajn foliojn.

“Ni ne havas propran pastron”, diras Imre. “Li venadas ĉi tien el la urbo kelkfoje jare.”

La patrino kaj frato de Marika staras iom fore sur la tombejo. Li estas eĉ pli granda ol János memoras, kaj ŝi pli malgranda. Li ne vidis la fraton post kiam Marika rakontis, kio okazis, sed li ŝajnas same inertia kaj senhelpa kiel tiam.

Je kelkmetra distanco de ili troviĝas ĵus farita kvarangula truo en la grundo, kaj apud ĝi amaseto da tero kaj kelkaj floroj. Imre kondukas lin tien. La patrino rigardas suben, kaj la frato ien en la malproksimon. Neniu el ili mansalutas lin. Li kontentas pri tio.

Ĉe flanka budo staras viro en bruna jako. Li klinas sin al fosilo dum li fumas.

“Jen la preĝeja pedelo”, diras Imre. “Li preparis la tombon por ni.”

La truo ŝajnas al János tre malgranda. Sed Imre levas butikan plastsakon el Lidl, kiu staris inter la floroj, kaj eligas iaspecan ujon. Vazon el metalo, ŝajnas. Jen kie troviĝas Marika.

Ili atendas longe. La frato malkvietas kaj komencas rondiri inter la tomboj, trenante kun si la patrinon. La pedelo parolas poŝtelefono kaj tuj poste alpaŝas por sciigi, ke la pastro malfruas.

La malvarma vento iom malpliiĝis, aŭ eble la arboj ĉirkaŭ la preĝejo ŝirmas la tombejon. Sed anstataŭe ekpluvas. Komence nur per etaj, malpezaj gutoj, sed iom post iom pli dense. La patrino kaj la patro disfaldas ĉiu sian ombrelon, kaj baldaŭ oni kunpremiĝas, Imre kaj János sub nigra, la patrino kaj la frato

sub vinruĝa. La pedelo staras senŝirma, klinante sin al la budo kaj penante ekbruligi novan cigaredon.

Li ekkonis ŝin en studenta filmklubo. Poste ŝi konfesis, ke ŝi iris tien por renkonti alian junulon, sed li tiufoje ne venis, kaj post la konatiĝo kun János ŝi ne plu zorgis pri la alia. Eble tiu diro estis nur iaspeca flato, sed ial ili ne plu iradis al la klubo kune. Ordinaraĵn kinejojn ili sufiĉe ofte vizitis, kaj muzeojn, kaj la loĝejon unu de la alia. Ŝi dividis studentan ĉambron kun samkursanino de la pedagogia fakultato, sed li havis propran ĉambron, do ĉe li neniu ĝenis ilin. Komence ŝi tamen ne volis kuŝi kun li. Laŭdire ŝi tro multe amis lin. Li pensis, ke jen io kion knabinoj diradas, por ke oni ne ĉesu respekti ilin. Io, kion ŝi legis en konsila kolumno por gejunuloj. Li supozis, ke ŝi estas pli-malpli sensperta.

Tiu unua tempo estis speciala. Ĉio ŝajnis ludo; li sentis sin iel liberigita, post kiam li ekkonis Marikan. Libera de ĉia devo kaj premo. Ŝi scivolis pri li, de kie li venis, kion li studis en la teknika fakultato, kion li faradis en siaj liberaj horoj. Ŝi subridadis foliumante liajn kompendiojn pri konstrumaterialoj aŭ matematiko, en kiuj li neniam vidus ion komikan. Preterpasante domojn konstruatajn aŭ novajn, ŝi volis ke li recenzu ilin. Kaj unufoje ŝi haltis antaŭ pompa secesia domo ĉe la strato Nagymező.

“Ĉi tiajn domojn vi devos konstrui, kiam vi ekzameniĝos!”

Li ridis.

“Tio estus amuza. Sed kredeble neniu volos pagi pro tio.”

“Kiam mi estos riĉa, mi mendos ĝin de vi. Poste mi loĝos tie supre, en la dua etaĝo, inter tiuj agloj aŭ kio ajn ili estas. Vi rajtos veni vizite de temp’ al tempo.”

“Tio plaĉos al mi. Espereble viaj lakeoj enlasos min.”

“János, ĉu vi restos ĉi tie post la ekzameno, aŭ ĉu vi volas reveni al Szeged?”

“Ne, neniam plu al Szeged. Prefere Novjorko.”

Ili ludis, ili similis dekkvinjarulojn, kiuj nur ŝajnigas amrilaton. Sed iuvespere, kiam ambaŭ estis ebriaj, ŝi ne plu povis

nei, kaj ili iĝis veraj geamantoj, laŭ lia ideo pri tiaj. Post la unua fojo sur lia mallarĝa, knaranta lito ŝi neniam plu rifuzis. Tiam li ne rimarkis, ke ŝi mem nenion iniciatas.

Ŝi neniam havis orgasmon, ĉiuokaze ne kun li. Ŝajne ŝi eĉ ne zorgis pri tio; ŝi ankaŭ nenion ŝajnis. Li devis konfesi, ke li ne scias tre multe pri tiaĵoj, pri kiel fari por helpi ŝin. Ŝi estis lia dua. Do li ne cerbumis pri tio; li pensis ĉefe pri si mem, kaj ŝi neniam malemis. Poste li kelkfoje pensis, ke se ŝi vere amus lin, ŝi almenaŭ iufoje ŝajnis orgasmon.

La frato pli kaj pli malkvietas kaj ne plu volas resti senmova sub la pluvombrelo. Li paŝas ĝis la eta truo en la grundo, kaj kiam li komprenas, ke Marika troviĝas en la malhele griza urno staranta apude, li ekploras. La patrino kondukas lin en la preĝejon, por preĝi, diras la patro kvazaŭ pardonpete.

Ankaŭ János rigardas suben en la kavon. Kolektiĝis iom da akvo surfunde, tamen tio ne ĝenos; la tero ŝajnas tralasema kaj bone drenita. Sur la asfaltaj vojetoj tamen jam etendiĝas flakoj.

Li sentas strange stari ĉi tie sub pluvombrelo, premite al ŝia patro, kiun li dum jaroj ne vidis. Kredeble ili neniam staris tiel proksime unu de la alia.

“Se li ne venos, tiu pastro”, diras János. “Kion ni faros?”

“Li venos. Sendube la urba trafiko malfluas.”

Efektive ŝi neniam volis esti instruisto, sed artisto. Kaj li vere trovis ŝin talenta. Sed la gepatroj rifuzis ekonomie subteni ŝin en arta lernejo. Ŝi devis lerni ion utilan, ion per kio ŝi povos vivteni sin. Instruisto de elementa lernejo. Kiam ili estis paro jam de unu jaro, li rimarkis, ke ŝi ja frekventas la prelegojn, sed malofte studas hejme. Kaj ankoraŭ poste ŝi ne plu iris al ekzameniĝoj. Ŝi ĉiuokaze ne sukcesos, ŝi diris.

Anstataŭe ŝi senĉese desegnadis. Kiam ili promenis sur kajoj, en parkoj aŭ sur la montetoj de la malnova Buda, ŝi ĉiam kunportis skizblokon. Fojfoje ŝi haltis por desegni kelkajn kolombojn sur fenestrolado, barĝon malrapide strebanta kontraŭ la fluo aŭ simple frostan folion sur la grua vojeto de iu parko.



Kelkfoje li iris aĉeti al ili glaciaĵojn aŭ freŝajn kornobulkojn, kaj kiam li revenis, ŝi jam pretigis almenaŭ unu desegnaĵon, iam eĉ kelkajn.

“Jen nenio rigardinda, nur skizo”, ŝi tiam diradis, kaj poste ŝi ŝajnis defendi sin, kiam li eltrudis la blokon el ŝiaj manoj.

Sed al studentaj festenoj ŝi volonte iradis. Tiam li ĉiam estis nervoza, ĉar ŝi ne toleris multon. Du-tri glasojn da vino, kaj ŝi estis ebria. Kaj li ne povis ĉie garde akompani ŝin.

Nur unu el ŝiaj desegnaĵoj li rajtis konservi. La ceterajn, kiujn li ricevis, ŝi reprenis. Ĝi estis tutkorpa portreto de li staranta en banŝorto apud unu el la vilaĝaj lagoj. Vere li staris sur la strando, dum ŝi portretis lin, sed ŝi ne sukcesis pri liaj piedoj, ŝi diris, do ŝi altigis la nivelon de la lago desegnante lin kun akvo ĝis la kruroj. Tio aspektis iom komike, sed ŝi desegnis diable lerte. Ĝi ne estis karikaturato, tamen ankaŭ ne plibeligo. Ŝi trafis pri lia oblikva buŝo kaj la kurba nazo, kvankam oni vidis lin de fronte. Fone videblis kelkaj infanoj ludantaj per banpilko.

Post jaro kaj duono ŝi gravediĝis. Li vere klopodis gardi sin kaj bone konis ŝian kalendaron, sed tio ne helpis.

Li volis, ke ili diskutu la aferon, sed tio ne necesis, ŝi diris. Ŝi rezervis horon en kliniko kaj ŝajnis ne malbone farti pro tio. Tamen plej ofte estis malfacile scii, kiel ŝi efektive fartas.

Li havis ian malrealisman ideon, ke ili eble povus konservi la idon, kvankam ili ambaŭ estis studentoj. Ke ŝiaj gepatroj povus subteni kaj helpi. Sed al ŝi la afero estis memkomprenebla. Kaj li ne rajtis mencii ĝin dum vizitoj en la vilaĝo.

Post du jaroj li eksciis, ke ĝi ne estis ŝia unua. Tio estis en 2002 post la granda inundo; ili staris surkaje rigardante al Danubo, kie la albordiĝejoj de ŝipetoj restis parte subakvaj. La pinto de biletvenda kiosko videblis, kun du stratlampoj kaj kelkaj aliaj fostoj. Ĝuste tiam la varfo ŝajnis farita por submarŝipoj. Ŝi staris turnite riveren dum ŝi rakontis. Li klopodis venki subitan naŭziĝon.

“Sed kion faris viaj gepatroj?” li demandis.

Ŝi turnis sin al li kaj alhokis siajn brunajn okulojn en la liajn.

“Paĉjo sciis nenion.”

Jen ĉio. La naŭziĝo revenis. Ŝi eĉ ne menciis la patrinon.

“Sed... Kion...”

Lia parolo rajpis; li ne sukcesis ion elbuŝigi. Ŝi returnis sin flanken.

“Pro honto mi ne kuraĝis ion diri. Tio okazis post kiam li finis la specialan lernejon kaj estadis hejme ĉiutage. Mi ja frekventis lernejon, sed kiam li venis al mi unuafoje, mi estis malsana pro gripo kaj kuŝadis enlite. Li demetis la pantalonon kaj la kalsonon, kaj mi ridis pri li. Li aspektis komike kun tiu staranta afero, kiu balanciĝis tien-reen.”

“Ĉu tio signifas, ke vi konsentis?”

Ŝi ekridis akre, eĉ ne turniĝante al li. Ŝia voĉo sonis kiel unu el la mevoj, kiuj gvatis de sur rubo emerganta elakve.

“Li fikstennis min kaj premis min suben, kovris al mi la buŝon kaj nazon. Mi pensis ke mi mortos. Li estis forta. Kaj persista. Poste li kutime venadis, kiam panjo kaj paĉjo ne estis hejme, sed iom post iom mi lernis pli lerte eskapi, fuĝi de la domo. Li neniam foriris ien sen panjo.

“Kio okazis, kiam ili eksciis?”

“Kion vi pensas?” Paĉjo malĝojis, kaj panjo koleris. Kont-raŭ mi, kompreneble, ĉar mi gravediĝis. Unue mi ne kuraĝis diri ion pri Ernó. Mi pensis, ke oni certe malliberigos lin en ia flegejo. Li neniam travivus tie sen panjo. Do mi asertis, ke kulpis la najbaro. Poste mi tamen devis rakonti la veron, ĉar tiu viro riskis veran problemon. Mi estis neplenaĝa, ĉu ne.”

Ŝi silentiĝis, ne rigardis lin sed observis la akvon kaj la mevojn.

“Kio okazis poste, post la abortigo?”

“Nenio. Mi ne plu rajtis esti sola kun Ernó, kaj panjo komencis pli zorge gardi lin. Poste, en la mezlernejo, mi loĝadis ĉe onklino enurbe.”

Li volis demandi multe pli, sed ŝi turnis sin kaj paŝis for de tie, al la metroo, por hejmeniri al sia luata ĉambro, kaj li

postsekvis ŝin povante nenion fari. Ĉe la subirejo, kie ili dis-  
iĝis, li provis brakumi ŝin, sed ŝi elturniĝis kaj malaperis suben  
per la rulŝtuparo.

Kial do ŝi rakontis al li, kion faris ŝia frato, se ne pro tio ke  
ili nun tre proksimas unu al la alia, kaj ĉar ŝi volas nenion  
sekreti al li? Li konsciis, ke neniuj konsolo ekzistas pro tio, kion  
ŝi travivis, tamen li volis dividi ŝiajn sentojn, kiom ajn tio eblis.  
Sed post tiufoje sur la kajo ŝi male malproksimiĝis de li,  
kvazaŭ ŝi ne eltenis la proksimecon kaj do rakontis la aferon  
por forpuŝi lin. Tiusomere ili ne vizitis la vilaĝon kune. Kaj  
kiam ŝi iufoje desegnis, ŝi ne volis montri la bildon.

Aŭtune ŝia patro komprenis, ke ŝi eĉ ne duone pretas pri la  
studoj, kaj tiam li nuligis la subvencion. Do ŝi ekloĝis ĉe János.  
Komence li ĝojis pro tio, sed baldaŭ li ekdubis, ĉu ŝi efektive  
estas la ĝusta. Ŝi komencis vespere eliradi sola kaj ofte revenis  
ebria meze de la nokto.

“En iuj novaj trinkejoj”, ŝi respondis, kiam li demandis,  
kie ŝi pasigis la vesperon. “Elegantaj. Ŝikaj, tutsimple. Ankaŭ  
vi devus iam plezuriĝi.”

“Kiel vi povas pagi? Certe tio multekostas?”

“Neniuj problemoj. Oni regalas. Ĉiam estas eksterlandaj  
komercistoj kaj aliaj, kiuj regalas.”

Tiutempe li finis sian ekzamenon kaj bonŝancis tuj trovi  
laboron, do ekonomie ne estis problemoj vivteni du personojn.  
Precipe ĉar ŝi pli kaj pli ofte manĝis ie fore, kaj iam eĉ ne  
revenis por dormi.

Dum la lasta duonjaro ili apenaŭ plu havis interrilaton. Li  
komprenis, ke ŝi vivas per viroj, kiujn ŝi renkontas en trinkejoj  
kaj restoracioj, eble ankaŭ aliloke. Li ne supozis, ke ŝi rekte  
postenas surstrate, kaj li ne sciis, ĉu ŝi ricevas monon de ili,  
tamen vestaĵojn, juvelojn, vizitojn en restoracioj, vinon, alko-  
holon ili ja donis al ŝi. Fine ankaŭ drogoj ekaperis; li neniam  
vidis ŝin preni ion sed rimarkis, ke ŝi estas narkotita.

Kelkatempe ŝi venadis hejmen nur por bani sin kaj ŝanĝi  
veston, kaj poste eĉ tute ne plu. Iu transportfirmao venis for-  
porti la etaĵojn, kiujn ŝi posedis ĉe li. Ŝi translokiĝis al Vieno,

kaj li ricevis bildkarton el Prater post kelkaj monatoj, sed poste nenion plu. Li supozis, ke ŝi daŭrigas la saman vivon en Vieno kiel ĉi tie.

La preĝeja sonorilo batas la duan horon. La frato jam trankviliĝis kaj revenas kun la patrino. Li staras apud ŝi, ŝajne preskaŭ dormante. La pluvo maldensiĝas, ĝi jam pli-malpli similas maldikajn pinglojn enaere, kiel ia humidaĵo, kiu ne plu falas alteren sed senteblas kontraŭ la haŭto, se oni moviĝas. János staras sur ĉi tiu vilaĝa tombejo jam de du horoj, kaj lia korpo tute rigidas.

“Ne”, subite diras Imre. “Ni mem devos prizorgi la aferon.”

Li levias la urnon, kiu flanke havas du oritajn tenilojn. El la plastsako li eligas du rubandojn, kiujn li tredas tra la teniloj. Poste li enmanigas al János unu el la rubandoj.

“Ĉu vi bonvolus helpi min?” li diras.

János kapjesas kaj glutas, kaj ili paŝas flankdirekte al la kavo kun la urno inter si, kvazaŭ portante ion neimageble pezan, eble fortepianon. Vere ŝi pezas preskaŭ neniom.

Ili tenas ĉiu sian rubandon, iom post iom malhisante la urnon en la kvadratan truon. Imre ion murmuris. Patronian li recitas, kaj János aliĝas al li je kelkaj lokoj, kiuj ekaperas en lia memoro, kvazaŭ rompitaĵoj de poto trovataj en la tero. Kiam la urno staras stabile en la funda akvoflako, Imre lasas sian rubandon fali en la truon. János faras same.

“Kara eta filinjo, adiaŭ”, diras Imre, viŝante al si la okulojn.

“Adiaŭ Marika”, diras ankaŭ János raŭke, tamen liaj okuloj eĉ pli sekas ol antaŭe, ĉar la pluvo pli-malpli ĉesis.

Ankaŭ la patrino kaj frato alpaŝas. Ili staras ambaŭflanke de la kavo rigardante suben al ĝi. János retroiras kelkajn paŝojn kaj ne aŭdas, ĉu ili ion diras. Poste Imre kaptas ĝardenan fosileton ŝovitan en la amason da tero, aŭ eble ĝi estas specifa ilo por ĉi tiu celo. Li ŝutas teron trifoje en la truon, ion murmuris kaj finas per pli laŭta Amen.

Ili silentas.

“Do ni devos plenigi per la tero”, Imre poste diras.

Sed kiam li reprenas la fosileton por ĉerpi pli multe da tero, la pedelo alrapidas.

“Ĉesu, mi petas”, li diras. “Vi ne rajtas plenigi ĝin.”

“Ĉu ne?”

“Ne. Mi zorgos pri tio poste.”

“Nu, bone do. Dankon.”

Imre remetatas la fosileton kaj rigardas ĉirkaŭ si. Lia rigardo haltas ĉe János. Ŝajnas, kvazaŭ Imre ĝuste malkovrus, ke li ĉeestas.

“Eble vi ŝatus ion diri?” li demandas.

“Mi ne scias kion”, respondas János. “Pasis tiom da tempo.”

Tio tamen ne estas vera. Pasis nur kvar semajnoj, de kiam li tuŝis ŝin. Kaj kiam ili disiĝis, li supozis, ke li baldaŭ renkontos ŝin denove. La financa krizo ĵus komenciĝis, kaj li ektimis, ke ĝi ĉesigos la domkonstruadon. Iutage ŝi aperis ĉe li. Pasis kvin jaroj de kiam li vidis ŝin; ili ambaŭ estis pli aĝaj, tamen li konsterniĝis. Ŝi aspektis ne kvin sed dek kvin jarojn pli maljuna, krome ŝi estis magra kaj ŝajnis malsana. Kiam ŝi moviĝis kaj ridis, ŝi tamen estis la sama Marika kiel tiu, kiu fascinis lin en la filmklubo.

Ŝi rakontis, ke ŝi loĝis kelkan tempon en Vieno kaj poste en Germanio, tamen antaŭ du jaroj ŝi revenis. Do ili jam delonge refoje vivas en la sama urbo, sed iliaj vojoj ne interkruĉiĝis. Eble ne tre strange, se li pripensis, tamen li miris pri tio.

Ŝi restis dumnokte. Se konsideri la vivon, kiun ŝi supozeble vivadis, li devus senti neniun altiron. Tamen estis preskaŭ male; li nepre devis posedi ŝin ankoraŭfoje. Ŝajne troviĝis pluraj Marika tie en lia vasta risorta lito el Ikea: unu kiu naŭzis lin, unu je kiu li sopiris de jaroj, unu kiu perfidis lin kaj unu kiu finfine revenis al li. Li ne demandis, kion volas ŝi, sed agis pli-

malpli maŝine, kvazaŭ en sonĝo. Kaj ŝi pretis, ŝi akceptis lin, sed ĉu vere al li ŝi volis reveni? Li ne sciis.

Matene li alportis du tasojn da espreskafo al la lito, kie ŝi kuŝis envolvita. Strio da sunbrilo penetris tra la ŝutro kaj etendiĝis kiel luma rubando sur la kovrilo. Ŝi turnis sin, eksidis, palpebrumis al la lumo kaj diris:

“János, mi estas graveda.”

Li ekridis singulte kaj preskaŭ perdis la tasojn. Kafo ŝprucis sur la littukon.

“Jen rapida rezulto”, li diris metante la tasojn sur la litotablon.

Ŝi komprenis la komikon kaj pale ridetis.

“Ne kun vi, stultulo. Mi gravedas je tri monatoj. Kaj mi dezirus, ke vi akceptu prizorgi ĉi tiun infanon.”

Li sidiĝis sur la seĝon, kie ŝiaj vestaĵoj kuŝis ĵetite.

“Nun mi ne komprenas, kiel vi pensas, Marika. Kio pri la patro de la infano? Ĉu vi scias, kiu li estas?”

Tio ne estis bela demando; li volonte glutus ĝin, se tio eblus. Sed ŝi ŝajne eĉ ne rimarkis ĝin.

“Ne gravas. Se vi akceptos la infanon, vi estos la patro. Iam vi volis havi infanon kun mi, ĉu vi ne memoras tion?”

“Ne, vi mismemoras. Tiufoje mi pensis nur, ke ni devus diskuti la aferon kaj ne tuj kuri al la plej proksima abortiga kliniko. Ĉiel ajn, tio estis antaŭ jarcento, kaj ĝi estis mia ido.”

Li preskaŭ aldonis “aŭ tiel mi pensis”, sed ĉi-foje li mordis la langon kaj konservis tiun personon ĉe si mem.

“János, vi estus bona patro.”

Li ekridis. Kiel ŝi povus scii tion?

“Vi ne konas min, Marika. Ni ne plu konas unu la alian. Se ni iam konis nin.”

Ŝi silentis kun la dorso al la muro, nuda sed kun la ventro kovrita. La mamoj estis iom pli lacaj ol li memoris, tamen pli bonstataj ol la vizaĝo. La haroj estis pli longaj kaj pli trivitaj, la bruna koloro ne brilis kiel iam. Li pensis, ke li mem bone konserviĝis, tamen ĉi-momente li ne povis memori sian spegul-

aĵon. Kredeble lia buŝo restis same oblikva kiel antaŭ jardeko, eble pli. Kaj ne eblas forkuri de la nazo, kiun oni ricevis.

Ili trinkis sian kafon. La vekilo montris kvaronon post la deka, sed estis dimanĉo, kaj li havis neniun horon por observi. Li rigardis ŝin. Malfacilis al ŝi resti senmova. La manoj ŝajnis ion serĉadi sen ŝia konscio.

“Kie vi loĝas?” li demandis.

“Ĉe amiko.”

Ŝi aspektis, kvazaŭ ŝi intencus ion aldoni, sed nenio venis.

“Kiel vi trovis min? Mi kelkfoje ŝanĝis loĝejon.”

“Per inĝeniero en via laborejo. Via kolego.”

“Kiu?”

“Mi ne memoras lian nomon.”

Li ne povis ne scivoli, kiel ŝi renkontis tiun kolegon, tamen li ne demandis. Oni ne volas ĉion scii, pri kio oni scivolas.

Li proponis al ŝi lunĉi kun li, sed tiutage ŝi ne havis tempon.

“Eble alifoj.”

Ŝi ne diris sian adreson, kaj li ne demandis.

Li jam pretas forlasi la tombejon. Marika estas enterigita, kaj ŝia familio sendube reiros hejmen. Al li restas nur trajni reen al la urbo. Dum kelka tempo tamen neniuj moviĝas, krom la pedelo, kiu ekbruligas novan cigaredon. János subrigardas la horloĝon. Dudek kvin antaŭ la tria. Kaj li cerbumas pri tio, kion li delonge scivolas, kion ŝia patro ne diris.

“Kiel ŝi mortis?”

Li faras neprecizan geston suben al la kavo, tute nenecese, kompreneble. Imre ŝajnas ne surprizita, kaj la aliaj certe ne aŭdis, kion li preskaŭ flustris.

“Pro piloloj”, diras Imre.

“Aha.”

“La kuracisto diris, ke tio sendube okazis senintence.”

“Jes. Kompreneble ja.”

Neniu plu diras ion. La pluvo refoje plifortiĝas. La patrino palpas sian vinruĝan ombrelon sed prokrastas disfaldi ĝin.

Tiam taksio alveturas kaj haltas antaŭpreĝeje sur la gruz-ebeno. Elaŭtiĝas neĵuna viro en malhela kompleto kun nigra valizeto enmane. Li energie paŝas al ili. La taksiisto restas sidanta ĉe la stirrado sed ne forveturas.

“Jen li finfine”, diras Imre.

Ankaŭ el la patrino aŭdiĝas ia sono, malforta ĝemo. Unuafoje hodiaŭ János aŭdas ŝian voĉon.

La viro apogas sian valizeton al apuda tomboŝtono, malfermas ĝin kaj eligas ion kun la aspekto de granda tuko. Ĝi estas iaspeca ornamita kapoto aŭ kazublo, aŭ kiel ajn oni eble nomas tiaĵon, kiun li transkapigas kaj mane glatigas antaŭe sur la ventro. Poste li eligas biblion, kiun li ne malfermas sed nur tenas enmane, kaj jen li ekpostenas apud la duone plenigita kavo. Li palpas per la alia mano sub la kapoto en maniero suspektinda, sed temas nur pri slipo kiun li elfosas el pantalona poŝo.

“La Eternulo per sia graco bonvolis voki al si nian fratinnon Fazekas Mária Katalin”, li poste komencas sen antaŭa averto, kun okulo al la memorslipo. “Mária Katalin estis virino en la florado de sia juneco, la juvelo de siaj proksimuloj, kaj al ni ne facilas kompreni, ke ŝi ne plu restas inter ni. Tamen ni ne demandu kial; ni fidu kaj certu, ke la Sinjoro havas intencon pri ĉio, en ĉiuj siaj agoj kaj decidoj. Ni kune kantu...”

Jen li altigas la okulojn laŭvice rigardante tiujn, kiuj staras ĉirkaŭe, la patron de Marika, kaj János, kaj iom pli fore la patrinnon kaj la fraton. Liaj okuloj revenas al János, kaj li demandas:

“Ĉu vi konas *Ho, Sinjor’ per Via Graco*?”

Neniu ion diras, kaj li daŭre gapas al János. Supozeble li pensas, ke tiu estas la plej proksima funebranto, edzo aŭ fianĉo de Marika, kaj tio ja estas tute erara, preskaŭ tute erara. János grakas.

“Pardonu, sed mi kredeble konas nenium el viaj kantoj, hm, mi volas diri himnoj. Mi estas katoliko.”

Tiam la pastro nenion plu demandas sed ekkantas per hezitema voĉo. Ankaŭ la patro movas la lipojn, sed kiu vere



ekkantegas, tiu estas la frato. János ne scias, ĉu tio estas precize la ĝustaj vortoj kaj melodio, tamen Ernő ja volas kanti al sia mortinta fratino, tio evidentas. János aŭskultas lian fortan, relative ĝustatonan voĉon. Estas terure kaj malkompreneble. Simple ne eblas imagi lin iam seksperforti sian dekkvarjaran fratineton.

Poste sekvas la vortoj, kiuj ĉiam aŭdiĝas en kinofilmoj kaj televido.

“Vi estas polvo kaj refariĝos polvo. La Sinjoro Jesuo Kristo revivigos vin en la lasta tago. En la nomo de l’ Patro, Filo kaj Sankta Spirito, amen.”

La pastro ŝutas iom pli da tero sur tiun, kiun Imre jam antaŭe ŝutis, kaj jen ĉio pretas. Li mansalutas ilin ĉiujn, enpakas siajn biblion kaj kapoton kaj ekpaŝas for de tie tra la pluveto. Imre akompanas lin ĝis la atendanta taksio, eble por pagi ĝin. La patrino trenas kun si la fraton; tio impresas kurioze; li almenaŭ duoble tiel grandas kiel ŝi kaj ŝajne preferus resti ĉe la tombo, sed kiam ŝi tiras, li tamen sekvas. La pedelo kaptas sian fosilon kaj ekstaras atendi kun senpacienca mieno. János ŝatus ion fari, reciti preĝon, eble en latino, kvankam ĉi tie sendube tio ne konvenus. Ĉiuokaze li nenion latinan memoras, krom *mea culpa*, *mea maxima culpa*, kaj li ne certas, ĉu tio konvenas.

Do li eliras tra la kradpordo, plupaŝas laŭ la vilaĝa ŝoseo kelkcent metrojn ĝis la tria lago, tiu kun la strando. Tie li sidiĝas sur forgesita benko gapante suben inter siajn piedojn dum kelka tempo. Poste li klinas sin malantaŭen al la rompita dorsapogilo kaj rigardas al la lago. Li sentas la pluvon palpi lian frunton per malpezaj fingretoj, preskaŭ karese. Ĝi malrapide fluas laŭ liaj vangoj, malsekigas la lipojn. Ial li imagis la pluvakvon sala, sed ĝi gustas je absolute nenio. Sur la lago li vidas la densajn gutojn fari retan desegnaĵon sur ĝia surfaco. Jen ŝi desegnis lin staranta kun akvo ĝis la kruroj, kaj jen en tiu plumbe griza akvo ili plaŭdadis antaŭ jardeko, kiam ili ĵus renkontiĝis. Marika en sia ruĝa bikino, kaj li, kiu provis iom palpi ŝin sub la akvosurfaco. Sed ŝi eskapis de li tie en la akvo, kaj

nun ŝiaj cindroj kuŝas en tera kavo. Li dezirus ankoraŭ havi ĉe si almenaŭ tiun ruĝan bikinon.

# Diana en lunlumo

2009

Ŝi devas esti Diana, sed tio ne prosperas al li. Unue la lumo estas malbona. Li kovras la fenestrojn kaj aranĝas lampon oblikve super ŝi, sed la rezulto estas tro malluma. Tio pensigas pli multe pri bordela sceno ol pri arĝenta lunbrilo karesanta la ĉastan korpon de l' diino, kaj kiam li altigas la meĉon, la damnita lampo haladzas ĝenante lian koncentriĝon. Li devus havi elektron! Al diablo, kiel do eblus pentri Dianan sen elektra lumo?

Krome estas io pri ŝia pozo. Jen ŝi staras kun unu kruro antaŭ la alia, la kapo levita, la rigardo gvatanta pri ĉasaĵo kaj kun lia promenbastono en la etendita mano. La bastono rolas kiel pafarko – li ne havas tion en sia rekvizitaro, sed li povos pentri ĝin laŭ sia interna imago. La tuto aspektas iom kabarede pro tiu promenbastono kaj ŝia nuda korpo, tamen ne tio estas la plej terura, sed ŝia mieno, kvazaŭ ŝi rigardus lin kun indulga amuziĝo.

“Rigardu foren, Aŭgusta”, li diras. “La diino gvatas al cervo inter la arboj.”

Ŝi ĵetas al li rigardon kaj poste turnas la okulojn al alia parto de la ateliero, kie forlasitaj toloj, gipsaj fragmentoj kaj ĉia rubo kunpuŝiĝas kolektante polvon. Sed al kukolo, ĉu ŝi nun jam mienas ironie? La diablo prenu ĉiujn virinojn! Iufoje li pensas, ke la Eternulo konfuziĝis modlante la virinon, ĉar evidente Li blovis animon absolute senan de ĉia artosento en tiun grandiozan korpon.

Cetere estas io fuŝa ankaŭ pri la korpo de Aŭgusta. Certe, ĝi estas bela kaj bone flegita, kaj ŝi sendube ne aĝas pli ol dudek kvin, tamen troviĝas io tie, kio ne kongruas kun lia ideo pri Diana.

Li paŭzas kaj glutas etan viskion, faldas pecon de la fenestra kovrilo por ke radio el taga lumo forlavu la etoson de buduaro.

“Nu, do ni povas rekomenci”, li poste vokas.

Vane. Neniu Aŭgusta videblas. Li paŝas en la kuirangulon kaj pluen sur la tegmentan terason. Jen ŝi staras, pli-malpli kovrita de farboplana pentrista kitelo, kiun li devus jam forĵeti, fumante maldikan cigaron de iu malmultekosta marko. La diablo prenu fumantajn virinojn! Kiam ŝi etendas la brakon por forskui cindron, ĉiu ajn ĉirkaŭanto povus admiri ŝiajn nudajn ŝultrojn kaj la supron de ŝiaj mamoj. Vere, ne troviĝas aliaj ĉirkaŭantoj ol kolomboj sur la tegmentaj firstoj, sed tion ŝi ne povas scii.

“Tuj mi estos preta, kaj vi povos daŭrigi”, ŝi diras suĉante la tabakan fumon kun maldeca mieno.

Li jam petis ŝin diri al li sinjoro Lundén, sed ŝi ignoras tion. Krome ŝi direktas al li impertinentan rigardon ŝajne esprimantan, ke lia kreado amuzas ŝin sed apenaŭ signifas ion seriozan.

\* \* \*

Ili sidas en eleganta kafejo, ĉiu kun sia grogo. Brorsson kiel ĉiam havas vaporon en la kapo.

“Kara amiko, ne permesu al modelino tirani vin! Vi devas malsovaĝigi tiun katinon. Ĉu vi jam posedis ŝin?”

“Certe ne. Oni devus neniam konfuzi kreadon kun erotiko.”

“Stultaĵo. Zorgu fari tion, poste vi trovos ŝin komplezema kaj konsentema. Ŝi ja ne estas senkulpa knabino? De kie vi akiris ŝin?”

“De Palmkvist.”

“Bone. Do vi trankvile prenu kion vi volas. Tiu virkoko postlasas neniun virgecon, se li povas tion eviti. Sendube tion ŝi atendas, ŝi pensas ke tiel devas esti. Do, dum vi nenion faras tiudirekte, ŝi supozas ke io mankas al viaj naturaj instinktoj. Regalu ŝin per Marsala vino kaj migdalaj biskvitoj, poste vi

amindumu ŝin ĝisfunde. Nun ni prenu ankoraŭ drinkon. Pri kio vi nuntempe okupiĝas? Ĉu pri Diana, vi diris?”

“Prave. En arbaro sub lunbrilo. Se mi nur sukcesos aranĝi la lumon super ŝi.”

“Ne ĝenu vin pri tio. Gravas la interna lumo, ĉu ne, kaj tiun vi ja havas, kolego. Vi hazarde ne bezonus faŭnon en via arbaro?”

“Ne. La sola afero kiu mankas al mi estas pafarko.”

“Tion mi ne disponas. Vi do devos fidi je la sagoj de Amoro.”

\* \* \*

Vilhelm Lundén kun certa maltrankvilo decidis provi tion, kion proponis lia delonga konato Edvard Brorsson. Ne por kontentigi tiun, ĉar li vere trovas la ideon malaprobinda. Sed li ne povas lasi la aferon pasi kiel antaŭe. Por ke iam realiĝu lia granda Diana en lunlumo, la malbeno devas esti iel dissolvita. Li tamen ne emas iri absolute en la brido de sia amiko, do li rezignas la Marsalan kaj anstataŭe aĉetas botelon da ĉerizvino. Li supozas, ke tiu plaĉos al Aŭgusta.

“Ho, kiel dolĉa”, ŝi diras, tamen plu trinketante la rubenruĝan trinkaĵon.

Sed ŝi ne volas gustumi la konfititajn pirojn, kiujn li proponas.

“Mi ne tre ŝatas tiajn sukeraĵojn.”

“Aŭgusta, ĉu vi scias, kia figuro estas Diana?”

“Mi memoras ke vi nomis ŝin greka diino. Jen sendube kial devas esti nudaĵoj.”

“Ĉu vi do jam konatiĝis kun la antikva mitologio?”

“La artisto Palmkvist montris al mi kelkajn. Unu Venuson, kaj ankoraŭ iujn, mi ne memoras la nomojn, sed ili estis tri damoj.”

“Eble la tri graciaj.”

“Sendube tiel ili nomiĝas”, diras Aŭgusta trinkante la vinon. “Ili estis tri nudulinoj, kvankam pentritaj laŭ la sama modelino. Ŝi estas Lovisa Hansson el la cigarvendejo de Ran-

dell. Sed li pentris tri malsamajn vizaĝojn sur ili, por ke la sinjoroj ne rekonu ŝin, se ili venos en la vendejon. Tamen la korpo estas ŝia, de ĉiuj tri.”

“Do ni esperu, ke la sinjoroj ne rekonos tiun.”

Ŝi ekridas kaj levas kontraŭ li sian montrofingron.

“Nun vi parolas tro maldece, mi trovas. Lovisa estas bona knabino. Ŝi estas tiu, kiu proponis al mi pozi antaŭ Palmkvist.”

Lundén replenigas la glasojn. Strange, kiel nun facilas babilu kun la knabino. Nur la pentrado iras malglate. Pli frue hodiaŭ li faris novan provon, tamen li interrompis ĝin pro mal-espero kaj anstataŭe surtabligis la vinon. Nun Aŭgusta sidas en lia malnova pentrista kitelo plena de makuloj. Ŝi metis unu kruron sur la alian, kaj la karno ĉirkaŭ ŝia genua faldo estas blanka kaj glata. Ĝi aspektas agrable mola.

“Diru, ĉu mi rajtas fumi?” ŝi demandas.

“Ĉi tie ne. Estas tro da olefarbo kaj terebinto kaj toloj en la ateliero. Sed mi ŝtopos mian pipon, kaj ni iros sur la tegmenton.”

Antaŭ iom da tempo pluvis, kaj nun la vespera suno rebrilas de la ladaj tegmentoj. La kolomboj sidas babilante en siaj kutimaj lokoj. Klakado de hufoj kaj tintado de pasanta fiakro sonas de la suba strato. Ili staras silente. Li ne memoras iam ajn antaŭe fumi kun virino, kun glaso da vino enmane.

Ŝia eta cigaro finiĝis kaj ŝi eltrinkas la lastajn gutojn el sia glaso. Li klakas per la pipo kontraŭ defluilo por malplenigi ĝin. Ili reeniras kune.

\* \* \*

Post kelkaj tagoj li rezignas la lampon kaj permesas al la taglumo trafi ŝin deflanke. Devas esti senkaŝa plendluno, neniu romantika klarobskuro. La promenbastonon li anstataŭigas per peniko, kiu malpli draste ĝenas la etoson.

Li jam devas pretigi ĉi tiun tolon. Atendas lin aliaj ideoj, Aleksandro kaj la Gordia nodo, Apelles kaj la ŝuisto, kaj ankorau aliaj. Sed nun temas pri Diana. Li pentradas senlace.

Aŭgusta ne plu mienas ironie, jen almenaŭ unu bona rezulto. Eble do Brorsson pravis. Sed prefere ne estu tro da paŭzoj en la kreado. Li ne intencas lasi kateni sin. Hieraŭ vespere ŝi eĉ ne reiris hejmen. Estis tro malfrue, tro mallume eksterdome, ŝi asertis. Sed hodiaŭ li zorgos fini ĝustatempe. Ŝi ne rajtas saboti la arton. Morgaŭ unu lasta pozado, poste li povos pretigi la pentraĵon sen ŝi. La pafarkon, la arbaron, la lundiskon kontraŭ malhelblua nokta ĉielo – por fari tiujn li ne bezonos Aŭgustan.

Nun ŝi staras surterase kun sia ĉiama eta cigaro. En liaj nazotruoj restas tiuodoro de la lasta nokto. Li turnas la stablon al la fenestro, dum minuto fermas la okulojn kaj lasas la vizion traflui lin. La fiero, ĉasta Diana kun sia blanka haŭto kaj la levita arko en nokta arbaro, lumigata de blublanka, pura lunlumo. Poste li malfermas la okulojn.

Jen la bildo rekte kontraŭ li. Ne eblas eskapi de ĝi. Ĝi estas bone pentrita – li lertas pri sia metio – sed ĝi ne estas Diana. Ĝi neniam estos Diana. Ĝi estas Aŭgusta, rozkolora, kontenta Aŭgusta, iom vaporanta pro amorado, kun rigardo kiu ŝajnas al li plena de atendoj. En tiuj okuloj troviĝas neniu cervoĉaso. Plenigas ilin sopirado je domo kaj hejmo kaj edzo kaj idoj, kaj okulangle eta cigaro en la krepusko.

Li prenas la tolon for de la stablo, portas ĝin al la fora fino de la ateliero, metas ĝin kontraŭ muron, kun la dorso eksteren. Poste li sidiĝas sur seĝo staranta tie. Li fermas la okulojn pensante Aleksandro. Eble Palmkvist konas iun junulon kun la ĝusta korpo. Pecon da ŝnuro li sendube havas, kiun eblos nodi. La glavo, bone, tiu do estos la promenbastono. Ĝi estos mirinda verko. Nur unu afero maltrankviligas lin. Kion diros pri tio Aŭgusta.

*La supra novelo estis unue publikigita en La Espero n-ro 5-6, 2010.*

# Verda ondado

2009

Verdaj montetoj ondas, ruliĝas super vin, volvas vin en sian litkovrilon el herboj;odoro de ŝafa fekaĵo vaporas el la grundo, el la herboradikoj kaj la pisplenaj littukoj; la fundo grincas kaj ekŝanceliĝas kiam la sofolito lanĉiĝas de kajo el fendita cemento kaj ekdrivas malsupren sur la klara akvo de Viŝeo, kiu baldaŭ miksiĝos kun la ŝlima Tiso kvazaŭ gutigante glaciakvon en absinton. Rusta pikdrato laŭlonge de la limo ŝiras al vi la dekstrajn vangon kaj orelon; sango gutas suben sur la kusentegaĵon kaj estas sorbata de la tero, de la herba felo malalte mordita de cent mil ŝafoj kun grasa, malpura lano. Kaj jen, meze inter la ŝafoj paŝas ĉefanĝelo kun bastono enmane, anĝelo en mise sidanta jako kaj grasmakulita kravato pendanta oblikve, eble pro tro da tostoj je la imperiestro kaj la venko kaj la nacio kaj raso kaj partio kaj diktaturo de l' proletaro. Sed super la anĝelo kaj ŝafoj kaj putraj kabanjoj de paŝtistoj kaj forgesitaj tomboj kaj tankobstakloj el betono ondas montetoj, verdaj deklivoj, veluraj dunoj en terodora ondado kiu vin hule lulas, dormigas, brakumas, kiel faris al vi neniu ajn patrino.

Vizaĝo de sorĉistino penetras en vin.

Osta mano tiras vian brakon, trenas, volas deŝiri viajn membrojn; ŝi anhelas en vian vizaĝon per spirado el fuzelo kaj rubakvo kaj putraj dentoj.

Kion do ŝi grakas? Ĉu pastron? Ŝi volas alvenigi pastron, sed de kiu speco, ŝi demandas; ĉu li estu katolika sacerdoto, aŭ reformita hungaro en kompleto, aŭ ĉu plenbarba rutena popo; ŝi devas ekscii al kiuj vi apartenas; ĉi tie en la cigana kvartalo eblas ĉio ajn; eble vi estas turko aŭ judo; ĉu ŝi venigu rabenon en kaftano; el kiu speco vi do estas?

La sorĉistino regardas sian litanion kvazaŭ ŝi riskus sian propran saviĝon; ĉu ŝi ne komprenas, ke ne ekzistas pastro



kapabla savi vian animon; tra tiu pordego vi devos paŝi senakompane, en la mallumon kiu atendas vin transe.

Vi volas forigi ŝin per mangesto, krii al ŝi, ke ŝi iru tien, kie ŝi hejmas, sed la mano kaj la lango egale velkis kaj paralizigis; vi senpovas; vi devas toleri ke ŝi murmuras preĝojn aŭ malbenojn aŭ sorĉformulojn, ekbruligas haladzajn vaskandelojn, aspergas vin per sankta akvo aŭ lavlesivo aŭ ftiza salivo, kaj minacas vin per lasta sanktoleado.

Fine ŝi fadas; vi ne scias ĉu vi plu rigardas aŭ jam fermis la okulojn; la sorĉistino drivas en nubon, en fumon; tio estas karbofumo el la vagonaro, kiu portas vin for en la mondon, al Sziget kaj Szatmar kaj Vieno; la littukoj iĝis grasaj kaj fulgaj pro lokomotiva fumo; la sofolito batadas glitante trans la reljuntajn; dudek helerojn, kvindek helerojn ili kantadas; onklo Tudor promesis, ke vi gajnos propran monon montrante vian arton en foiroj kaj gastejoj, kaj li helpas al vi eviti trompojn; onklo Tudor scias kiel la aferoj pasas inter urbanoj kaj ŝtelistoj kaj ĉiaspecaj kanajloj.

Estas li, kiu edukis vin, kiu zorgis pri vi, kiu donis al vi vestaĵojn surkorpe kaj ŝuojn surpiede, maizkaĉon kaj ŝafan fromaĝon enstomake, kiu instruis al vi ĉion, kion paŝtisteto bezonas scii. Sed de kie vi ricevis vian kalkulan povon, vian misteran talenton, tion scias nur la diablo, li diras, kraĉante trans la ŝultron; ĝi ne povis veni de via patrino, Ana Oros, kiu mortis naskante vin, nek de via patro, laŭdire ĉevalŝtelisto el Bukovino, vagabondo kaj trompisto, kiu miksis sian propran rutenan galimacion inter la vortojn, tiel ke nek diablo nek anĝelo povis kompreni, kion li diris. Vi ne scias, kiel Ana parolis kun li; ankaŭ ŝi neniam frekventis lernejon; same kiel vi ŝi restis ekster ĉio; fine ŝi eĉ ne ricevis tomboŝtonon super si en la vilaĝa tombejo, en tombo kiun vi neniam vidis; eble ĉio estus alia, se vi lernus reciti preĝon kaj povus ekbruligi olean lampon por ŝi, kiel aliaj orfoj. Eble vi evitus drivadi tra la mondo kiel strathundo, almozante pri ostoj, trinkante malfreŝan akvon el vojflakoj, ĉasante skabiajn hundinojn, kiuj akceptas vin sen eĉ turni la kapon por rigardi, kiu ĉifoje suriras ilin.

Kiel malfacilas nun la spirado.

Jen laboro same peza kiel tordi tukojn kun ŝaflakto el-premante la selakton, por ke restu nur kazeo, kiu iĝos fromaĝo. Ĉu el vi io restos post ĉi tiu tordado, kiu premas el vi la vivon?

Tamen vi ne povas ĉesi; vi devas ensuĉadi aeron, trude levi la kavan bruston. Kiel facile ŝajnas tutsimple lasi tion, akcepti ke jam sufiĉas; jam okdek jarojn vi spiradis freŝan montaran aeron, haladzojn el ŝimaj keloj, fetoron de kadavroj, fumon el brulegoj, parfumon el bordeloj vi suĉis en tiujn ŝiritajn pulmojn; ĉu ne jam sufiĉas? Sed ne eblas ĉesi; vi ne plu volas, tamen vi ne povas ĉesigi tion; estas malbeno; la vivo ankoraŭ ne lasas vin, kvankam ĝia preno kramfas.

Plej aĉas tamen la trakea muko; jen tenaca amara koto kiu nek subiras nek eliĝas; ĝi simple restas tie farante el ĉiu pena spiro sibladon, glugladon, rasladon; vi bezonas tusi, sed la brusto ne plu havas forton por unu plia spasma.

Kiom ĉi tio daŭros? Se tiu virinaĉo almenaŭ donus al vi ion, rimedon por fini la turmenton, sed ŝi jam estas for, la sorĉistino kiu ĵus estis ĉi tie, aŭ ĉu tio estis en iu alia jaro? Vi ne memoras ŝian aspekton, ne scias kiu ŝi estis, vidas nur ŝian ombron kiu brulmarkis vian okulfonton, kaj sentas la guston, la guston de inaĉo sur via seka kaj bruligita palato.

Kion ŝi volas de vi, tiu virino?

Ĉu vi ŝuldas al ŝi ion; kion ŝi postulas de vi?

Vi havas nenion plu por doni al ŝi; baldaŭ ĉiuj ŝuldoj kaj postuloj estos nuligitaj; ĉiuj viaj nombroj ŝrumpos en nulon; kion ŝi do povos postuli de vi? Vian animon? Ne, vi ne havas animon; eble vi havis ĝin kiel knabo, animon same vivan kiel tiuj de ŝafo kaj hundo kaj vulpo kaj nizo kaj hirundo, sed poste ĝi pereis, velkis kaj mortis pro malsato; la animo bezonas nutraĵon same kiel la korpo, sed vi ne nutris ĝin; vi lasis ĝin mortiĝi.

Do kion la sorĉistino deziras de vi?

Kial ŝi troviĝas jen ĉe via flanko; la lasta persono kiu vidis vin, la lasta kiu lasos vin, kiun vi lasos? Ŝiaj ostaj manoj kun

bluaj riverdeltoj kaj brunaj galaksioj; palpas vin fingropintoj kun dikaj ungoj vakse flavaj, sed vi nenion sentas; vi ne povas distingi, ĉu ŝi estas el karno kaj sango aŭ el via angoro kaj timo.

Tiom da virinoj jam palpis vin, ĉiuspecaj damoj, sinjorinoj kaj putinoj.

La virojn obsedis via cerbo, la talento de l' mirinfano, via fulmrapida kalkularito; kiom faras dumil sescent dek kvar oble okmil naŭdek naŭ; vi aranĝis la nombrojn en viajn figurojn, turnis la rigardon internen, grupigis kaj regroupigis, kaj jen vi havis la rezulton, devis nur observi la figurojn unu post la alia kaj signi ilin, nomi ilin; dudek unu milionojn cent sepdek mil sepcent okdek ses, kaj poste atendi la gastejstron aŭ kiu ajn ŝvitadis super anilina krajono kaj malpura paperpeco, atendi ke li atingos kalkuli la taskon por konfirmi, ke vi diris ĝuste.

Aŭ kiom faras okcent dek naŭ oble sin mem.

Sed la virinoj, ili rekte trarigardis vin; ili volis provi kion vi enhavas krom ĉiuj ĉi nombroj; ili donis al kukolo la kalkuladon; ili kalkulis kun aliaj aferoj. Kiomaĝa vi estis, kiam la unua gastejstrino levis la jupojn kaj ensuĉis vin inter siajn grasajn femurojn, en kamero malantaŭ la trinksalono, dum ŝia edzo tie ekstere kalkuladis rekordan gajnon de la vespero kaj la servistoj helpis porti eksterdomen la gastojn, kiuj plenebrie endormiĝis kaj ne plu povis trinki; ĉu vi estis dekkvaraĝa? Ĉu tio estis en Klausenburg aŭ Großwardein?

Vi ne memoras, ne povas distingi ŝin de la aliaj; vi memoras ne tiujn, kiujn vi posedis, aŭ kiuj posedis vin, sed la filinojn, la knabinojn, kiuj renkontis vian rigardon dum unu sekundo kaj poste rigardis suben en la sinon; la strikte protektatajn, kiujn oni ŝparos por riĉa edziniĝo kaj ne forĵetos al vaganta paŝtisteto kun magia talento ricevita de potenco nekonata kaj nekoninda. La knabino kun harplektaĵoj en Rozavlea, tiu kun malhelaj bukloj en Negrești, la leporlipulino en Szeged, ĉiuj kiujn vi neniam rajtis tuŝi. Kaj tiuj, kiujn vi vidis de fore; la vualita en veturilo sur Burgring, tiu en loĝio de Jardin

d'Hiver. Kaj la nobelinoj de bienegoj en siaj hereditaj roboj el tinemordita silko, kiuj des pli vastigis sian dekoltaĵon ju pli malfruis la vesperkunveno, ĝis glacie malestimaj lakeoj forkondukis ilin, dum oni sendis vin en la servistan domaĉon, donante al vi pagon el manpleno da trivitaj moneroj. Ilin vi nun memoras, pli klare ol ŝin kiu venis al vi en la dormejo plena de puloj kaj poste foriris nudpiede kun mano fermita ĉirkaŭ la kvinkrono.

Kiam vi laste tenis enmane veran moneron, solidan arĝentan moneron?

Ĉu entute plu troviĝas tiaj? Aŭ ĉu oni kolektis ilin, konfiskis ilin, fandis ilin; posedi arĝenton sendube estas malpermesita, kontraŭrevolucia? Sed kiu do povos meti du arĝentajn monerojn sur viajn palpebrojn kiam venos la momento? Vi ege hontas esti tiel malriĉa; almenaŭ du etaj dek-heleroj devas ie trovebli, la plej malgranda brila monereto por la prambileto; almenaŭ tiom ja devas resti funde de iu kesto?

Kiom da mono amasiĝis ĉe vi, kiam vi plej furoris; grandaj pezaj taleroj, kronoj, pengoj, ŝilingoj, florenoj, ĉiaspecaj valutoj; vi ja tenadis faskojn da monbiletoj enmane, ankaŭ tiajn kun vicoj da nuloj, milionojn kaj bilionojn kaj plie.

Tio estis tempo, kiam nombroj perdis sian signifon.

Ankaŭ la valoro de via arto ŝrumpis. Ĉu pro tio? Ĉu la inflacio kaŭzis, ke neniuj plu volis spekti kaj aŭskulti vin, kiam vi sekundrapide kalkulis encape? Eble la homoj perdis sian estimon al nombroj, kiam ili devis pagi bilionojn por paketo da aĉaj cigaredoj, el kiuj tabako por milionoj elfalis, se oni tenis ilin vertikale.

Aŭ ĉu konkurencaj logaĵoj konkeris de vi la merkaton; ŝlagristinoj kantantaj pri eterna amo, sportistoj forkurantaj de ĉiuj aliaj, politikistoj promesantaj justecon kaj venĝon? Kion vi povis oferti kompare kun tiuj; dek sesmil kvarcent okdek tri oble naŭmil ducent ok?

Ne; nova epoko postulis novajn artojn, neonon kaj erotikon kaj vivospacon kaj rashigienon kaj ĵazon kaj klasbatalon

kaj popoldemokration, sed tion vi ne povis kalkuli; do vi devis kalkuli tagojn kaj monatojn kaj jarojn en korektlaborejo; vi liberiĝis kaj malliberiĝis, liberiĝis kaj kaŝis vin kaj refoje malliberiĝis; klase fremdiĝa kontraŭsociemo, reakcia vagabondemo; mallonge, vi ne plu apartenis. La tempo pasis kaj lasis vin post si; tion vi ne povis kalkuli.

Nun mallumiĝas en la ĉambro.

Pezaj nigraj kurtenoj vualas la fenestrojn, vian liton, volviĝas en viajn okulojn barante la elvidon.

Sendube proksimiĝas vespero, sed de kiu tago, de kiu monato kaj jaro, tion vi ne memoras; en kiu urbo vi troviĝas, kion vi faradis dum la lastaj jaroj; ne, ĉio kovriĝas de tavoloj el polvo kaj fulgo; ĉu vi restadas sola kiel ĉiam; ĉu iu funebros pro vi, fermos viajn okulojn, metos ikonon sur vian kavan bruston kaj plektos viajn manojn super ĝi; tion vi ne scias.

Iam vi estis edzo; certe vi vivadis kun edzino, sed kiam tio estis, dum kiom da tempo kaj kie vi kunvivis; kiu ŝi estis, ĉu ŝi plu vivas aŭ jam mortis; jen memoroj kiuj paŝis pluen en la mallumon antaŭ vi; vi povas nur esperi, ke ŝi memoras vin, se ŝi ekzistas, kaj se vi refoje renkontiĝos.

Ŝia nomo ne plu gravas; certe ŝi estis senhejma kaj orfa kiel vi; ankaŭ ŝi sendube vagabondis farante artifikojn antaŭ homoj pretaj malŝpari moneron por burleskaĵo kaj spektaklo; ŝi kantis kaj dancis, kaj kio sekvis post tio, jen afero de alia estado, de sonĝo, de mondo mortinta kaj entombigita, same kiel baldaŭ estos vi.

Kiu ŝi estis?

Kie ŝi nun troviĝas? Ĉu ankaŭ ŝi kuŝas en sennoma tombo ĉe la fino de kota vilaĝa vojo, kovrita de altaj herboj kaj sovaĝaj rubusoj? Aŭ ĉu ŝi forlasis vin; ĉu ŝi nun vagadas kun iu alia? Kaj de kie venis la naŭza virinaĉo? Ĉu tiu estas ŝi, kiu transformiĝis, de princino en bufon? Viaj demandoj amasiĝas, sed baldaŭ ili ĉesos ronĝi vin.

Kiel ŝi povis vivadi kun vi dum jaroj sen lasi spuron en vi? Aŭ ĉu ŝi ekzistis nur en via imago, en viaj kalkuloj; ĉu ŝi estis

produkto de serio da nombroj tiel grandaj, ke eĉ vi ne povis eldiri ilin? La memoro pri ŝi malaperis, same kiel via kapablo forlasis vin, kiam oni finfine sidigis vin sur lernejan benkon por lerni knedi literojn en vortojn kaj ciferojn en nombrojn. Tiam la vortoj falsiĝis kaj la nombroj mutiĝis; ili perdis siajn formojn kaj parencecojn, fremdiĝis, malamikiĝis, mortis.

Jes ja; la nombroj mortis en vi, kaj jen vi mem vidas kavon malfermiĝi en la tero; la nigra humo rikanas al vi.

Nur la verdaj montetoj lumas rekte tra la ombro de morto, lumas pli klare ol iam. Jen vi paŝis sur nudaj piedoj, malsata knabeto, kaj jen vi nun paŝas, grimpadas supren-malsupren laŭ la deklivoj, fajfas vokante la hundojn, klopodas gardi la ŝafojn, kvankam pri tio respondecas onklo Tudor.

La ŝafoj estis la unuaj, kiujn vi kalkulis, kaj nun ili estos la lastaj; vi vidas ilin dividi sin en ĉiam novajn grupojn, tamen ĉiam sume egalajn, kaj baldaŭ vi vidos en okulangulo, ĉu ili ĉiuj restas, aŭ ĉu iu erarvadis, eskapis, estas ŝtelita, forpelita de fremdaj hundaĉoj, ŝirita de lupoj.

Tudor kaj liaj kamaradoj distriĝas per via kalkula talento; vi ne scias legi, nek skribi ciferojn, sed enkafe vi vidas la nombrojn kiel grupojn, triangulojn, kvarangulojn; vi persone konas ĉiujn nombrojn kaj scias kiel ili transformiĝas, duobl-iĝas, dividiĝas. La paŝtistoj donas al vi pli kaj pli malfacilajn taskojn, sed baldaŭ ili ne plu povas kontroli, ĉu vi kalkulis ĝuste, kaj jen la momento, kiam Tudor lavas viajn magrajn krurojn, striajn de malpuraĵo kaj sango el kulpikoj, prenas vin malsupren al vilaĝa trinkejo, kie vi perlaboras la unuajn monerojn. Se vi kalkulos diligente, vi eble kolektos tiujn du dekhelerojn, kiujn vi bezonos por viaj palpebroj kuŝante en la ĉerko.

Ie iu recitas ion.

Voĉo gurdadas, monotone, senemfaze, ne zorgante ĉu vi aŭskultas aŭ ne; voĉo knara, malklara kvazaŭ pro vino.

Vi ne aŭdas kion li murmuras, en kiu lingvo; ĉu temas pri vortoj sencohavaj aŭ pura abrakadabro; sendube iu venigis

kuraciston aŭ pastron, sorĉiston aŭ almozantan monaĥon, eble aktoron, kiu balbutaĉas sian duone forgesitan monologon el klasika tragedio aŭ vanta vodevilo.

Egale; li ne povas multe malutili.

Inter du spiroj vi vidas, ke li estas anĝelo kun levita glavo; vi glutas atendente la baton, sed ĝi ne venas; li plu ĉantadas; la glavo estas incensujo; el sonorileto aŭdiĝas alta tintado, kaj fumo sinuas supren al la rompitaĵ gipsfiguroj de la plafono.

Kelkaj vortoj penetras en vian menson; gratia plena, peccatoribus, spiritu sanctu; ŝajne oni trenis drinkeman pastron ĉi tien el la plej proksima preĝejo; nu en ordo, ne plu restas al vi forto por ridi, sed dum mallonga tempo vi sentas kvazaŭ vi iomete ripozus inter la turmentaj spiroj, kiujn vi devas plu trenadi, kontraŭvole. Laodoro de incenso igas vin sopiri; vi ne scias je kio.

Nun li desegnas krucon sur vian frunton; vi ne sentas ĉu per oleo aŭ akvo aŭ porka sango; ne gravas, vi sendube trapasos la pasportan kontrolejon kun aŭ sen elirvizo surfrunte; certe ne restas longa vojo por paŝi; eble vi povos petveturi sur ĉevaltirata ĉaro portanta arbotrunkojn, kiu iros samvoje.

Ankoraŭ vi vidas nenion, nur nigran pordegon en egale nigra mallumo; tamen imagu, se transe troviĝas io, se vi elpaŝos en verdan lumon, plandos nudpiede sur humidan herbejon, kuros per knabaj piedoj supren al la montaro, vete kun Foku kaj Lupu, la paŝtistaj hundetoj; unu lastan fojon kalkulos la ŝafojn aŭ eble ne plu devos kalkuli ilin; neniam ajn plu devos kalkuli ilin, sinkos suben kun la vizaĝo alteren, inter ranunkoloj kaj rumeksoj kaj ŝafaj fekaĵoj; enspiros la verdon.

Ne, vi ankoraŭ nenion vidas; ĉio plu nigras; io sonoras en viaj oreloj, tondras kiel vartrajno sur ponto el feraj traboj; la pastro kun glavo malaperis; vi ensuĉas lastan raspan enspiron, iras en la mallumon kun vastaj okuloj, palpserĉas antaŭ vi, falas, ankoraŭ nenion vidas; trablovo de friska aero tremigas vin, kaj jen, jen vi flaras herbojn kaj grasan lanon kaj humon; jen vi finfine trapasas kaj revenas hejmen, kaj ĉio estas mallumo kaj humo, mallumo kaj humo kaj radikoj el malalte

morditaj herboj.

*La supra novelo gajnis la 2an premion de la branĉo Prozo en la Belartaj Konkursoj de 2010.*

*Ĝi estis unue publikigita en Beletra Almanako n-ro 9, 2010.*



# Secuko

2010

Mi ege feliĉas pro tio ke mi havas ŝin. Ĉiutage, kiam mi revenas hejmen de la laboro, ŝi atendas min sidante sur la sofo, mia Secuko.

“Kiel pasis via tago?” mi kutime demandas. “Ĉu vi sopiris je mi?”

Poste mi iras ĝis ŝi kaj sidiĝas apude, brakumas ŝin, karezas ŝiajn ŝultron kaj antaŭbrakon, kisas unue ŝian vangon, poste la buŝon. Ŝia haŭto estas mole glata. Ankaŭ la haroj tre belas, kaj ili aŭtentas. Ŝi havas rektan nigran hararon, kiel ĉiuj japaninoj, aranĝitan iom paĝistile. La nazo estas malgranda. Kelkfoje mi kisas ŝian nazpinton.

“Vi ja ne kontraŭas tion?” mi diras. “Mi amas vin, Secuko.”

Preparinte ian simplan vespermanĝon, mi kutime venigas ŝin al la tablo. Mi ŝatas iom babili kun ŝi manĝante. Ŝi restas sidanta dum mi lavas la manĝilaron, sed poste ni reiras en la salonon kaj sidiĝas sursofe. Kelkfoje mi havas ion farendan, sed mi ĉiam unue ŝaltas la televidilon, por ke ŝi ne sentu sin tro sola. Se troviĝas io spektinda, io pri la naturo aŭ pri antikvaĵoj, mi ĉiam televidas tion kune kun Secuko.

Semajnfine ŝi surhavas belan veston. Komence mi havis problemetojn, aĉetante vestaĵojn por ŝi. Mi alportis kelkajn aferojn tro grandajn. Malfacilas kunvenigi ŝin por butikumi. Kaj mi ne konis la nomojn de ĉio, kion bezonas virino. Sed mi lernas. Efektive mi jam tre ĝuas butikumi por ŝi, ege pli ol por mi mem. Nun la vestejo jam plenplenas, kaj same la komodo. Nature, ŝi ne tre eluzas la vestaĵojn.

Alvenante ĉe min, ŝi surhavis nur simplan blankan subrobon el kotono. Ŝi alvenis en granda ligna kesto, kaj mi timis ke ŝi estu vundita dum la vojaĝo. La tutan vojon el Japanio.

Sed estis neniŭ problemo. Ŝi kuŝis bone protektita en sia kesto. Ili talentas pri tiaĵoj, la japanoj.

8 400 eŭrojn mi pagis, plus la transportkoston. Multaj homoj sendube opinius, ke tio estas tro. Precipe se ili neniam renkontis Secukon. Sed mi trovas la prezon tute akceptebla. Tion, kion ŝi donas al mi, ne eblas kalkuli en mono.

Ŝi ne havis familian nomon venante al mi. Do mi iom guglis, kaj nun ŝi nomiĝas Kawayama. Tio signifas Rivermonto, same kiel la mia. Do ni nun havas la saman familian nomon. Eble ridinde, tamen mi ĝojas pro tio. Ni ja estas familio, Secuko kaj mi. Nuntempe eĉ gejoj rajtas edziĝi, sed Secuko neniam iĝos mia laŭleĝa edzino. Tio cetere ne gravas. Gravus nur ke la sentoj aŭtentas.

Ĉe la leterujo mi alnajlis slipon kun 'Secuko Kawayama', kvankam ŝi malofte ricevas poŝtaĵojn. Nur bildkarton de temp' al tempo, kiam mi vojaĝas pro mia laboro.

Ili estas mirindaj metiistoj, la japanoj. Ŝi havas molan kaj belan silikonon sur skeleto el ŝtalo kun flekseblaj artikoj. Kaj aŭtentajn harojn, kiel dirite. Ĉio el ŝi estas mane farita. Ŝi altas cent sesdek centimetrojn, tute konvene. Kompreneble ŝi havas japanajn trajtojn. Ŝi estas svelta, ankaŭ ĉe la koksoj. La mamoj estas mezaj, nek tro grandaj nek tro malgrandaj. Ŝia ŝugrandeco estas tridek kvin. Eĉ la piedfingroj estas individue tajlitaj.

La pubon oni produktas laŭ du alternativaj modeloj. Unu pli laŭnatura, kaj alia pli oportuna el higiena vidpunkto. Tiu estas forigebla, por ke oni facile povu tralavi kaj purigi ĝin. Mi ne scias precize kiel, ĉar mi kompreneble elektis la laŭnaturan. Ĝi havas tufeton el veraj haroj. Cetere ĝi eble ne estas precize formita en ĉiuj detaloj. Ŝi ekzemple ne havas klitoron, se mi bone komprenas, sed tion ŝi ja ne bezonas.

Tamen la seksumaj aferoj ne tiom gravas. Mi plej ŝatas rigardi ŝin, dum ŝi sidas vestita en sia bela vesto, tiel ke mi povas brakumi kaj karesi ŝin. Plej plaĉas al mi ŝia mieno. Ŝi aspektas timida, sufiĉe serioza, kun mallevita rigardo. Kvazaŭ

senkulpa. Ŝi ne ŝajnas vere timanta aŭ malĝoja, sed eble iomete nostalgia. Ne surprize, ĉar ŝi estas tiel longe for de sia origina hejmo. Sed mi faras ĉion por ŝi, por ke ŝi bonfartu kaj sentu ke ŝi hejmas ĉe mi.

“Tiel estas, ĉu ne, Secuko? “ mi kelkfoje diras. “Vi jam bone hejmas ĉi tie, ĉu ne?”

Mi ege ĝojas, ke ŝi ĉiam troviĝas ĉe mi. Mi vere feliĉas kunvivi kun mia Secuko.

# Tri legendoj

2011

## Ferioj

La Eternulo ĵus etendis sin sur kumuluso super Britio (Dio neniam dormas, sed fojfoje li fermetas la okulojn por revii pri eskapo el la granda respondeco), kiam lia konscio perceptis, ke la lasta homo jam ĉesis kredi. Plenigis lin granda malpleneco. Ja li sciis de ĉiam, ke venos tiu tago, sed kiam ĝi nun alvenis, li sentis egan elreviĝon. Ŝajnis al li, kvazaŭ prenonte la lastan ĉokoladan bombonon, li trovis la skatolon jam malplena. Tamen ĉi-foje eblis kulpigi neniun alian, kio estas unu el la malavantaĝoj de ĉiopovo.

La dua sento, kiu trafis lin, estis senpeziĝo. Plu neniuj tedaj preĝoj, plu neniuj troigitaj atendoj, plu neniuj senesperaj demandoj pri *kial*. Li decidis unufoje en tiel longe, kiel li povis memori – kaj Dio nur malofte forgesas ion – fari ferian vojaĝon. Dirite, farite. Sen vicatendado por enskribiĝi, sen ajna sekureckontrolo, jen li jam sidis sur nuboj pli suda kaj pli pufa, ĝuante la sunon kaj trinketante Margarita-koktelon. Nun la dorlotitaj etulaĉoj devos jam zorgi pri si mem; por unu fojo ili mem respondecu pri siaj aferoj. Estos interese vidi, kiel prosperos al ili.

Nu, tamen ne estos troege interese. Li jam sciis, kio okazos, kio estas unu el la malavantaĝoj de ĉioscio. La temploj pleniĝos je pulbazaroj kaj diletantaj rokbandoj. La religiaj militoj provizore malintensiĝos, ĝis la homoj elpensos novajn kialojn buĉi kaj ekstermi unu la alian. La sonorila sonado kaj la vokado al preĝo daŭros kiel antaŭe pro kulturhistoria respekto, kvankam neniuj plu aŭskultos ilin. La pilgrimado tute ne estos tuŝata, ĉar ĝin jam delonge akaparitis la bonfartiga industrio.

Trafis lin la ideo, ke la homoj eble ne rimarkos diferencon. Sendube ĉefe li mem suferos pro la ŝanĝo. Kvazaŭ efektive li estus tiu, kiu perdis sian kredon.

Kompreneble li povus rekomenci de l' komenco. Sed li sentis neniun tian emon. Kiom pri la grandaj klopodoj, kiuj necesos? Kaj kiu do dankos lin? Krome en lia aĝo; ne, li sendube lasos tion. Eble la tuta kreaĵo ne estis tre bona ideo jam dekomence. Tamen, ĉiu ja rajtas fari eraron, ĉu ne, eĉ se li estas ĉiopova. Sed ne necesas persisti. Unufoje ne gravas.

La Eternulo klinis sin dorsen, iom pufigis la nubon kaj mendis novan koktelon. Ĝi gustis bone, kiel li sciis de ĉiam.

## Gvidi kaj decidi

Virgulino Maria, la sankta dipatrino, balanciĝante kiel anaso venis en la ofican ĉambron de l' Eternulo (jam de du mil jaroj la Virgulino suferis pro malkuniĝo de la pelvaj ostoj).

“Mi ne aŭdis vin frapi”, diris la Eternulo.

“Vi devintus antaŭscii, ke mi venos”, diris la Virgulino.

“Kompreneble mi sciis. Nu, kion vi do volas?”

“Vi jam scias.”

La Eternulo ŝovis siajn okulvitrojn fruntan viŝante siajn lacajn okulojn. Vidi ĉion vere konsumas la okulojn. Li ne komprenis la virinojn. Kiomfoje necesos diri al ili ion, antaŭ ol ili enkapigos ĝin?

“Ni jam estas triopo en la estraro”, li diris. “La homoj atendas, ke ni estu triopo. Ili ne deziras kvaropon.”

“Ne estos pli ol triopo”, diris la Virgulino. “Tiu senkorpa spirito ja estas nevidebla jam de mi ne scias kiom da tempo.”

“De Niceo, en 325 post via akuŝo.”

“Do jam temp' está por ĝia pensiĝo, laŭ mia humila opinio.”

“Ŝajnas al mi ke vi iomete trotaksas la estraron. Efektive ne okazas tre ofte, ke ni ion vere decidus. Estas ĉefe reprezentado.”

“Jen ĝuste kial ŝanĝo estas bezonata. Efektive mi notis kelkajn punktojn, kiujn mi intencas surtabligi. Aferojn, kie ni iom postrestas.”

La Eternulo suspiris. Li sciis, ke li havos nenium trankvilon antaŭ ol ŝi ekhavos laŭ sia volo. Nek poste. Liberigi de la Sankta Spirito estos nura komenco.

“Vi eble intencas, ke ni iĝu feministoj? Agantoj por daŭripova mondo? Kun genra perspektivo?”

“Ne provu ironii, tio ne konvenas al vi.”

“Bone, vi devos doni al mi iom da tempo, eta Marinjo. Mi promesas pensi pri la afero. Ne rapidu tiel terure.”

Ŝi paŭtis, tamen kolektis la jupojn kaj anaspaŝis elen. La Eternulo malstreĉiĝis. Ĉio jam pasis, por ĉi tiu fojo, sed li sciis, ke ŝi neniam rezignos. Ne dum eterna eterno. Ŝi revenos, jen certaĵo.

Ĉio efektive komenciĝis jam kiam la knabo estis juna. Ŝi maltrankvilis pri kio okazos al li.

“La kamaradoj mokas lin”, ŝi plendis. “Ili nomas lin putinido kaj mi ne scias kio.”

“Vi konas knabojn, ĉu ne? Ili intencas nenion malican.”

“Kaj nun ankaŭ la etuloj scivolas, kio mankas al ilia granda frato. Mi volas klarecon, tutsimple. Ĉiu infano rajtas je patro, ĉu ne?”

“Certe, sed nur la patrino povas scii la plenan veron pri tiu afero.”

“Tamen mi memoras nenion, mi estis tute senkonscia.”

“Nu, la afero estas iom komplika, vi komprenu”, diris la Eternulo. “Mi ne povas klarigi la detalojn.”

“Mi komprenas, se vi ne volas pagi la alimenton.”

“Vi tamen ja ne vivas en mizero, ĉu?”

“Nu, ni travivas. Tamen ne estas ĝuste!”

“Kiel do ĝuste? Ne ĉio en ĉi tiu mondo estas tiel simpla.”

Iom post iom li komprenis, ke tiu afero pri la patro de ŝia ido estis nura preteksto. Kion ŝi vere volis, tio estis influi. Kune gvidi kaj decidi. Sed li ne deziris truditan egalecon en la estrado. Kaj post kiam aperis tiu spirito, kvazaŭ el botelo, ĉiuj lokoj estis jam okupitaj.

Kompreneble ŝi estis kompatinda, pro tio kio okazis al la filo. Ne povas esti bone por patrino, se ŝiaj idoj malprosperas. Sed malgraŭ ĉio, kiom longe ŝi remaĉos tiun historion? Kial ŝi ne povas simple pluri?

La Eternulo decidis labori mallonge vendrede. Vere li devus entute ne labori, nek vendrede, nek sabate, nek dimanĉe, por respekti ĉies sentojn. Se diri la veron, ĉio ĉi jam delonge tedis lin.

“Eĉ diablo ne povus servi al ĉiuj”, li murmuris forlasante la oficejon.

## Funda purigo

Iutage la Eternulo ekiris inspekti la kreaĵon. Kiel kutime akompanis lin Sankta Petro. Certe li povus iri sola, se necese, kaj tio eble eĉ estus pli trankvila, tamen estas pli amuze se eblas imponi al iu. Iu kiu diras ”Mia Dio, kiel bele!” en la ĝustaj lokoj.

Sankta Petro siaflanke trovis la teron jam iomete makulita. Plasta rubaĵo en la maro, radioaktivaj rosmaroj, kaj krome klimatsanĝo kiel mustardo post la manĝo.

Jes ja, ĝi estas bela”, li diris. ”Sed ĉu vi ne pensas, ke ĝi restus pli freŝa se vi forigus la homojn?”

“Mi provis tion je la antaŭa inundo”, diris la Eternulo. “Sed mi iomete enuis. Certe, ili ja estas ĝenaj, tamen ĉu ne estas io kortuŝa en la tretado de piedetoj?”

La maljunulo jam sentimentaliĝas, pensis Sankta Petro. Sed laŭte li diris:

“Ĉu vi kalkulis, kiom kostas al vi la erodado? Eble vi devus igi Gabrielon fari SWOT-analizon?”

La Eternulo ne komentis tion. Ja li estis ĉioscia, tamen li preferis ne kompreni tian abrakadabron.

Vaginte dum kelkaj jardekoj ĉirkaŭ la Mediteraneaj bordoj, ili alvenis ĉe la Persa Golfo.

“Ĉu ne ie ĉi tie vi iam havis tiun eksperimentan kultivejon?” diris Sankta Petro.

“Vi pensas pri la ĝardeno de Edeno. Ne, tion vi miskomprenis. Ĝi situis en Centra Afriko, kaj tio okazis antaŭ ege longa tempo. Tiuepoke mi havis ambicion. Sed vi scias, oni rezignas kiam superas la trudherboj.”

“Do vi devus ŝprucigi ion sur ilin.”

“Vi estas freneza, tion mi ne kuraĝus. La verduloj malbenus min. Sed mi efektive celis la homojn. Pro eraro ili disvastiĝis amase, antaŭ ol mi havis tempon finbredi ilin.”

“Ja vi mem forpelis ilin, ĉar ili ne lasis viajn fruktojn kreski en paco.”

“Sensencaĵo. Diablo scias, kiu elpensis tion. Ne, mia intenco estis evoluigi specion elteneman kaj facile bredeblan, sed ĉio fiaskis antaŭ ol mi atingis tien. Kaj jen mi lavas al mi la manojn.

Sankta Petro ĵetis rigardon al la manoj de l’ Eternulo. Ili ŝajnis pli-malpli puraj, sed sufiĉe sulkoplenaj. La maljunulo ja estis ege pli aĝa ol li. Ĉu li neniam emeritiĝos?

Ili plu pasumis kaj post iom venis al laboriga deklivo. Ĝi estis Himalajo.

“Domaĝe, ke vi ne sukcesis fari pli ebene ĉi tie”, diris Sankta Petro kun plenda tono.

“Bone, bone. Ne ĉiu povas esti perfektulo”, diris la Eternulo sidiĝante sur la grundon. “Cetere estas bone havi apogon al la dorso, se oni volas iomete ripozi.”

Post tio li klinis sin dorsen kaj endormiĝis. Sankta Petro senpacience atendis kelkan tempon. Poste li decidis hejmeniri por provizore transpreni la tuton. Estis tempo por vere funda purigo.



La maljunulo dankos min, li pensis. Espereble mi sukcesos tute forigi ĉiujn parazitojn antaŭ ol li vekiĝos.

*La supra novelo gajnis la 1an premion de la branĉo Prozo en la Belartaj Konkursoj de 2012.*

*Ĝi estis unue publikigita en Beletra Almanako n-ro 15, 2012.*

# Vasta domo

2011

Fraŭlino Okalu vivis en malnova vasta domo kun sia hundeto. Kiam ŝi promenis ĝin, ŝi ĉiam kunportis pistolon en sia mansako, por protekti sin de rabistoj kaj seksatencantoj. Ŝi ne posedis kartoĉojn por la pistolo, tamen, ŝi diris, tion ja ne scias la krimuloj. La hundo, kiun ŝi nomis Gigant-Nana Pitono, estis duone flava, duone je koloro de malseka koto. Ĝi estis malgrasa, ĉar fraŭlino Okalu ne estis riĉa. Ĝiaj oreloj pendis, kaj la voston ĝi iam perdis en milito pri hundino. Kial ŝi nomis ĝin je tiu bizara nomo, ne estas konate. Eble pro ĝia kutimo kvazaŭ serpente bani sin en la tera polvo. Ĝi estis bastardo, kompreneble.

Ankaŭ la fraŭlino estis bastardo. Ŝia patro estis flughavena oficisto, kiu neniam edziĝis. La patrino estis servistino, kiu servadis la sinjoron de pluraj jaroj, kiam ŝi neatendite gravediĝis. Kiam la filino estis kvinjara, ŝia patrino mortis dum vizito al sia hejma vilaĝo sur la ĉeftero. De tiam la filino kreskis ĉe parencoj.

Sed mortis ankaŭ la patro, kaj fraŭlino Okalu heredis lian vastan domon. Al la heredaĵo apartenis ankaŭ peco da tero ekster la urbo kun dudeko da olepalmoj. La enspezoj de tiuj palmoj, diradis fraŭlino Okalu, sufiĉis nek por vivi nek por morti. Tamen ŝi plu vivis, iele-trapele. De temp' al tempo ŝi devis vendi iun el la belaj mebloj hereditaj, kaj iom post iom la interno de la domo alprenis aspekton iomete dezertan.

Kiam Gigant-Nana Pitono estis naŭjara kaj fraŭlino Okalu trideksesjara, ŝi iutage promenis ĝin kiel kutime. Tio signifis, ke la hundeto malvigle paŝadis tien-reen sur la strato, dum ŝi staris en la ombro sub akaĵuarbo. Ŝi rigardis supren, por esplori ĉu jam maturas iu frukto, kaj tiam ŝi ekaŭdis motorbruon. Sekvis sono de bremsado, kaj subite akra ekjelpo. Kiam ŝi rigardis tien, ŝi ekvidis ŝarĝaŭton, kiu haltis stratmeze. Ĝia ŝoforo

rigardis eksteren tra senlaca flanka fenestro. Vidante la hundon agoniantan sur la stratpolvo, li elaŭtiĝis, prenis krikon de sia aŭto kaj levis ĝin por fini la suferadon de la besto.

Ĉion ĉi vidis fraŭlino Okalu de sub la arbo, do ŝi elsakigis sian pistolon kaj alkuris, vokante “Pitono! Pitono!”, ĉar en tia kriza momento ne estis tempo por eldiri ankaŭ la antaŭnomon. La ŝoforo ŝtoniĝis, gapis al la virino alproksimiĝanta, lasis sian krikon, saltis en la aŭton kaj plenrapide forveturis.

La hundo estis evidente mortanta, kaj ĝia mastrino povis nur per larmantaj okuloj atesti ĝian agonion. Kiam ĝi jam foriris al la ĉielo de hundoj, ŝi penseme trenis sin hejmen por funebri.

Posttagmeze la policoficiro Sanfelipe vizitis fraŭlinon Okalu. Li formale sciigis al ŝi la akuzojn.

“Vi pafis al sinjoro Dembe kaj ŝtelis lian krikon. Feliĉe vi ne trafis lin.”

“Kiel trafĵi, se mi ne havas kuglojn?”

“Ĉu ne? Kiel do vi pafis? Ĉu blanke?”

“Mi neniel pafis! Nur minacis, por protekti min. Vi povas priserĉi la domon, sed vi trovos eĉ ne unu kuglon.”

“Nu, eble vi foruzis ĉiujn.”

“Kaj kia kripo? Mi ne estas ŝtelisto!”

“Kriko, tio estas. Temas pri levilo. Radlevilo de la aŭto.”

“Por kio mi uzu tiun? Mi neniam posedis aŭton. Mi estas honesta persono, sed malriĉa. Kaj tiu sovaĝulo mortigis mian hundeton!”

“Nu, laŭ li, la hundo kuris senbride sur la strato.”

“Kaj li veturis senbride. Imagu, se mi ne starus sub la ŝirmo de arbo, li sendube mortigus ankaŭ min.”

“Hm.”

La policoficiro eksilentis por rigardi ĉirkaŭ si en la domo. Ĝi ne estis tre riĉe meblita, kaj ĉio aspektis iom trivita.

“Sinjorino, ĉu vi sola loĝas ĉi tie?”

“Jes.”

“Ĉu neniuj edzo?”

“Ne, kial do?”

“Nu, pro nenio. Ĝi estas vasta domo.”

“Mi heredis ĝin de la patro.”

“Bone. Ĉu vi povus montri al mi kie okazis la afero?”

Sanfelipe konfiskis la pistolon kiel pruvojn en la polic-enketo. Poste li veturigis fraŭlinon Okalu la tricent metrojn ĝis la krimloko. La kadavro de Gigant-Nana Pitono plu kuŝis meze de la strato, sed la kriko jam estis for. Apud la hundo videblis spuroj de radoj.

“Sinjorino, vi ne povas lasi ĉi tie vian hundon. Tio ne estas higiena.”

“Kion fari? Mi ne havas aŭton. Vi diru al la murdisto, ke li venu forporti ĝin per sia aŭtego.”

Sanfelipe ĵetis al ŝi rigardon sed diris nenion. Li paŝis en rondo zorge ekzamenante la grundon.

“Kie vi staris pafante?”

“Kial vi ne aŭskultas? Mi jam diris, ke mi ne povus pafi, ĉar mankas kugloj.”

“Nu, mi ne trovas kuglingojn. Bone, mi esploras ĉu iu najbaro aŭdis pafojn aŭ ne. Do, provizore vi povas reiri hejmen, sinjorino. Tamen, mi eble revenos morgaŭ, do bonvolu ne forlasi la urbon.”

“Kien mi irus? Sed vi devas reveturigi min hejmen.”

“Ĉu vi ne povas paŝi? Ĉu vi ne jam unufoje venis ĉi tien kun la hundo?”

“Sed vi lacigis min per viaj demandoj.”

La policoficiro Sanfelipe efektive revenis en la sekva tago, kiam fraŭlino Okalu regalis lin per refreŝiga malvarma legomsupo.

“Mi povas ĝojigi vin, sinjorino, per tio ke la najbaroj ne aŭdis pafojn.”

“Kompreneble. Ĉu mi povas rricevi la pafilon?”

“Ankoraŭ ne. Se ni fermos la enketon, mi redonos ĝin. Tamen ĝi malmulte valoras sen kartoĉoj, ĉu ne?”

“Tute ne. Sufiĉas montri ĝin kaj la murdistoj forkuras.”

Pri la kadavro de Gigant-Nana Pitono oni ne plu diskutis. Eble iu besto jam forportis ĝin por festeni.

La kazo do estis pli-malpli solvita. Ne okazis pafado, kaj se pensi pri la ŝtelo de kriko, nu, evidente la ŝoforo mem lasis ĝin surstrate. Malgraŭ tio la enketo ŝajne daŭris, ĉar Sanfelipe revenis ne nur unufoje, sed ofte, kaj ne nur por gustumi la supon de fraŭlino Okalu. Ankaŭ malfrue vespere oni vidis lian aŭton parkumitan ekster la granda domo. Fine, eĉ matene ĝi foje staris tie.

“Kara, se temus nur pri mi, ni povus geedziĝi morgaŭ”, iutage diris Sanfelipe matenmanĝante. “Sed mia unua edzino kaj la infanoj sendube turmentus vin senkomplete. Kaj nia domo estas tro malvasta, nur duono de la via.”

“Ne zorgu”, respondis la fraŭlino. “Mi ne volas forlasi mian domon. Tamen...”

“Tamen kio?”

“Nu, kiel vi vidis, ĝi bezonas kelkajn etajn riparojn. Jen la malavantaĝo, kiam ne estas viro en la domo.”

Sanfelipe glutis sian kafon kaj rigardis ĉirkaŭ si.

“Nu, ni vidu”, li diris. “Ankaŭ mia propra domo bezonas atenton. Sed eble ion mi povos fari.”

Pasis kelkaj monatoj. Sanfelipe pasigis pli kaj pli da tempo en la domo de fraŭlino Okalu.

“Ĉi tie estas paco kaj trankvilo”, li diris. “En mia domo mi neniam trovas pacon, nek spacon. Ĉiam la infanoj bruas, mi devas bati ilin pro iu bubajo, la edzino grumbas, petas monon. Se mi sidigas por ripozi en mia ŝatata brakseĝo, tuj ŝi venas por purigi per la polvosuĉilo kaj plendi, ke ŝi bezonas novan. Aŭ ŝi proponas inviti mian bopatrinnon por pasigi ĉe ni kelkajn semajnojn, kaj mi devas ripeti al ŝi, ke nia domo ne havas spacon por gasto. Tiam ŝi ofendiĝas, dirante ke ‘panjo ne estas gasto’, kaj jen la kverelo jam ekas.”

“Do, ĉu vi trovas mian domon malpura?”

“Tute ne, mi ŝatas ĝin.”

“Tamen mi timas, ke la tegmento tralaskos akvon, kiam komenciĝos la pluvoj. Ĉu vi povus esplori tion?”

“Certe, certe. Mi jam diris, ĉu ne?”

Efektive Sanfelipe planis multajn laborojn kaj plibonigojn. Precipe li promesis ripari la tegmenton. Sed mankis tempo. Li devis persekuti la krimulojn de la insulo, kaj de temp’ al tempo ankaŭ montri sin ĉe sia familio. La tago havas nur dek du horojn, kaj same la nokto.

Do, baldaŭ komenciĝis la pluvoj, kaj vere akvo tralikiĝis, komence gute, poste riverete. Nu, provizore oni metis sitelojn, ĉar ne indis labori surtegmente dum la pluvado daŭris. Necesis ĝisatendi la sekan sezonon.

Antaŭ ol finiĝis la pluvoj, tamen ekis nova stadio en la vivo de fraŭlino Okalu. Nova heredonto ekĝermis.

“Nu, jen surprizo”, diris Sanfelipe. “Mi apenaŭ atendis, ke vi plu...”

“Do vi trovas min maljuna, ĉu ne?”

“Tute ne, kara. Sed ĉi tio iom komplikas la aferon. Tamen ne timu, ĉar mi estas honestulo. Mi zorgos pri la infano. Ĝi ne suferos pro manko de io.”

“Mi mem povas zorgi pri la filo. Tamen infano bezonas multajn aferojn, kaj mi estas malriĉulino.”

“Ne timu, ĝi ne suferos.”

Suferon tamen spertis la fraŭlino. La akuŝo estis longdaŭra kaj doloriga. La akuŝistino de la kvartalo helpis ĉefe per admonoj kaj riproĉoj, kaj per iom malfruaj edifaĵoj pri tio, ke Dio punas malmoralulojn. Ŝi ne permesis al la onta patro eniri la domon dum tiuj horoj. Cetere li ne vere faris provon eniri. Finfine tamen naskiĝis bela knabineto kun forta voĉo heredita de Dioscias-kiu, eble de la avo. Fraŭlino Okalu decidis nomi ŝin Serena, kvankam laŭ la opinio de Sanfelipe la nomo sendube devus esti Sirena.

La fraŭlino sendis sian policoficiron al diversaj butikoj por akiri necesajn bebaĵojn. Se diri la veron, tio embarasis lin. La urbo estis negranda; imagu, se iu vidus lin kaj irus gratuli lian

edzinon! Do, li longe gvatadis ekster ĉiu butiko antaŭ ol eniri, por eviti surprizajn renkontiĝojn. Malgraŭ tio, lia ĉefo unufoje kaptis lin kiam li metis pakon da vindaĵoj en la kofron de sia aŭto.

“Nu, do la familio daŭre kreskas! Brave!” laŭtis la ĉefo, kiu atingis sian postenon pro antaŭa talento pri detektivado.

“Ne, ne. Estas por parenco”, respondis Sanfelipe. Kaj tio ja ne estis mensogo.

La domo de fraŭlino Okalu vere estis vasta, kiel plurfoje ripetis Sanfelipe. Malgraŭ tio ĝi tute pleniĝis de laŭta beba kriadado. Do la vivo en la domo ne plu estis tiel serena, kiel antaŭ Serena.

Sanfelipe plu planis ripari la domon de fraŭlino Okalu, tamen por ne ĝeni la bebon li iom prokrastis la laborojn. Estus ja domaĝe vekti la knabinon, se ŝi jam endormiĝis, kio tamen malofte okazis, kaj same domaĝe estus malhelpi al ŝi endormiĝi.

Fakte li ne plu pasigis tiom da tempo ĉe siaj amatino kaj filino.

“Mi havas respondecojn al mia familio”, li diris. “Mi estas honestulo kaj ne povas forkuri de miaj leĝaj devoj.”

Li tamen plu vizitadis fraŭlinon Okalu, daŭre alportante bezonataĵojn.

Iutage forta vento kaptis la tegmentorandon de la dekstra alo de la domo kaj disrompis la muron. La suba ĉambro tamen apenaŭ plu estis uzata. Iam ĝi estis la dormoĉambro de la servistino, kiu iĝis la patrino de fraŭlino Okalu.

“Feliĉe, ke difektiĝis nur tiu ejo”, diris Sanfelipe. “Vi vere ne bezonas ĝin. Prefere mi tute forigu tiun rubon, ĉu ne?”

Tiun laboron tamen necesis prokrasti, ĉar intertempe denove alvenis pluva sezono.

Kun la paso de tempo Serena kreskis kaj iĝis knabino pli konforma al sia nomo. Malgraŭ tio ŝia patro plu havis respondecojn pri sia leĝa familio, kiu rabis la plej grandan parton de lia atento. Tamen de temp’ al tempo li vizitis fraŭlinon Okalu kaj

Serenan, kaj kutime li alportis ion bezonatan aŭ utilan. Krome la dudek olepalmoj daŭre donis etan profiton. Do, nur je esceptaj okazoj fraŭlino Okalu devis vendi malnovan meblon el la heredaĵo. Cetere, apenaŭ valoris la penon porti al foiro tion, kio nun restis.

Serena tre ŝatis la vizitojn de ŝia patro kaj tuj saltis en liajn brakojn, kiam li elaŭtiĝis ekster la domo. Ŝi neniam renkontis siajn pli aĝajn gefratojn en lia leĝa familio. Lia edzino ĉiam ŝajnis nenion scii pri lia dua familio, kvankam la urbo estis malgranda kaj kutime ĉiuj konis ĉiujn klaĉaĵojn pri la samurbanoj.

Multaj infanoj en la kvartalo cetere renkontis sian patron eĉ malpli ofte ol Serena, ĉar la viroj laboris alilande kaj revenis nur unufoje jare, aŭ tute ne. Kaj fraŭlino Okalu ĉiam rakontadis al sia filino pri la avo, klarigante ke tiu dum sia vivo estis grava persono. Kvankam la domo jam estis duone kaduka, ŝi ĉiam ripetadis al Serena, ke iam tiu tuta domo apartenos al ŝi.

“Mi scias”, tiam diris la knabino. “Sed ankaŭ vi povos loĝi en ĝi ĉiam. Ĉar ĝi estas vasta domo.”

Tamen nek Serena nek ŝia patrino povis loĝi en la domo por ĉiam. Kiam Serena estis okjara, trombo trairis la kvartalon, lasante post si larĝan breĉon plenan je rubo. Serena tiumomente estis en la lernejo, kaj fraŭlino Okalu butikumis en la urbocentro. Revenante hejmen, ili trovis nur pelmelon el brikoj kaj rompitaĵoj sur la loko, kie antaŭe staris ilia vasta domo. Ĉar ankaŭ la domoj de la najbaroj ruiniĝis, ili dum du monatoj devis tranokti en la lernejo de Serena. Dume sinjoro Sanfelipe helpis ilin akiri konstrumaterialon kaj dungis du virojn por konstrui novan domon surloke de la rubamaso.

“Vi bezonas tuj havi provizoran ŝirmon”, li diris. “Poste mi helpos vin plivastigi ĝin je okazo.”

De tiam fraŭlino Okalu kaj Serena do vivas en simpla unuĉambra dometo kun tegmento el ondolado. La okazon de plivastigo ili plu pacience atendas, dume memorante sian iaman hejmon, la vastan domon hereditan de la avo de Serena. Se ni



povus viziti ilin, fraŭlino Okalu sendube regalus nin per sia fama malvarma legomsupo, petante pardonon pro la primitiv-eco kaj malvasteco de la domo, kaj promesante plian komforton, kiam ni revenos venontfoje.

*La supra novelo gajnis la 3an premion de la branĉo Prozo en la Belartaj Konkursoj de 2012.*

*Ĝi estis unue publikigita en Beletra Almanako n-ro 15, 2012.*

# Nova amiko de sinjoro Brunner

2011

Bronja maltrankvilas pri sinjoro Brunner. Li iĝis ege silentema. Kaj kien malaperis lia plej bona amiko? Jam de pluraj tagoj ŝi nek aŭdas nek vidas Makson. Sinjoro Brunner kaj Makso loĝas super la apartamento de Bronja kaj ŝia patrino. Ŝi kutimis aŭdi bojadon de temp' al tempo, kiam fremdulo pasis tra la ŝtuparejo. Sed nun ĉio silentas tie supre.

Kio do okazis al Makso? Finfine ŝi simple devas ekscii. Ŝi supreniras al sinjoro Brunner kaj sonorigas.

“Bonan tagon”, ŝi diras iomete fleksante la genuojn, ĉar li ŝatas ke knabinoj riverencu.

“Bonan tagon eta Bronislava.”

“Ĉu Makso ne estas hejme?”

Sinjoro Brunner glatumas al si la mentonon.

”Ne. Li estas for.”

Sinjoro Brunner ĉiam parolas pri sia amiko kiel “li”, kaj Bronja adoptis lian kutimon.

“Kiam li revenos?”

Li rigardas ŝin ŝajne cerbumante pri io.

“Li ne plu revenos. Estonte vi ne devos promeni lin.”

Sinjoro Brunner ne similas sin. Li neniam estis tre babilema, sed nun li ŝajnas pli muta ol kutime. Ili ambaŭ staras tie dum kelka tempo tute silente. Neniuj lacaj piedpaŝoj aŭdiĝas el la apartamento. Neniu alvenas por leki la manojn de Bronja.

“Nu, tamen dankon al vi, Bronislava. Ĝis la revido.”

Poste ŝi aŭdas de panjo, kio okazis. Sinjorino Nĕmeĉková en la fruktovendejo rakontis. Aŭto surveturis kaj mortigis Makson. Bronja trovas timige pensi pri la akcidento. Aperas en ŝi imagoj, kiam ŝi fermas la okulojn; ŝi vidas Makson kuŝantan en flako el sango sub la radoj de granda nigra aŭto. Sed panjo diras, ke tiu hundo ĉiuokaze signifis plejparte ĝenon.

“Ĝi aspektis malsana jam delonge kaj apenaŭ plu kapablis

paŝi. Kompreneble estis malfeliĉa perdo por sinjoro Brunner. Cetere vi devus uzi pli da tempo por viaj hejmtaskoj.”

Tagoj pasas, kaj Bronja ne povas ĉesi pensi pri sinjoro Brunner, kiu nun tute solas en sia malluma apartamento. Efektive ŝi ne scias multe pri li. Li emeritiĝis antaŭ nelonge, sed ŝi ne scias, pri kio li iam laboris. Eble pri muziko, ĉar de temp’ al tempo oni aŭdas lin ludi sian pianon.

Bronja volonte lernus ludi pianon, sed panjo ne havas sufiĉe da mono por tio, kaj la pianon de sinjoro Brunner ŝi ne rajtas tuŝi.

Kvankam li paŝas nebone, li kelkfoje eliras kaj forestas dum kelkaj horoj, precipe sabate. Eble li ie havas amikon aŭ amikinin. Sed ŝajne neniu lin vizitas, eĉ ne parencoj. Kaj nun ankaŭ Bronja ne plu sonorigas ĉe li por promeniĝi Makson.

Subite frapas ŝin ideo: Nova hundo! Sinjoro Brunner perdis sian plej proksiman amikon, do ŝi devas havigi al li novan. Kial ŝi ne tuj pensis pri tio? Tiel li iĝos malpli sola, kaj ŝi de temp’ al tempo povos promeniĝi la novan hundon. Eble li iĝos tiel ĝoja kaj dankema, ke li demandos, ĉu ŝi volas ludi lian pianon.

Sed kiel tio eblos? Ankaŭ hundoj kostas monon. Ne indas eĉ pensi pri bestovendejo. Necesos trovi iun, kiu ricevis hundidojn kaj ne scias, kion fari pri ili. Eble iuj miksrasaj idoj – kredeble ili kostas malpli.

Kiam Bronja vizitas sian patron semajnfine, ŝi demandas ĉu li konas iun, kiu havas hundidojn.

“Hundidojn? Kion vi faros pri hundidoj?”

“Iu konato de mi bezonas hundon.”

Ŝi preferus ne paroli kun paĉjo pri sinjoro Brunner. Ŝi volas konservi lin por si mem. Cetere paĉjo ne interesiĝas kaj ne respondas, ĉu li konas hundidojn. Estus agrable vere babili kun paĉjo sabate vespere. Ŝi renkontas lin tro malofte, kaj panjo ĉiam maltrankvilas pri ĉio. Panjo eble pensas, ke Bronja nenion kapablas. Paĉjo ne estas tiel stulta. Li komprenas, ke ŝi

jam ne estas infaneto.

Sed nun li ne havas tempon babili kun ŝi. Vespere vizitas lin lia amikino Eva. Ŝi ne kutimas je infanoj kaj trovas Bronjan malbone edukita. Kiam Bronja enlitiĝas, Eva ankoraŭ restas, sed tio ne tre gravas. La ĉefa afero estas, ke ŝi ne restos morgaŭ, kiam paĉjo kaj Bronja matenmanĝos. Efektive li tiam ne tre parolemas, sed ŝi ŝatas esti duope kun li. Ŝi povos verŝi al li pli da kafo kaj alporti la ĵurnalon de sube. Estas amuze havi patron por prizorgi.

Aŭtunaj pluvoj ekas, kaj oni pli kaj pli malofte vidas sinjoron Brunner. Li kaj Makso mankas al Bronja. Ŝi ne havas tro da amikoj kaj ofte estas sola. Sed ŝi jam komencis esplori pri nova amiko por li.

Ekster la fruktovendejo ŝi ekparolas kun viro, kiu lasis sian bokseron tie aĉetante oranĝojn. Ŝi neniam antaŭe vidis lin, sed lia hundo estas tre bela. La viro kaj Bronja interbabilas promenante tra la placo kaj laŭ la strato Přemyslovská, dum komenciĝas pluveto.

Li demandas pri aferoj, kiuj interesas plenkreskulojn. Kiun lernejon ŝi frekventas kaj simile.

“Chelčického, en la kvina klaso.”

“Ehe. Ĉu vi havas bonajn instruistojn?”

“Nu, ne tro.”

La viro ridas.

“Ĉu tiel. Vi havas altajn postulojn, ŝajne. Bone, tio ne malutilas.”

Dum kelka tempo ŝi rajtas teni la ŝnuron, sed por esti certa li samtempe tenas ŝian brakon.

“Ĉu vi havas ankaŭ hundidojn?” ŝi esperplene demandas.

“Hundidojn? Ne, amiketo. Pavel estas fraŭlo, same kiel mi.”

“Bedaŭrinde.”

“Eble. Cetere, kiel vi nomiĝas?”

“Bronislava.”

“Ehe. Mi estas Jan Vašek. Ĉu vi havas gefratojn?”

“Ne. Ni estas nur panjo kaj mi.”

“Ĉu tiel. Neniu patro?”

Bronja rigardas de sube al Jan Vašek.

“Li ne vivas kun ni.”

“Nu, nu. Tiel okazas.”

Li iom pripensas kaj grakas.

“Mi rakontos ion. Ankaŭ mi havas filinon. Ŝia nomo estas Věra, sed ankaŭ ŝi ne loĝas ĉe mi. Efektive mi ne vidis ŝin, de kiam ŝi estis tute malgranda. Nun ŝi aĝas dek kvin. Ne, deksex-jara ŝi jam estas.

Bronja ne respondas. Ne tre plaĉas al ŝi, kiam Jan rakontas pri sia filino. Ŝi ne volas pensi pri aliaj patroj kaj iliaj filinoj. Antaŭ ol ŝi iras viziti paĉjon unufoje monate, panjo admonadas ŝin kion ne fari, kaj poste ŝi pridemandas ŝin kion ŝi faris ĉe paĉjo. Kelkfoje ŝi ekhavas stomakdoloron, pensante pri tio.

Ili jam ĉirkaŭiris domangulon kaj venis en etan flankstraton, kaj jen la celo. Baldaŭ poste ŝi sidas sur benko en malriĉe meblita vestiblo.

Jan Vašek regalas per limonado kaj serĉas ion en komodo.

“Jen vidu. Jen mia knabino kiam ŝi aĝis dek tri. Tio estas proksimume via aĝo, ĉu ne?”

“Ne, mi estas nur dekjara.”

“Nur dek? Sed vi estas granda kaj... ŝajnas memstara. Ankaŭ beleta vi estas. Preskaŭ kiel mia Věra.

Li ŝovas la fingrojn tra ŝia hararo, kiu estas humida pro pluvo, kaj spiras al ŝi. Li odoras je biero kaj fumo. Pavel kuŝiĝis por ripozi sur malnova plejdo en angulo de la vestiblo. Ĝi snufas.

“Nun mi devas iri hejmen”, diras Bronja.

“Ĉu tiom urgas?”

“Jes, panjo atendas min.”

“Sed vi sendube revenos, ĉu ne? Venontfoje vi povos mem promeni kun Pavel.”

“Jes, dankon. Se panjo permesos al mi.”

“Bone, bone. Nu, ĝis revido, Bronislava.”

Panjo ege koleras aŭdante pri Jan Vašek, kaj tiam ankaŭ Bronja mishumoras.

“Ne iru promenigi nekonatajn hundojn, Bronja!”

“Mi nur volis demandi, ĉu li havas hundidojn.”

“Pro tio ne necesis akompani lin! Vi absolute ne rajtas iri kun fremda sinjoro, ĉu vi aŭdas?”

“Mi ja kutimas viziti sinjoron Brunner.”

“Estas granda diferenco. Li estas nia najbaro kaj bona persono. Ni scias nenion pri tiu viro, kiun vi akompanis.”

Ŝajne ne estos tiel facile, kiel ŝi pensis, helpi sinjoron Brunner. Precipe se panjo intervenos en ĉio.

Iutage Bronja ekscias, ke sinjorino Hubingerová en la apuda domo havas hundidojn. Al ŝia ŝafhundeto Fabiola naskiĝis kvin hirtaj bebetoj. Sed nur la plej proksimaj najbaroj, la familio Kraus, vidis ilin, ĉar sinjorino Hubingerová estas aspra virino, kiu ne societumas kun ĉiu ajn.

Kiel do fari por akiri unu el tiuj hundidoj por sinjoro Brunner? Kompreneble estus plej bone, se li mem irus peti. Sed tio preskaŭ ne imageblas. Bronja ne povas imagi la rezerviĝeman sinjoron marĉandi pri hundido kun la grandkorpa kaj malafabla sinjorino. Ne, por havi rezulton, Bronja mem devos aranĝi ĝin. Kaj se necesas fari ion malagrablan, plej bonas fari ĝin tuj. Ŝi englitas tra la ŝlosita pordo de la apuda domo, kiam iu eliras. Ĝi estas ege pli bela kaj zorge flegita ol ŝia propra domo. En la tria etaĝo ŝi frapetas ĉe eleganta pordo el diversaj lignoj kun kolora vitro.

“Mi petas!”

Sinjorino Hubingerová malfermas nur je fendeto, kie oni videtas ĉenon, kiu sekurigas la pordon. Bronja riverencas kaj klopodas rigardi preter la diketa figuro en violkolora kompleto, sed nek Fabiola nek ties idoj videblas.

“Mi volas demandi pri la hundidoj. Se ili ne jam estas menditaj...”

“Kiu vi estas? Kiel vi trairis la pordon?”

“Mi estas Bronislava Korejsová, mi loĝas apude, en nume-

ro tri. Mi nur pensis...”

“Ne pensu tiom. Prefere zorgu konduti! Mi telefonos al via patrino por diri al ŝi teni siajn nazmukulojn en sia propra domo!”

Bam! La pordo frapfermiĝas tiel ke la ĉeno kraktintas kontraŭ la kadro.

Bronja elreviĝas sed ne rezignas. Oni rigardu ĉion je la hela flanko. Ŝi jam faris ĉion eblan, nun necesos persvadi sinjoron Brunner mem iri tien. Espereble li estos pli ĝentile akceptita ol Bronja.

“Kara amikineto, por kio mi uzu tian harozan aferon?”

“Nu... mi pensis, ke ĝi estos akompano...”

“Akompano, ĉu? Bela akompano. Hundo, kiu makulos la tapiŝojn kaj kurados kaŝi miajn pantoflojn! Kiu vekos min nokte! Kiu volos ludi! Ludi!”

Ŝi sidas sur la ekstera rando de la malmola sofo de sinjoro Brunner. Li mem sidas sur sia brakseĝo tenante kanon kun briltrivita tenilo inter la manoj. La kanon li bezonas elirante, ĉar unu lia kruro estas iomete pli mallonga ol la dua. Aŭ eble pli longa, li neniam certas, kiel li kutime diradas al Bronja kun seriozega mieno, fermante unu okulon.

“Sed... mi pensis ke... kiam Makso...”

Sinjoro Brunner ne petas ŝin ĉesi pensi kaj komenci bonkonduti. Anstataŭe li klopodas klarigi.

“Sendube vi pensis, ke kiam Makso estas for, mi kompanse akceptos netolereblan ŝafhundidon. Ian ŝvabrilon, kiu konsideros min sia ŝafaro kaj klopodos kolekti min en grego!”

Li rigardetas ŝin turnante la kantenilon inter la manoj.

“Nun aŭskultu, Bronislava. Aŭskultu kaj lernu. Makso aĝis dek tri jarojn. Jen sufiĉe alta aĝo de melhundo. Li estis malsana. Li havis tumoron, se vi scias, kio estas tio. Efektive li devus endormiĝi antaŭ kelka tempo. Mi devintus porti lin al veterinaro, kiu donu al li la lastan injekton. Tamen...”

Li turnas sin flanken, ne plu rigardas Bronjan, sed lia rigardo forvagas trans la fenestron.

“Malfacilas disiĝi de bona amiko. Vi certe komprenas tion. Sed tio estas neevitebla. Neniu el ni povos resti ĉi tie eterne, kaj Makso vivis en plusa tempo. Mi estis egoisto, kiu konservis lin tiel longe. Oni povus diri, ke tiu virino, kiu malzorgis rigardi, faris kion ĉiuokaze farus veterinaro.”

Bronja frostotremas pensante pri la kunpuŝiĝo de malmola aŭto kaj la kompatinda Makso.

“Per tio mi ne volas kalumnii virinojn kiel stirantojn. Vi sendube bone ŝoforos, Bronislava. Vi estas bravulo.”

Liaj okuloj ridetas, li etendas la manon kaj rapide glatumas al ŝi la vangon. Poste li denove firme kaptas la kantenilon.

“Kiu kuraĝas frapeti ĉe sinjorino Hubingerová, tiu kapablas fari multon. Sed unue restas al vi lerni kelkajn aferojn. Ekzemple ke ne eblas anstataŭigi malnovan amikon per maledukita balailo!”

Ŝi restas ankoraŭ iom parolante kun sinjoro Brunner, dum krepusko densiĝas en la stratoj ekstere.

“Mi bedaŭras, ke mi ne havas ion konvenan per kio regali junajn damojn”, li diras. “Mi apenaŭ plu memoras, kion mi mem trinkis en tiu aĝo. Pommoston, eble. Nun devas esti kolao aŭ io simila, mi supozas.”

“Ne gravas. Mi ne soifas. Sed...”

Ŝi hezitas. Sed se necesas fari ion malagrablan...

“Mi scivolas, ĉu mi povus provi vian pianon, sinjoro Brunner.”

“Provi mian pianon? Do vi estas pianprovisto, Bronislava?”

“Ne, sed...”

“Ĉu vi entute scias ludi pianon?”

“Ne. Sed estus amuze lerni.”

“Hm.”

Sinjoro Brunner viŝas al si la mentonon rigardante Bronjan kun esplora mieno. Lia supra lipo iomete kurbiĝas. Kredeble tio estas lia maniero rideti.

“Nu, mi ĝojas ke vi havas tian intereson. Mi proponas, ke vi venu al la Domo de Infanoj kaj Junuloj en Havličkovy Sady.



Sabate posttagmeze mi instruas pianludadon tie.”

Ŝi gapas al li. Do jen kion li faras sabate. Pianokursojn!

“Sed ne certas, ke vi tuj ricevos lokon. Kelkfoje estas atendovico, kvankam plej ofte ne tre longa. Gejunuloj hodiaŭ ŝajnas ne tre interesiĝi pri piano. Supozeble devas esti elektraĵ gitaroj. Kaj ne certas, ke vi havos min kiel instruiston. Sed tio ja ne gravas, ĉu?”

“Mi demandos panjon, ĉu mi rajtos.”

Ŝi scivolas, ĉu tio ion kostas, sed ne volas demandi.

“Se vi montros talenton kaj ambicion, ni eble povos reveni al tiu pianoprovado post iom”, diras sinjoro Brunner eĉ pli kurbigante la lipon.

Ŝi ne scias, kion respondi. Efektive ŝi ne certas, kion ŝi aspiras – ĉu pianludadon aŭ sinjoron Brunner. Irante malsupren laŭ la trivita ŝtuparo al sia apartamento, ŝi imagas sin sidi sur pianoseĝeto en lia ĉambro. La dikaj kurtenoj apenaŭ enlasas taglumon. Ŝi disetendas la fingrojn ludante simplan sed belan pecon por komencantoj, dum li staras malantaŭ ŝi tenante ĝuste ŝiajn brakojn kaj ŝultrojn. Ŝi preskaŭ sentas lian prenon ĉirkaŭ la pojnjoj, same kiel li kutime tenas la brilan kantenilon.

Verŝajne ne necesos havigi al li novan hundon. Sed ŝi malkovris unu el liaj sekretoj. Eble sekvos pluaj.

*La supra novelo gajnis la 3an premion de la branĉo Prozo en la Belartaj Konkursoj de 2011.*

*Ĝi estis unue publikigita en Beletra Almanako n-ro 12, 2011.*

# Kiam la vento turniĝos

2011

Foje li malaperas foren. Jen mi staras ekster fermita pordo, frapante sen ricevi respondon. Mi volus alporti skatolon kun laboriloj, elbati la stiftojn el la ĉarniroj, forigi la pordon kaj enkuri, skui lin por sperti, ĉu li plu vivas. Sed mankas al mi iloj sufiĉe efikaj, kiam li sidas ĉi-apude, je tridek centimetroj for de mi, tamen en sia propra spaco.

“Ni baldaŭ alvenos”, mi diras. “Ĉu vi jam ekdeziras lunĉon?”

Neniu respondo.

“Ĉu vi memoras, kiam panjo kaj vi sidiĝis ĉe du malsamaj tabloj en kafejo?”

“Mhm.”

“Ĉu vi sendos al mi la akvobotelon?”

Neniu reago. Mi devas refoje demandi, kaj kiam li donas ĝin, mi devas peti lin malŝraŭbi la ĉapon. Sur ĉi tiuj vojoj ne prudentus fari tion stirante.

Mi ne scias, kial mi menciis Sannan. Tuj post la surteriĝo li telefonis por paroli kun ŝi, sed nun ŝi ŝajne ne plu mankas al li tre multe. Mi demandas min, kio entute mankas al li. Li scias komuniki, se li volas. Mi aŭdis lin kun liaj amikoj. Iufoje li ege parolemas. Mi ja ne plene regas ilian ĵargonon, sed evidente ili mem komprenas unu la alian.

En la aviadilo ĉi tien li ŝajne eniris letargion. Tamen li ne ŝajnas tedita. Se iu enuas, tiu estas mi, kiam mi ne sukcesas kontakti lin. En *Knossós* li tamen ekvivis, kaj ni sufiĉe multe interparolis, plej multe pri la vivo antaŭ tri-kvar jarmiloj. Li estis pli informita ol mi pri aferoj minoj kaj mikenaj. Sed poste, forlasante tiujn ruinojn, li reglitis en sian staton de dormeto. Nia propra vivo ankoraŭ ne estas elfosita.

Mi rekonas ĉi tiun vojparton alte super la mallarĝa kultivata marborda ebena, kun la maro paliĝanta en la senfinon. Mi stiras malrapide senĉese turnante la kapon jen al la vidaĵo, jen reen por sekvi la sinuan vojon. Eddie ŝajne ne rimarkis la vidaĵon. Li sidas kun la aŭdiletoj enorele kaj la okuloj fiksitaj al japana bildstria rakonto.

Tiufoje ni iris aŭtobuse, Sanna kaj mi. Unu ekiris matene, je la sesa, kaj unu vespere. Sur ĉi tiu roka kornico mi sentis kvazaŭ ni flugus aviadile kun la ebenaĵo kelkcent metrojn sube. Mi memoras, ke la buso estis plena je maljunulinoj nigre vestitaj, kiuj krucumis sin vidante ĉiun preĝejon. Ĉe ĉi tiu vidaĵo ili devis gesti kiel ventmueliloj, kiam malsupre aperis dudeko da preĝejoj.

“Via patrino trovis ĉi tiun vojon timiga. Kun la abismo tuj apud la radoj, kiam la buso renkontis aŭton.”

Li kapjesas ne eligante la aŭdiletojn.

“Ŝi devis translokiĝi en la alian flankon de la buso”, mi diras, dum du turistoj sur skoteroj zume preterpasas nin unu post la alia.

Eddie eligas unu aŭdileton kaj rigardas miadirekten.

“Kion vi diris?”

“Ŝi havis malpli da vertiĝo sidante maldekstre de la pasejo.”

Li sulkas la frunton. Kredeble li tute ne imagas, pri kio mi parolas. Sed li konsente murmuris kaj plu aŭskultas sian muzikon. Jen la vojo dufoje turniĝas harplingle, kio postulas koncentriĝon de mi. Komenciĝas kruta deklivo malsupren. La urbo etendas sin antaŭ ni kun siaj blankaj domoj kaj malvastaj stratetoj.

“Ni vidis en la gvidlibro, ke ĝi estas la plej suda urbo de Eŭropo. Jen kial ni elektis tiun buson ĉi tien el *Sitía*.”

Eddie diras nenion.

Ni luis ĉambron en la pensiono de *Andréas*. Ĝi situis nefore de la busstacio kaj samtempe sufiĉe proksime de la strando. *Andréas* estis viro tridekjara, kiu petis nin rekomendi lian pensionon al niaj amikoj revenante hejmen. Tio ne okazis.

Mi kredeble neniam renkontis homon, kiu planis vojaĝi al *Ierápetra*. Kaj nun sendube iom malfruas.

Tiam la strando estis preskaŭ dezerta. Neniu hotelo, neniu restoracio ĝis oni atingis la havenon, kie situis taverno kun kelkaj blue farbitaj lignaj tabloj kaj seĝoj lokitaj surgrunde sub figarbo. Ni sidis tie en la vesperoj rigardante la maljunajn triktrakludantojn. Mi trinkis rakion kaj Sanna freŝan citron-sukon. En la taverno oni rostis terpomojn en fera forno. Ni simple paŝis tien, elektis terpomon, kiu ŝajnis preta, pinĉprenis ĝin kaj ĵonglis per ĝi inter la manoj repaŝante al nia tablo, kaj residiĝis blovante al la fingroj.

Estis la lasta semajno de oktobro, kaj ni estis la solaj sinbanantoj.

La pensiono de *Andréas* ŝajnas ne plu resti, aŭ mi ne trovas la ĝustan straton inter ĉiuj novaj konstruaĵoj. Ni luas ĉambron en hoteleto kun la surpriza nomo *Edelweiss*. La gastoj plejparte estas junaj paroj. Jen troviĝas sendrata interreto ĉiuĉambre, kio estas la sola postulo de Eddie.

Mi devas iri sola al la strando. Daŭras iom ĝis mi trovas pasejon por atingi ĝin inter vilaoj, hoteloj kaj naĝbasenoj. Estas preskaŭ la oka horo, kaj mi vidas nur kelkajn aliajn turistojn, kiuj vagas laŭ la akvolinio. Neniu banas sin, kvankam la akvo estas varmeta. Mi senvestiĝas kaj naĝas ĝis la suno malaperas trans la fiŝhaveno en la malnova urboparto.

Kiam mi alproksimiĝas al nia hotelo, mi telefonas al Eddie.

“Se vi malsupreniras, ni povas iri manĝi ie.”

“Mi ne estas tre malsata.”

“Vi estos. Nun venu malsupren.”

“Ĉu ni ne povos manĝi pli malfrue?”

“Ne. Estos malfrue antaŭ ol ni ricevos ion.”

“Bone. Mi nur finos aferon.”

“Venu nun. Mi tuj alvenos.”

Kompreneble mi devas supreniri por venigi lin. Estus stulte resti malsupre incitiĝante. Mi forŝiras lin de la komputilo

kaj ni paŝas direkte al la malnova kvartalo kaj la haveno. Ne eblas trovi la tavernon kun bluaj seĝoj. Eĉ ne la figarbo videblas. Cetere estas tro da ĝena trafiko laŭlonge de la kajo. Mi nenie rekonas ion ajn. Ĉu ĉi tio vere estas la sama urbo?

Ĉe pli malgranda strato ni trovas restoracion, pri kiu ni interkonsentas. Ni sidiĝas kaj mendas.

“Eŭharistó”, mi diras, kiam la kelnero prezentas miajn ŝafidajn kotletojn kaj la rostostangojn de Eddie.

“Enjoy your meal, sir.”

La kotletoj estas bonegaj, same kiel la rostostangoj, kion mi mem povas konstati, ĉar li manĝas apenaŭ la duonon. Adoleskaj knaboj laŭdire ja povas gluti kiom ajn, sed tio ne validas pri Eddie.

“Ĉu vi tamen volas plian trinkaĵon?”

Li meditas.

“Mi povas preni duan kolaon.”

Estus pli bone trinki akvon kaj iom manĝi. Tion mi tamen ne diras, kompreneble, sed mendas kolaon kaj duan bieron por mi mem.

“Morgaŭ ni povos dormi ĝis malfrue. Mi pensas ke ni restu ĉi tie dum kelkaj tagoj.”

Li tiras la ŝultrojn.

“En ordo.”

“Tamen ni povos fari iom da ekskursoj.”

Mi pensas pri la vilaĝoj, kiujn Sanna kaj mi vizitis. Sed kompreneble ankaŭ ili ŝanĝiĝis.

Kion fari por havi kontakton kun Eddie? Kiam li estis infaneto, tio ne estis problemo. Eĉ se li kelkfoje preferis panjon, tamen mi sentis apartan kontakton inter li kaj mi. Tute ne kiel kun Alice, kiu ĉiam volis esti kun Sanna. Estiĝis kvazaŭ du teamoj, la inoj kontraŭ la uloj. Plej ofte ŝerce, kompreneble, kvankam finfine tio iĝis realo.

Lasante la restoracion mi sukcesas venigi lin laŭ kromvojo tra la malnova urboparto. Tie ankoraŭ estas malvastaj pasejoj apenaŭ lumigataj. La aero varmetas, kaj ĉie odoroj venas al ni. Varmigita olivoleo. Fritita viando. Dizela rubgaso. Florodoro

simila al jasmeno. Lavlesivo. Kaj jen iuj salaj ventpuŝoj logas nin al la haveno. Ni suriras moleon. Kaj la maro kaj la ĉielo karbe nigras. Kelkaj malfortaj lumpunktoj de ŝipo moviĝas malrapide dekstren. Super ili lumas svelta lunarko.

“Kiel stranga aspektas la luno!”

“Jes, ĝi iom kliniĝas dorsen, kompare kun hejme. Tio estas, ĉar ni venis sufiĉe fore suden.”

Mi sentas bone stari ĉi tie kun li gapante en la nigron direkte al la egipta marbordo. Aŭ ĉu ĝi estas Libia. Li demandas nenion plu pri la luno, nek pri io alia, tamen mi imagas ke ni havas ion komunan, preskaŭ kiel iam. Sed tion eble kaŭzas la bieroj, kiujn mi trinkis.

“Ĉu ni ne iros al la hotelo?” li demandas.

“Bone do, ni faru tion.”

Ni estis paro jam de dudek jaroj kaj geedzoj ekde kiam ni atendis la naskiĝon de Alice. Nun ŝi aĝis ok jarojn kaj Eddie dek. En la lastaj du-tri jaroj ni pli kaj pli glitis disen, sed mi pensis, ke tio estas nura valo. Ke ni retrovos la vojon al iaspeca proksimeco. Kiel realigi tion, mi ne sciis. Ĉiuokaze mi klopodis por ne veni en efektivajn kverelojn. Mi pensis, ke krudaj vortoj povas nenion plibonigi.

Poste alvenis la tago, kiam ŝi rakontis.

“Mi ricevis novan oficon, kiun mi petis. Mi diris nenion pri ĝi, ĉar mi supozis ke mi estos senŝanca, sed oni efektive elektis min. Mi estos intendanto en la arta muzeo de Sundsvall, kaj mi eklaboros tie je la Novjaro.”

“Ĉu en Sundsvall? Vi sendube ŝercas!”

“Estos bona oportuno por mi, kaj la ofico estas absolute la ĝusta, mi tute certas pri tio.”

“Sed vi ne povas pendole vojaĝadi mil kilometrojn al laborejo!”

“Mi scias nur, ke mi transloĝiĝos al Sundsvall. La ceteron necesos iel solvi.”

“La ceteron? Ĉu tio estas mi kaj la infanoj?”

“Eble jam estas tempo turni la paĝon ankaŭ por vi.”

Mi staris gapante sen sukcesi ion ajn vortumi. Turni la paĝon, ĉu? Ŝi sonis kvazaŭ malbona parodio de memhelpa manlibro. Unuafoje mi vere dezirus efektivan kverelon. Mi volis kriaĉi, trapugni pordon, kike faligi kelkaj seĝojn. Kompreneble mi faris nenion el tio. Mi stariĝis de la kuireja tablo, dum kelka tempo trotis tien-reen serĉante manieron solvi la problemon. Translokiĝi foren en Nordlandon certe ne eblis por mi. Mi devus ŝanĝi kaj firmaon kaj branĉon, se entute mi trovus novan laboron. Kaj tion ŝi eĉ ne proponis. Kion ajn ŝi volis diri per sia kliŝo pri turnado de paĝo, ŝi apenaŭ imagis ke mi finu mian laboron en la nuklea centralo. Pli malfrue mi komprenis. Ŝi sendube ĝojis, ke mi estas tiel ligita al ĝi.

Do ni prenis ludopaŭzon – jen alia memhelpa kliŝo – kaj Sanna malaperis al Sundsvall. Kaj al ĉiuj ŝajnis memevidente, ke Alice akompanos ŝin, dum Eddie restos ĉe mi. Almenaŭ mi supozis, ke tio evidentas. Li diris, ke tio estas en ordo.

Mi vekiĝas pro tio, ke ĉio tute silentas. Ĉiuokaze mi sentas, kvazaŭ la silento mem vekis min. Mi sidiĝas, klinas min super Eddie sed daŭre aŭdas nenion. La koro ekbatas, mi kaptas lian brakon, kiu ŝajnas malvarmeta, sed kiam mi skuas lin, li turnas sin, murmuris ion kaj kuŝiĝas flanke, kun la dorso al mi.

Mi klopodas trankviliĝi. Eble mi havis koŝmaron, kiu etendas sin al mi en la maldormon?

Pasanta aŭto aŭdiĝas de proksima strato. Mi paŝas ĝis la fenestro kaj malfermetas ĝin. Estas la tria kaj duono, kaj ekstere regas plena mallumo. Nur refermante la fenestron, mi komprenas, kial tiel silentas. Haltis la ventolilo, kiu antaŭe senĉese zumadis. Tuj la ĉambro ŝajnas sufoka, kaj kiam mi reenlitiĝas, la littukoj jam humidas. Tio sendube estas nura fantazio, se efektive vekis min la halto de la ventolilo. Mi provas memori, ĉu mi ion songis, sed la memoro malplenas. Tio estas bonŝanco, se mi havis koŝmaron. Ankoraŭfoje mi aŭskultas la spiradon de Eddie, kvazaŭ li estus bebo. Nun ĝi klare aŭdiĝas. Ankaŭ la korbatoj. Ne, tio estas miaj propraj.

Eble mi povus iri eksteren dum kelka tempo por nokta promeno. Sendube la pli grandaj stratoj havas lampojn. Eble iuloke troviĝas malfermita kafejo. Mi povus trinki ion, kio helpos al mi reendormiĝi. Mendi boteleton da rakio kun etaj almanĝaĵoj. Se oni havas tion. Ĝi kutime gustas milde, ne tro forte. Mi povus iom babili mikslingve kun alia sendorma turisto. La nokta vivo de *Ierápetra* sendube ne ofertas multe pli ol tiom. Nu, kiu scias, eble iu el la novaj hoteloj havas noktoklubon.

Kompreneble Eddie scivolus, kie mi estas, se li vekiĝus. Sed li sendube dormos ĝis la naŭa, se neniu vekos lin. Mi estus for nur mallongan tempon. Eble horon. Poste mi revenus, se okazus nenio neatendita. Kio do povus okazi? Mi povus renkonti la rabiston de la urbo, kiu pro eraro ponardus min. Aŭ mi iros naĝi kaj neniam retrovus la direkton al la tero. Eble mi surirus aŭtobuson, kiu ekiros je la sesa. Stultaĵo. Tiukaze mi kompreneble uzus la luitan aŭton. Sed kien do? Mi apenaŭ povus veni pli foren ol ĉi tien. Nek pli proksimen. Ie ajn ja devas ekzisti loko por mi. Sed ĝuste nun mi ne havas la necesan forton. Eble post kelka tempo. Post iom.

Mi revekiĝas je kvarono antaŭ la oka. La ventolilo zumas kiel kutime. La littukoj malsekas malgraŭ la ventolado. Mi malsatas, sed Eddie plu dormas, do mi devas kontentiĝi trinkante akvon.

*Andréas* havis kunvivantinon, aŭ koleginon, amatinon aŭ kiel ajn mi nomu ŝin. Usonaninon, kun kiu li gvidis la pensionon. Ŝia nomo estis *Fran*, ŝi ŝajnis kelkajn jarojn pli aĝa ol li kaj estis simpatia kaj facilparola en kutima amerika maniero. Antaŭ kelkaj jaroj ŝi ekluis ĉambrom tie, kaj poste ŝi simple restis. Almenaŭ tiel mi komprenis. Ŝi preparis matenmanĝon por tiuj gastoj, kiuj pagis pro tio, kaj krome ŝi zorgis pri la purigado de la ĉambroj. Ŝi ne tutkore dediĉis sin al tiuj taskoj, sed ne eblis koleri al ŝi. Tamen Sanna atentigis, ke en nur kelkaj horoj ĉio en la ĉambro estas kovrita de tavolo da ege subtila sablo.



“Ĝi venas rekte el Saharo”, diris Fran. “Estos pli bone, se la vento turniĝos.”

Sanna trovis tion ege malambicia starpunkto rilate al purigado.

“Se la vento turniĝos! Kaj se ĝi ne turniĝos?”

“Pli-malpli frue ĝi ĉiam turniĝas”, diris Fran.

Ŝi plaĉis al mi. Foje ŝi staris apud elektra kuirplato por varmigi lakton al la matenmanĝa kafo, kaj jen ŝi envolviĝis en longan rezonadon pri sia mirinda tempo en Parizo antaŭ kvin jaroj, ĝis la lakto ekbolis super la randon kaj brulfiksiĝis ĉirkaŭ la plato.

Ŝia diraĵo fariĝis parolturno inter Sanna kaj mi. Plej ofte en ligo kun purigado aŭ aliaj taskoj farendaj, kiujn ni ambaŭ trovis enuaj.

“Dio, kiel aspektas la lavtablo. Ĉu vi povas ordigi tion, kara?”

“Ba, ni atendu ĝis la vento turniĝos.”

Mi memorigas tion al Eddie, kiam li jam vekigis kaj kuŝas pigre en la hotela lito. Li sendube jam centfoje dum sia vivo aŭdis la rakonton pri Fran kaj la Sahara sablo.

“Do, tio okazis ĉi tie en Ierápetra”, mi diris. “Mi scivolas, ĉu ŝi plu loĝas ĉi tie. Kredeble ne. Ŝi eble vivas kun kvar gefiloj en iu antaŭurbo de *Kansas City*. Aŭ kvar genepoj, pli probable.”

Eddie aspektas, kvazaŭ li neniam aŭdis ion ajn pri Fran, nek pri la turniĝonta vento. Li ripozas enlite.

Mi rigardas lin pensante pri kiel okazis, kiam Sanna graviĝis. Ŝi ĵus revenis hejmen de ofica vojaĝo al Londono, kaj ŝi estis pli amema ol kutime. Kelkajn semajnojn pli malfrue ŝi ekmurmuris, ke ŝi preterpasis la tempon. Ni jam klopodis de pli ol jaro, dum kiu ŝi unufoje abortis, do mi ne kuraĝis pensi tre multe pri la afero, kvankam kompreneble mi povis pensi pri nenio alia. Sed tiufoje ĉio prosperis. Nur kiam ĉiuj homoj ripetadis, kiom la bebo similas al mi, kio estis tute nevidebla je tiu momento, mi memoris la Londonan vojaĝon. Poste, kiam li kreskis, kaj mi efektive povis rimarki kelkajn similaĵojn, mi ne

plu pensis pri ĝi, almenaŭ ne ĝis post la disiĝo, kiam li kaj mi restis solaj en Saltvik.

Ni havas trankvilan tagon surstrande, kaj nun dumtage sub la plej intensa sunbrilo ĝi plenas je homoj. Antaŭtagmeze mi devas iri tien sola, sed postlunĉe Eddie akompanas min por kelkaj rapidaj enakviĝoj.

“Ĉu ne estas mirinda akvo!” mi diras. “Pensu, ke estas libera maro de ĉi tie ĝis Afriko.”

Li fermetas la okulojn kontraŭ la suno.

“Estas tro sala akvo. Mi pensas, ke estas pli bone hejme aŭ en Gunnarsö.”

Sekvatage ni aŭtas supren ĝis monta vilaĝeto, kiun mi vizitis kun Sanna. Ni parkumas la aŭton kaj paŝas laŭ pado supren inter olivarbejoj. Povas esti la sama vojo, kiun ni laŭiris tiufoje, sed se diri sincere, mi rekonas nenion. Ankaŭ tiufoje kreskis olivarboj, sed ili kreskas preskaŭ ĉie.

“Mi memoras, ke ni renkontis abeliston apud aro da abelujoj”, mi diras al Eddie. “Ni restis tie sufiĉe longe interparolante kun li, aŭ kiel ajn oni nomu tion, antaŭ ol pluiru supren. Li parolis nur la grekan, sed li talente imitis abelojn.”

Eddie ŝajnas nur modere interesita. Kaj abeluojn ni ne vidas. Post iom ni venas al tabulo kun teksto, kiun ni ne scias interpreti.

“Ĝi kredeble signifas Eniro malpermesita”, diras Eddie.

“Mi dubas pri tio. Ĉi tie troviĝas nur pli da olivarboj.”

“Aŭ Atentu pri la hundo.”

Mi politere deĉifras du longajn grekajn vortojn.

“Hundo, ĉu tio ne estas *kynos*, laŭ mia memoro. Tion oni ne skribis ĉi tie.”

Eddie rifuzas pluiru, kaj mi ne plu scias tre bone, kion ni efektive faras ĉi tie. Do ni retretas malsupren al la vilaĝo kaj sidiĝas ĉe unu el la subĉielaj tabloj de kafejo.

Ne ekzistas multo rigardinda, dum ni trinkas niajn kafon kaj kolaon. Kelkaj maljunuloj en la kafejo interparolas. Hundo kuŝas en la ombro de arbo sur la placo ĉi-apude. Ĝi kuŝas

senmova surflanke, kaj oni vidas la brustkorbon moviĝi, kiam ĝi spiras.

“Estas agrable nur ripozi iom”, mi diras.

“Mhm.”

“Mi memoras, ke ni sidis en kafejo ĉi tie atendente la buson reen. Sed mi ne scias, ĉu aspektis precize ĉi tiel. Eble oni rearanĝis ĝin.”

Li ŝajne cerbumas pri io, turnante sian malplenan glason inter la manoj.

“Paĉjo”, li poste diras, rigardante min, kvankam ne en la okulojn. “Kion ni faras ĉi tie?”

La demando iom konfuzas min.

“Ni ferias, ĉu ne?” mi diras rapide. “Ĉu vi ne ŝatas Kreton? Ĉiuokaze *Knossós* ja plaĉis al vi, ĉu ne?”

“Sed kial ni devas iri al amaso da lokoj, kie vi kaj panjo estis?”

Mi devas pripensi, kiel mi klarigu tion.

“Ni ja ne devas. Sed ĉu ne estas plaĉe reveni al lokoj, kie oni jam estis antaŭlonge?”

Li tiras la ŝultrojn.

“Mi ja neniam estis ĉi tie.”

Sed vi povus esti farita ĉi tie, mi volus diri. Ridinde. Tio ja ne estis li, sed iu pli granda frato. Aŭ fratino.

Maljuna viro kun du bastonoj komencas paŝi tra la placo ekstreme malrapide.

“Tiufoje, kiam panjo kaj mi estis ĉi tie”, mi diras. “Nu, estas io, kion mi ŝatus rakonti al vi.”

Eddie rigardas min suspekteme, tamen ja spureblas ekbrilo de intereso en liaj okuloj.

“Ĉu temas pri tio, kial vi disiĝis?”

“Ne, ne. Ĉi tio estis longe antaŭ tio. Ni neniam volis diri ion. Sanna ne volis paroli pri tio.”

“Pri kio?”

Nun mi vere bezonus rakion. Aŭ ion eĉ pli fortan. Sed tio ne eblas. Mi devos veturigi nin laŭ la monta vojo malsupren al la urbo. Anstataŭe mi eniras por mendi plian kafon. Kelkaj

muŝoj dancas super la bufedo endome, kaj de ie aŭdiĝas monotona violona muziko.

Efektive ja estas eraro priparoli ĉi tion kun dekkvarjarulo. Nur pro tio, ke mi mem portadas malbonan konsciencan. Tio ja ne koncernas lin. Aŭ eble tio efikus al li en tute malĝusta maniero. Eble li ekhavis la ideon, ke ni neniam amis lin. Ke li estas nura anstataŭanto de iu, kiu ne ricevis ŝancon.

Mi reiras kun mia taso da kafo.

“Eble ankaŭ vi volis ion plian?”

Li kapneas.

“Ne gravas.”

Mi sidiĝas, primeditas la aferon. Li levas sian bildstrian kajeron, kiun li sendube jam tralegis dekfoje. Aspektas strange, kiam li foliumas ĝin de dekstre maldekstren. La hundo surplace movas sin iomete flanken por reveni en la ombron de la arbo. La maljunulo kun bastonoj jam trairis preskaŭ la tutan placon. Mi trinkas mian kafon sidante en silento. Eddie ĵetas al mi akrajn rigardojn super siaj bildstrioj, sed li nenion demandas. Tio estas bona.

Ŝi ankoraŭ ne finis siajn studojn. Mi estis ĵus dungita kaj volis dediĉi min plene al la laboro dum la komencaj jaroj. Malgraŭ tio ŝi povis imagi infanon, sed mi rifuzis. Tio tute ne konvenis je tiu momento. Laŭ mia supozo, ankaŭ ŝi komprenis tion. Kvin jarojn pli malfrue ni vere klopodis, sed unue rezultis nenio, kaj poste sekvis la aborto. Tio kompreneble memorigis al ni la aferon. Ankaŭ tiam ni ne parolis pri ĝi, sed mi rimarkis, ke ankaŭ ŝi pensadis pri ĝi.

Ne, ĉi tio ja ne rilatas al Eddie, nek povus interesi lin. Almenaŭ ne dum li restas adoleskulo. Mi devos elpensi ion alian, se li demandos, kion mi volis rakonti. Nun ne estas bona momento. Mi faru tion iam alifoje. Kiam la vento turniĝos.

Sed li ne demandas, kaj post horo en la vilaĝa kafejo ni reveturas malsupren al *Ierápetra*.

“Kiel longe ni restos ĉi tie?” li demandas, kiam ni elaŭtiĝas.

“Ni havas lokojn rezervitajn en aviadilo sabate. Tion vi ja scias, ĉu ne?”

“Mi volas diri ĉi tie. En ĉi tiu urbo.”

“Mi ne scias. Kion vi pensas?”

Li tiras la ŝultrojn.

“Ĉu vi preferus iri al iu specifa alia loko?”

“Ne, tio ne gravas. Mi ne scias kio ekzistas.”

“Bone. Ni ja povos pripensi tion ĝis ĉi-vespere.”

Ni promenis en la urbocentron por vespermanĝi. Nun ni kuŝas surlite en nia ĉambro gapante al la plafono.

“Ĉu ni decidu, ke ni pluiros morgaŭ?” mi diras.

Li ne aŭdas min. Mi ĵetas la gvidlibron sur lin. Li eloreligas unu aŭdileton kaj rigardas min kun demanda mieno.

“Do ni iros aliloken morgaŭ”, mi ripetas.

“Kien?”

“Kion vi pensas? Ĉu al io minoa? Ekzistas loko nomita *Faistós*.

Li eligas ankaŭ la duan aŭdileton.

“Ĉu vi estis tie kun panjo?”

Li rigardas min per la samaj akraj okuloj kiel supre en la vilaĝa kafejo.

“Diable, kial tio gravas?” mi elsputas.

“Mi ne scias. Ĉu vi estis?”

“Mem trovu ion en tiu libro!”

Sed tion li ne emas. Li eĉ ne rigardas la gvidlibron, nur daŭre gapas al mi kiel damnita fiŝo.

“Ni neniam venis tien”, mi diras iomete pli trankvile.

Li plu gapas.

“Ĉu vi do planis iri?”

Mi tiras la ŝultrojn kaj forturnas la kapon. Post iom mi ĵetas rigardon al li kaj vidas, ke li denove enoreligis siajn aŭdiletojn. La gvidlibro kuŝas netuŝita apud li surlite.

Prave, ni planis iri ankaŭ al *Faistós*, sed ne okazis tiel. Ne iris aŭtobusoj laŭ la suda marbordo. Sed nun ni povas aŭti kien ajn ni volas. Se mi nur povus kompreni, kion li do volas.

Mi vekigās en precize la sama maniero ankaŭ ĉi-nokte. Ĉio silentas, la ventolilo haltis, eksterdome estas karbe mallume. Sed nun mi memoras, kion mi songis. Mi supreniris laŭ vermorborita ligna ŝtuparo kaj venis en longan koridoron. Unuflanke estis vico da pordoj pretaj krevi pro ia premo. Mi sciis, ke tie transe io brulas, mi aŭdis fajron muĝi kaj sentis varmegon radii al mi tra la pordoj. Ie transporde estis iu, kiu ne povis elveni. Mi klopodis malŝlosi pordon post pordo per enorma fasko da ŝlosiloj, provante ŝlosilon post ŝlosilo, sed neniu el ili estis ĝusta. Fine mi atingis la lastan pordon, kiu estis malfermita je fendo. Mi rigardis enen. Tie ene ĉio jam estis bruligita, kaj meze de la planko estis truo, ia ŝakto, kiu profundigis suben en mallumon. Tamen mi ne povis turni min por reiri. Mi faris kelkajn paŝojn en la ĉambron, la planktabuloj cedis kaj mi falis suben tra la ŝakto. Tuj antaŭ ol vekigi, mi pensis, ke ĉirkaŭ mi iĝas lume, sed mi neniam havis tempon surteriĝi.

Mi staras en la mallumo apudfenestre aŭskultante la nokton. Io pulsas, sed mi ne povas distingi, ĉu io eksterdome aŭ en mia interno. Ie super mi mallaŭte aŭdiĝas ritmaj ĝemoj de iuj el la junaj gastoj de la hotelo. Soprana knabina voĉo ĝemetas kvazaŭ nenio ajn ekster ŝi signifus ion. Cetere ĉio kvietas.

Mi pensas pri tio, kion Eddie diris, kiam ni elaŭtiĝis kaj mi demandis, kien li volas iri. “Mi ne scias, kio ekzistas”, li diris. Ne, kiu do damne scias, kio ekzistas? Iutage ankaŭ li spertos, ke ne eblas ekscii, kio ekzistas. La vivo ne prezentiĝas menue. Oni devas helpi sin sen tio.

Morgaŭ matene mi rigardos en la gvidlibro por proponi iun lokon, kien ni povos iri de ĉi tie. Ekzistas aliaj minoj palacruinoj. Kaj memoraĵoj de la batalo kontraŭ turkoj, kaj kontraŭ germanoj. Ekzistas montoj, kiujn eblas surgrimpi, kaj strandoj, kie eblas bani sin. Ekzistas maro kaj ĉielo, homoj kun kiuj ni povos interŝanĝi kelkajn vortojn, kaj poste ekzistos aviadilo por flugi hejmen.

Mi turnas min for de la fenestro kaj repaŝas al niaj litoj. La supra littuko de Eddie kuŝas tordita kvazaŭ humida ŝnurego. Mi levas kaj ordigas ĝin, sternas ĝin malpeze sur lin. Poste mi rekuŝiĝas kaj provas reendormiĝi.

# Vojaĝo kun Hans Glas

2011

En la jaro, kiam mi iĝis dektrijara, Hans Glas eniris mian vivon. Ĝi estis ruĝa kaj belega, laŭ paĉjo.

“Ĉu bela?” diris panjo. “Ĝi ja konsistas ĉefe el rusto. Se mi eniros, mi sendube truos la plankon.”

“Stultaĵo. Ĉi tia raraĵo maturiĝas kun gracio.”

“Kia marko estas?” mi demandis. “Aperas nur Glas sur la fronto.”

“Precize. Juvelo el 1964 de Hans Glas en Bavario.”

“Hans Glas? Neniu aŭto nomiĝas Hans Glas!”

“Jen ĝi, tuj antaŭ vi.”

Kaj Hans Glas restis ĝia nomo dum ni posedis ĝin. Tio ne daŭris longege, tamen el ĉiuj someraŭtoj, kiujn paĉjo aĉetis, tiun mi memoras plej bone. Eble ĉar ĝi iĝis nia lasta. Aŭ pro la maniero, kiel ĉio finiĝis.

Mi ne scias ĉu iu el ni vere volis refoje ferii en tendo. Panjo estis laca pro sia partia laboro ĉirkaŭ la unua de majo, kiam ŝi devis plurfoje semajne kunvenadi ĝis malfrue vespere. Mi preferus resti hejme kun la amikoj, kaj Jonas volis kuŝi surlite legante, kiel kutime.

“Bildstriojn vi povos legi en la tendo kaj aŭto”, diris paĉjo.

Li pendolis inter entuziasmo kaj plena rezigno, foje eĉ en unu sama frazo.

“Ni devas uzi nian novan tendon, je kukolo! Ĝi estas vera palaco. Tamen, se vi ne volas... Mi faros tion pro vi. Al mi mem sufiĉus zorgi pri la ĝardeno. Tiu ja donas rekompencan. Kaj vi restu ĉe via partio, Sonja. Vi jam loĝas tie. Ŝajne vi tie ricevas ĉion bezonatan.”

Sed poste li aperis kun Hans Glas, kaj de tiam la demando estis, ĉu ni iel utiligos la aŭton aŭ ne. Kaj la luksan tendon, nur unufoje uzitan.



Kutime ni pasigis la feriojn en Skandinavio, sed Hans Glas portos nin suden, laŭ paĉjo.

“Ĉu vi redonos ĝin al la fabriko?” diris panjo.

Ŝi ĉiam bezonis kelkajn semajnojn por al kutimiĝi al la veturilo de la jaro, kaj kiam ŝi jam faris tion, estis tempo irigi ĝin al la aŭtombejo.

“Ne, mi pensis pri Aŭstrio. La Alpoj, ĉu ne, belaj panoramoj, Sound of Music.”

“Eble vi pensas pri kelnerinoj kun pufaj mamoj, kiuj saltas el la dekoltaĵo?”

Ni sciis, ke panjo iom plendos, sed ke ĉio fine okazos laŭ la plano de paĉjo. Tio estis la ĉiama procedo.

Ni devos iri prame de Trelleborg. Al Saßnitz, laŭ ŝi. Al Travemünde, laŭ li.

“Mi ne iros tra Orienta Germanio. Neniam.”

“Jen la plej rekta vojo suden”, diris panjo. “Ni ne profitigu la okcidentgermanajn duonfaŝistojn.”

Mi konis neniun alian, kies panjo estis hardita komunisto. Paĉjo estis senpolitika, do ordinara socialdemokrato. Unu fojon li voĉdonis por la komunistoj, kaj tio estis en 1952 kiam panjo ankoraŭ ne jesis al li. Poste, kiam ili jam estis geedzoj, li revenis al la socialdemokratoj.

Panjo estis nia ĉefa zorganto pri politiko kaj la vastaj perspektivoj. Paĉjo zorgis pri la ĉiutagaj detaloj. Lia ĉefa pasio, krom ĉiusomera nova aŭtaĉo, estis ornamplantoj. Ĉiuprintempe li plantis ion novan en nia jam plenŝtopita ĝardeneto. Bedaŭrinde mankis spaco estadi en tiu ĝangalo. Nur paĉjo kapablis trapuŝi sin tie.

Hans Glas iris kiel horloĝo ĝis Trelleborg. Ni dormis surprame, vekigis tro malfrue matene kaj devis kuri al la aŭtoferdeko.

“Ne gravas”, diris paĉjo. “Matenmanĝi ja eblas ie ajn ĉe la aŭtoŝoseo.”

Li certe pravis. Sed unue ni devis veturi kelkdek kilometrojn kiel la lastaj en aŭtovico de la pramo, poste ni devis eniri

Lubekon por ŝanĝi monon. Fine ni sidiĝis en fumplena gastejo je tagmezo, svenemaj kaj kverelemaj.

“Ĉu ni ne povas konservi la pacon kaj aperi kiel normala familio, kiel escepto?” diris paĉjo atendante la manĝon.

“Vi volas diri, ĉu ne ĉiuj povas fari kiel vi volas?” diris panjo.

“Sonja, ni interkonsentis malgraŭ ĉio fari ĉi tiun vojaĝon. Pro la knaboj, ĉu ne? Temas nur pri tri semajnoj.”

Li nun parolis mallaŭte, kaj panjo ne respondis. Eble ŝi ne aŭdis lin, kvankam ŝi sidis plej proksime. Sed ĝuste tiam la kelnero alportis nian limonadon, kio donis al ni ion por fari.

Daŭris pli longe ĝis la manĝo, kaj Jonas almenaŭ dudekfoje anoncis, ke li malsatmortas, antaŭ ol aperis lia kolbaso. Neniu petis lin silenti. Sendube la tuta kvaropo estis same laca kaj malsata. Kiam ni havos ion enstomake, ĉio estos pli bona.

Kiam vesperiĝis, ni jam atingis iom suden. Ne plu estis same ebene, sed montodorsoj kaj kampoj alternis, kaj piede de la dorsoj situis densaj urbetoj. Ni gvertis pri tendumejo, sed estis malfacile unuigi la dezirojn. Paĉjo volis halti proksime al la aŭtoŝoseo, panjo volis ion ne tro kapitalisman, Jonas deziris nur pacon kaj kvieton, kaj mi volis halti ie, kie troviĝis lud-aŭtomatoj, kiel sur la pramo. La diskuto daŭris certe ducent kilometrojn suden tra mi ne scias kio, eble Hesio aŭ Malsupra Saksio aŭ io tia.

Fine nur post la naŭa ĉiuj krom panjo cedis. La sekvo estis, ke ni venis al bieno kun bovinfekaĵo inter la tendoj kaj nur malvarma akvo en la lavejo. Do, ĝi ne estis tro kapitalisma.

“Eble ni hazarde misvenis en Orientan Germanion”, diris paĉjo antaŭ ol iri al la bienulo por antaŭpagi.

De la antaŭa somero, kiam ni aĉetis la novan tendon, ni havis fiksajn taskojn dum la starigado. Panjo decidis la lokon kaj malvolvis la eksteran kaj internan tendojn. Paĉjo muntis la stablon. Mi fiksitis la tendon per hokoj en la tero, kaj Jonas sidis legante en la aŭto.

Poste estis tempo pompe plenblovi la aertracojn. Paĉjo ĉiam kuŝis ĉe la ekstera flanko, panjo plej interne kaj Jonas kaj mi meze. Estis pli multe da spaco ĉi tie ol en la malnova tend-aĉo, kie ni devis kunpuŝiĝi kapopiede kiel sardinojn.

“Ĉu vi kontrolis la apunton pagante?” panjo demandis paĉjon.

“Tiu simpla rustikulo estas plene honesta, tion mi tuj vidis.”

“Rustikulo? Tiu maljuna nazio? Li certe junaĝe deĵoris en Aŭŝvico. Tion *mi* tuj vidis”, diris panjo.

Efektive la familio posedanta la tendumejon havis apartan aspekton. Kaj apartan parolon. Ni dediĉis lacan vesperan diskuton al la demando, ĉu ili debilas aŭ simple parolas ege kamparan dialekton. Estis malfacile decidi, ĉar neniu el ni komprenis eĉ unu vorton.

Paĉjo, kiel la sola el ni scianta iomete da germana, konsideris ilin normalaj.

“Ili estas ordinara terkulturanta familio, tutsimple. Ili tenas sin kune. Vi eble neniam spertis tion, sed jen la celo de familioj. Kompreneble, la kompatinduloj devas vivi ekster la dolĉa sino de la partio.”

“Jes, ĉar la komunista partio estas malpermesita en ĉi tiu nazia lando”, diris panjo.

“Prefere tio, ol malpermesi ĉiujn aliajn.”

“Mi komprenas, ke vi pli zorgas pri la rajtoj de burĝoj, ol pri partio, kiu restas centprocente ĉe la flanko de laboristoj.”

“Lasu, la elektoj okazos nur en septembro. Konservu la kliŝojn por viaj karaj kamaradoj.”

Jonas levis la nazon el sia bildstria kajero konstatante:

“La plej eta knabo rondiras kun porko.”

Li efektive pravis. La knabo portadis porkideton en la brakoj karesante ĝin. Mi ne scias kial, sed ial tio finis la kverelon. Almenaŭ por hodiaŭ.

Hans Glas iradis sufiĉe bone dum la vojo suden tra Okcidenta Germanio. Kiam ni venis en Bavarion ni frekventis urbajn

murojn kaj trabfakajn domojn laŭlonge de la Romantika Vojo, kaj baldaŭ estis tempo ŝanĝi D-markojn en ŝilingojn. Ni iris rekte al Salzkammergut, al la lago de Wolfgang kaj rigardis la gastejon Blanka Ĉevalo. Ĝi estis sufiĉe bela, ĉiuokaze de fore. Poste ni pluiris al tendumejo.

“Mi ne komprenas, kial oni ne lokis la tendumejon ĉe lago”, diris paĉjo.

“Eble ili ne volas ke simplaj tendantoj malpurigu la mirindan lagon”, diris panjo.

“Bone. Tamen ĉi tie estas bele. Vi scias, ke oni filmis Sound of Music ĉi tie, ĉu ne?”

“Kiu bezonas tian sukeritan hollywoodan melodramon?”

“Je kukolo, ne eblas senĉese spektadi la Kirasŝipon Potemkin.”

“Sed ĉu tia hipokrita infankoruso neniam tedas vin?”

Tiel ili ĉiamis, do mi ne zorgis. Anstataŭe mi rondiris por rigardi aŭtojn en la tendumejo. Estis multe da Mercedes, sed eĉ ĉi tie mi trovis neniun plian Hans Glas.

Dum kelkaj tagoj ni rondveturis ĝuante la perspektivojn. Efektive Aŭstrio estis bela, kun verdaj deklivoj, alpstilaj hoteloj kaj fonaj montopintoj. Sed mi havis malmulte por fari. Unufoje ni trapasis vilaĝon kun migranta amuzejo surplace. Ni haltis por rigardi kaj aĉeti glaciaĵon. Paĉjo celpafis per aerfusilo, pli precize li klopodis, sed li eĉ ne trafis la tabulon.

“Jen la plej mizera aerpafilo kiun mi iam vidis”, li diris.

Cetere troviĝis ĉefe karuseloj por infanetoj, do ni baldaŭ pluiris.

Paĉjo intencis, ke ni promenu sur la allogaj deklivoj ĉirkaŭ la lagoj. Mi ne scias ĉu li krome pensis ke ni kantu. Ĉiel ajn, nenio okazis, ĉar ĉie estis malpermeso eniri, kio kompreneble revivigis la agitadon de panjo.

“Jen la privata posedaĵo regas super la bezono de la popolo.”

“Ni mem posedas peceton da tero, ĉu ne?” diris paĉjo. “Sed vi evidente laciĝis de ĝi. Vi tiel malofte vizitas vian familion. La intensa partia laboro ja ne permesas tion...”

Paĉjo iris sidiĝi en kafejo, kie li mendis kruĉon da biero. Tio ne similis lin. Li normale ne estis tia.

Ili kutime kverletis pri ĉio. Pli aĉe estis, kiam paĉjo tiel incitiĝis, ke li dum tagoj silentis. Jen kio okazis, kiam ni provis transiri la pasejon de Großglockner. Hans Glas ne vere volis trapasi la Alpoj, kaj ĝia akvo ekbolis en la serpentaj kurbiĝoj.

“Ĝi eble ne estas konstruita por forlasi la aŭtoŝoseon”, diris panjo. “Kaj kredeble ĝi frostiĝos vintre.”

“Tiel longe ne daŭros la afero.”

Je la dua akvobolo paĉjo ne plu eltenis la komentojn de panjo. Li sukcesis turni la aŭton kaj reiri malsupren en la valon, de kie ni venis. Ni efektive atingis ĝin, sed ni devis viziti aŭtoriparejon en Zell am See por ĝustigi la bremsojn. Panjo kverelis, paĉjo mutis kaj Jonas legadis Asterikson. Sekvatage ni alvenis en Salcburĝon.

Eble ne estas granda sekreto, ke troviĝas multe da Mozart en Salcburĝo. Mi mem ne havis tre klaran koncepton pri li, sed panjo trovis lin stultulo, kaj iel paĉjo devis suferi ankaŭ pro tio, eble ĉar li stiris Hans Glas tien. Mozart iel kunfandiĝis kun la kapitalismo kaj Sound of Music, kiu ankaŭ ege ĉeestis en Salcburĝo.

Ni tendumis eksterurbe kaj dum du tagoj rondpaŝis inter kasteloj, kafejoj kaj diversaj memoraĵoj. Nenio el tio vere interesis nin, sed ŝajne ni perdis ĉiun elanon post la malsukceso transpasi la Alpoj.

“Morgaŭ jam estos tempo reiri hejmen”, diris panjo fine.

Estis merkrede matene kaj ni kuŝis en la tendo, atendante la ellitiĝon de paĉjo. Li turnis sin en la dormsako.

“Kio tiras vin hejmen tiel urĝe?” li diris post iom. “Supozeble ne nia etburĝa dometo?”

“Ni mendis lokon sur la pramo por sabato.”

“Unue ni devos ŝanĝi monon”, diris paĉjo.

“Prefere ni faru tion en Okcidenta Germanio.”

“Ne. Ni pagos la tenduman koston ĉi tie, kaj ni aĉetu iom da aferoj. Kaj ni plenigu la benzinujon. La germanoj postulas pli multe por ĝi.”

Li ne parolis tiel multe post kiam la radiatora akvo bolis, kaj dum panjo pro kutimo plu protestis, li malzipis la dormsakon, stariĝis kaj forlasis la tendon en sia sakosimila trejnvesto. Post iom aŭdiĝis la konata sono de Hans Glas, kies motoro ekiris kaj poste malaperis foren.

Jen la lasta sono de paĉjo kaj Hans Glas. Ili neniam revenis.

Posttagmeze Jonas kaj mi ricevis viandsupon kun terpombuletoj en la kafeterio de la tendumejo. Jen ĉio, al kio sufiĉis la restanta mono de panjo.

“Ĉu ni ne alvoku la policon?” mi demandis.

“Li revenos. Tiel facile ni ne perdos lin.”

Sed en la sekva tago ŝi devis peti helpon kontakti bankon kaj nian ambasadon en Vieno kaj mi ne scias kio. Nia mono elĉerpiĝis, kaj ni tediĝis je pano kun ŝmirfromaĝo.

Lunde panjo normale rekomencus labori. Anstataŭe ŝi petveturis al Salcburgo por akiri monon el banko. Kaj marde matene ni suriris trajnon norden. La tendon ni devis postlasi en Aŭstrio, ĉar ĝi estis tro peza por kunporti. Post tridek ses horoj ni revenis hejmen, ŝvitaj, polvaj kaj ĝismorte lacaj.

Mi imagis, ke Hans Glas staros en nia aŭtejo, dum paĉjo okupiĝos pri siaj ornamplantoj, sed kompreneble ne estis tiel. La sola persono, kiu metis piedon tien en tri semajnoj kaj duono, estis najbarino, kiu bonvolis akvumi la florojn kaj malplenigi la poŝkeston.

Matene panjo iris trame al sia laborejo, kaj jam post semajno ĉio ŝajnis, kvazaŭ ni eĉ neniam havis patron.

La lernejo rekomenciĝis. Por mi ĝi estis nova lernejo, ĉar mi komencis la sepan jaron. Mi elektis studi la germanan, sed tion

mi nun bedaŭris. Mi volis ke nenio memorigu min pri tiu vojaĝo.

Panjo konis sampartianon je la nomo Rune Jansson. La unuan de oktobro li ekloĝis ĉe ni.

“Estus malfacile konservi la domon per nur mia salajro”, diris panjo. “Rune estas afabla helpi nin. Jen por kio ni havas kamaradojn.”

Oficiale li dormis en la keletaĝa vivoĉambro, sed praktike li kuŝis en la lito de paĉjo, apud panjo. Li estis iel ridinda, Rune, precipe se oni imagis lin kiel komuniston. Kredeble li neniam ajn kontraŭdiris al iu ajn persono.

Je novjaro panjo reprenis sian fraŭlinan nomon. Ŝi volis, ke ankaŭ ni ŝanĝu, kaj Jonas sendube emis tion fari, sed mi konvinkis lin rifuzi. Kredeble ŝi preferus, se ankaŭ Rune povus ŝanĝi, sed tio ja ne eblis.

Jonas, kiu ĉiam kutimis teni la nazon en Asterikso kaj Tinĉjo, nun vastigis siajn interesojn. Li spektis la televidajn novaĵojn kaj legis ĵurnalon, kiel vera studemulo.

Li kaj mi neniam eksciis, kio okazis al paĉjo. Se panjo ion sciis, ŝi ĉiuokaze ne informis nin.

Ni ankaŭ neniam parolis pri li. Sed post jaro mi unufoje imagis vidi lin. Jonas kaj mi paŝis kun panjo kaj Rune en manifestacio en la unua de majo. Vjetnamio ĵus venkis Usonon, kaj marŝis nekutime multe da homoj. Tamen mi certis, ke tio estas la lasta fojo por mi. Ni paŝis je malregula ritmo, ĉar fojon post fojo la strato ŝtopiĝis, tiel ke necesis atendi, kaj poste oni rapidis antaŭen kelkcent metrojn ĝis la sekva ŝtopiĝo. Subite mi ekvidis iun, kiu tre similis paĉjon. Li staris apude, inter aliaj rigardantoj proksime de la fajrobrigadejo. Dum kelka tempo mi gapis al li, poste mi puŝis la flankon de Jonas kaj iel diskrete fingromontris, nenion dirante. Ial mi ne volis, ke panjo rimarku.

“Kio mankas? Kial vi puŝas min?” diris Jonas.

Kiam mi refoje rigardis tien, paĉjo malaperis inter la homoj.

“Nenio. Mi pensis vidi iun.”

Jonas reciproke puŝis min, kaj mi provis faligi lin per piede, kio malsukcesis, ĉar ni plu restis starantaj sur unu loko.

“Trankviliĝu, knaboj”, diris panjo. “Ĉu vi ne povas resti amikoj dum unu sola tago, kiam la imperiistoj finfine ricevis laŭmerite?”

La manifestacio rekomencis moviĝi, kaj mi tordegis la kolon, tamen mi ne plu povis ekvidi lin.

Iuvespere panjo, Rune kaj mi lace spektis televidan muzikokvizon, dum Jonas profundigis en la ĵurnalon.

“Jen oni skribas pri Hans Glas”, diris Jonas.

“Kion?” mi diris.

“BMW aĉetis la fabrikon kaj ĉesigis la produktadon”, diris Jonas.

“Silentu”, diris panjo. “Mi ne volas aŭdi pli multe pri tiu damnita aŭtaĉo.”

“Oni malkonstruis ĉion kaj vendis la maŝinojn al Rumanio.”

“Ĉu vi povas silenti?” diris panjo. “Ni klopodas televidi.”

En la televida studio unu konkuranta teamo nun devis diveni. Ili etendis sian respondon kaj ne volis riski. La gvidanto helpetis, kaj fine unu el la teamo flustris ion neaŭdeblan.

“Ĉu vi diris Viena klasikismo?” diris la gvidanto. “Tute ĝuste! Kaj kie ni do troviĝas? Ĉu eble ni estas en Vieno mem, aŭ ĉu eble...”

“En Salcburgo”, mi flustris.

“Tute ĝuste”, diris la televida kvizgvidanto. “Kaj tie, pri kiu oni tuj pensas?”

Jonas kaj mi rigardis unu la alian kaj samtempe mimis ‘Hans Glas’, dum la konkursantoj kompreneble korusis ‘Mozart’.

Panjo suspiris.

“Ĉu ekzistas nenio alia spektinda ĉi-vespere?” ŝi diris.



# Calle Zacamil

2012

Consuelo, Wendy kaj mi kutime veturis urben per la sama matena buso, kaj alveninte ni ĉiam atendis ĝis la alveno de Marisol, kiu venis per buso el Quezaltepeque. Poste ni paŝis laŭeble rapide al la lernejo. Kelkfoje iu el la busoj malfruis, kaj tiam unu el la monaĥinoj atendis nin en la pordego, preta ŝlosi ĝin post ni. Se tiu estis patrino Ursula, ŝi skoldis nin, kvazaŭ kulpus ni ke la aŭtobuso fiksiĝis en trafiko.

Posttagmeze ni ne same rapidis de la lernejo. Ni pasumis preter la butikoj de Avenida Lincoln, rigardis en la montrofenestrojn, legis la afiŝojn de magazinoj ekster la gazetbudoj. Marisol klopodis iom rapidigi nin, ĉar ŝia buso ekiris kvaronhoron pli frue ol la nia, sed efektive ni ĉiam havis sufiĉe da tempo. La stratoj restis kvietaj, ĉar la vespera svarmado ankoraŭ ne komenciĝis, kiam finiĝis niaj lecionoj.

Iutage, antaŭ ol eniri en Avenida Lincoln, Consuelo proponis:

“Kial ne iri laŭ Calle Zacamil?”

Ni rigardis ŝin. Kia ideo!

“Ĝi ne estas agrabla strato”, diris Marisol.

“Sed ni povus rigardi la putinojn.”

Wendy ŝajnis konsternita, kaj mi iom cerbumis.

“Ĉu ili ne laboras nokte?” mi diris.

Mia pli aĝa frato Toño kutime nomis ilin noktaj papilioj, kaj mi ne povis imagi ilin en la intensa posttagmeza sunbrilo.

“En Calle Zacamil ili staras ankaŭ tage”, diris Consuelo. “Venas tien kamionŝoforoj kaj aliaj, kiuj laboras dum la tuta nokto.”

Neniu demandis, kiel ŝi scias tion. Marisol ne volis rigardi ilin, sed ŝi ne povis paŝi sola al la buso, do la rezulto estis, ke la tuta kvaropo iris laŭ Calle Zacamil.

Ĝi vere estis teda strato, longa, rekta kaj senombra. Ŝajne situis tie plejparte oficejoj kaj etaj fabrikoj, unu benzinvendejo kaj iom pli fore kiosko de tortiljoj. Apud ĝi sidis du indianinoj vendante legomojn. Mi ne scias, kial ili elektis tiun lokon, ĉar la aŭtoj nur preteriris, tiel ke polvo neĝis sur tortiljoj kaj legomoj. Ĉiuokaze Consuelo paŝis tien por aĉeti botelon da kolao, kiun ni dividis, kaj poste ni pluiris. Mi komencis senti kalkanan frotvundon. Estas strange, ke kelkaj stratoj kaŭzas pli da frotvundoj ol aliaj, kaj Calle Zacamil estis tipa frotvundiga strato.

Tuj post trafikcirklo tri putinoj staris trans la strato. Du estis dikaj kaj unu maldika. Ni haltis por gapi al ili.

“Ni ne haltu ĉi tie”, diris Marisol. “Venu, ni devas iri al la busoj.”

Consuelo ridis.

“Mi ne komprenas, ke iu volas esti kun tiaj grasulinoj”, mi diris.

Unu el la dikaj mansignis al ni kaj kriis, ke ni foriru de tie. Sed ĝuste tiam liveraŭto alveturis kaj bremsiĝis inter ni kaj la putinoj. La ŝoforo malfermis la pordon niaflanke kaj fajfis.

“Ĉu vi ŝatus etan veturigon, beletaj?”

“Kien?” diris Consuelo, dum Wendy kaj Marisol ekkuris foren kiel du timigitaj kunikloj. Mi kaptis la brakon de Consuelo provante tiri ŝin en la sama direkto.

Tiam la dikulino, kiu kriis al ni, alpaŝis tra la strato.

“Malaperu!” ŝi raŭkis al ni. “Ĉesu stratumi kaj iru hejmen!”

Poste ŝi turnis sin al la ŝoforo.

“Kaj vi, koko de diablo, lasu la lerneajn knabinejojn, se vi volas plu konservi la fikilon!”

Refoje Consuelo ridis, kaj ni paŝis ĝis Wendy kaj Marisol.

“Konfesu ke ĉi tio superas gapadi al senvaloraĵoj en butikfenestroj!” ŝi diris.

“Mi neniam revenos ĉi tien”, diris Wendy. “Li sendube pensis, ke ni estas tiaj.”

“Certe. Putinoj en lerneja uniformo, ĉu ne? Vi estas tro infaneca, Wendy. Li nur ŝercis, komprenu.”

Mi turnis min por rigardi. La dika putino plu staris parolante kun la ŝoforo.

“La maldikulino ŝajnas tre juna”, mi diris. “Ŝi eble estas filino de tiu, kiu koleris.”

“Ŝi ne povas”, diris Wendy. “Kiu volus edziĝi al putino?”

Nun Consuelo ridis triafoje, pli laŭte ol antaŭe.

“Kiom vi aĝas, Wendy? Ĉu vi pensas ke nur edzinoj povas havi bebon?”

“Ne, kompreneble ne. Sed ĉu tiuj vere havas infanojn? Imagu, se via propra panjo estus tia!”

Nun la liveraŭto ekiris. Mi rigardis malantaŭen. Restis nur du putinoj en la sunbrilo apud la trafikcirklo, unu dika kaj unu maldika.

“Mi ne komprenas, kial li preferis la dikulinon”, mi diris.

“Komprenu, Lorena, ke iuj viroj ŝatas grason”, diris Consuelo. “Aŭ eble li prenis ŝin ĉar ŝi kostas malpli.”

“Kiel vi povas scii?” mi diris.

Nun ŝi nur ridetis.

“Mi scias ĉion sciindan. Mia granda fratino Carmen jam havis amason da uloj. Mi vidis ili umi. Pli-malpli, ĉiuokaze.”

“Ĉesu!” diris Wendy. “Vi naŭzas min!”

Mi ŝatus demandi ŝin pli multe pri tiuj aferoj, sed mi ne volis, kiam la aliaj ĉeestas. Mi ne estis certa, precipe pri Wendy. Eble ŝi povus klaĉi al la monaĥinoj.

Surbuse hejmen al Santa Teresa, Consuelo ripetadis, kion diris la dika putino al la viro en la liveraŭto. Tio estas, ne laŭte, sed flustre en mian orelon. Unue ŝi kvazaŭ okulmontris al iu knabo en la buso, kaj poste ŝi flustris, ke tiu koko de diablo perdos la fikilon. Mi ridis tiel, ke mi preskaŭ pisetis, kaj Wendy klopodis ŝajnigi, ke ŝi ne konas nin.

Tiun printempon ni promenis dekfoje aŭ pli laŭ Calle Zacamil por rigardi la putinojn, dum la posttagmezoj iĝis pli kaj pli varmegaj kaj polvoplenaj sur la longa strato. Iufoje staris tie

nur unu, alifoje tri aŭ kvar. Okazis eĉ ne unufoje, ke staris neniŭ. Se la plej kolerema ĉeestis, ŝi gestis minace al ni kaj kriis, ke ni iru hejmen. La aliaj putinoj ŝajne ne zorgis pri ni, nek eĉ rigardis al ni. La juna maldikulino nur iufoje ĉeestis.

Paŝante tie mi ŝvitis en mia lerneja uniformo, kaj la ĝisgenuaj ŝtrumpoj jukigis al mi la krurojn. La putinoj havis ŝuojn kun altaj kalkanumoj, jupojn, kiuj apenaŭ kovris la kalsonetojn, se entute ili surhavis kalsonetojn, kaj striktajn bluzetojn. Pli malfrue printempe ili tenis ombrelojn kontraŭ la suno. La grasaj ventroj falte ondis, kaj la femuroj tremis. Nu, mi pensas, ke ili tremis, sed vere mi ne vidis tre detale de trans la vasta strato.

“Mi dezirus, ke ni povus surhavi tian veston”, mi diris iutage.

“Fi, vi estas freneza”, diris Wendy kun supereca mieno. “Nur malbonaj virinoj tiel montras ĉion. Ili estas malpuraj.”

“Mi pensas ke ne. Cetere multaj en la televido estas vestitaj tiel. Kantistinoj. Ili sendube estas same puraj kiel vi. Aŭ eĉ pli.”

“Mi ne pensis tiel”, ŝi diris. “Ili estas malpuraj en alia maniero.”

“Vi volas diri pekaj, ĉu ne”, diris Consuelo.

“Nu, naŭzas min tio, kion ili faras. Tio malpurigas ilin.”

“Hm. Vi pensas, ke la viroj malpurigas ilin, kiam ili enŝovas sian ilon”, diris Consuelo.

“Ĉesu! Mi fartas malbone, kiam vi parolas tiel.”

Consuelo nur ridis.

“Atendu ĝis vi mem komencos kun knaboj. Tiam vi komprenos.”

“Kion? Mi certe ne iĝos putino!”

Wendy kaj Marisol interkonsentis ne plu promeni kun ni laŭ Calle Zacamil. Sed tio daŭris nur unu semajnon, poste ili denove akompanis nin. Sendube ili same scivolis kiel ni, kvankam ili ŝajnigis esti pli bonaj.

Iutage policaŭto haltis ĉe la loko de la putinoj. Policisto staris apude parolante kun unu el la dikulinoj. Ŝajne sidis en la aŭto alia virino, eble la maldika putino.

Kiam la policisto ekvidis nin, li ekiris tra la strato.

“Kien vi, knabinoj?” li vokis.

“Al la aŭtobusoj. Ni iros hejmen de la lernejo”, diris Consuelo.

“Prefere elektu alian vojon.”

“Se jes, ni maltrafus la buson.”

Ŝi iris kelkajn paŝojn foren, kaj ni ceteraj postsekvis ŝin kiel ombroj. Dume la veraj ombroj lekis niajn piedojn sur la fendita pavimo.

“Kiun lernejon vi frekventas?”

Ni rigardis Consuelon. Se mi ne jam estus ŝvita, mi vere iĝus tia nun. Imagu, se la monaĥinoj eksciis ion!

“Beata María Encarnación”, diris Consuelo.

Mi ne scias, kie ŝi trovis tiun nomon.

La policisto ŝajne cerbumis pri kie situas tiu lernejo, dum ni plu malproksimiĝis de la loko.

“Mi petos ilin teni siajn lernantinojn en pli bona ordo”, li diris reirante al la aŭto. Samtempe granda benzinkamiono pasis inter ni kaj li.

Ni plu kuretis tra la polvonubo.

“Kia bonŝanco”, mi anhelis, kiam denove eblis spiri. “Sed eble li tamen iros al Santa Lucia por paroli kun la monaĥinoj.”

“Stultaĵo”, diris Consuelo. “Kiel li povus koni nian lernejon?”

“Mi ne scias. Eble li rekonis niajn uniformojn?”

Tamen ni neniam aŭdis ion ajn flanke de la monaĥinoj pri nia vojo hejmen de la lernejo. Do, post semajno ni denove komencis iri laŭ Calle Zacamil.

La lastan fojon, kiam mi promenis tie kun la knabinoj, ekfalis pluvego, kaj ni trovis ŝirmon sub la tegmenteto de la tortiljokiosko. Consuelo klopodis inciti la vendoknabon, sed li paŭtis.

“Por stari ĉi tie vi devas aĉeti ion.”

Liaj stufitaj tortiljoj ŝajnis same polvoplenaj kiel kutime, do ni aĉetis kolaon, kiun ni dividis, kvankam ni samefike povus malfermi la buŝon kun la vizaĝo turnita supren en la pluvo.

Kiam ĉesis la pluvo kaj ni ekiris antaŭen, blanka Mondeo preteriris sur la strato. Ĝuste dironte, ke ĝi estas sama kiel la nia, mi ekvidis la numerplaton. Mi preskaŭ ekkriis, sed iel mi ekhavis strangan senton, do mi silentis.

Ni pluiris antaŭen, kvankam mi klopodis kiel eble plej malrapidi.

“Rapidu, Lorena”, diris Marisol. “Mi ne volas refoje maltrafi la buson pro vi.”

Okazis tiel, ke kelkajn semajnojn pli frue ŝi ne atingis sian buson ĝustatempe, do ŝia patrino devis aŭti ĝis ni en Santa Teresa por venigi ŝin.

Jam de malproksime mi vidis, ke la blanka Mondeo haltis apud la putinoj. Staris tie du dikulinoj, kaj unu el ili ŝajne diskutis kun iu en la aŭto. Poste ŝi malfermis la pordon kaj sidiĝis. La aŭto tuj ekiris, faris U-turnon kaj ekveturis kontraŭ kaj preter ni, reen al la urbocentro. Mi ne kontrolis, kiu sidas ĉe la stirilo. Mi turnis la kapon maldekstren al ruboplena dezerta parcelo apud la strato, sed la cetera triopo kompreneble gapis al la aŭto.

“Viraĉo en kompleto”, diris Consuelo. “Hejme li certe havas edzinon kaj infanojn. Mi demandas min kiel aspektas la edzino, ĉar li trovas tiun simion pli seksalloga.”

Ŝi jam plurfoje vizitis min hejme kaj renkontis Panjon kaj mian fraton. Sed tiam Paĉjo ne estis hejme. Ĉiuokaze mi ne povis memori, ke li estis.

“Viroj estas naŭzaj”, diris Wendy.

Marisol ŝajne konsentis, kaj Consuelo ridetis kiel kutime, kvazaŭ sciante pli bone.

“Tamen knaboj estas allogaj, ĉu ne?”

“Ne, ankaŭ ili estas naŭzaj.”

“Nur atendu du jarojn”, diris Consuelo. “Tiam ankaŭ vi sopiros je knaboj.”

Mi diris nenion. Ni plupaŝis tra la polvo al niaj busoj kiel kutime.

Ankaŭ hejme ĉio estis kiel kutime. Paĉjo forestis por kromlabori, Panjo admonis min pri hejmtaskoj kaj Toño mokadis min. Kiam alvenis la semajnfino, mi volis nek restadi hejme, nek renkontiĝi kun Consuelo kaj Wendy, do mi petis permeson viziti la avinon kaj avon.

En la sekva semajno mi iris kun Wendy kaj Marisol postlerneje laŭ Avenida Lincoln. Consuelo paŭtis dum kelkaj tagoj. Poste ŝi ekhavis novan ideon.

“La Evangelia liceo por knaboj trejnas naĝadon en la banejo de Delgado. Ni povos iri rigardi, kiam ili plongas kaj naĝas.”

Do, dum la restanta parto de la printempa semestro ni postlerneje iris la vojon preter tiu banejo. Eblis stari ĉe la barilo rigardante la junulojn en banŝortoj. Ĉiufoje kelkaj el ili stulte pozis vidante nin, ĝis ilia instruisto riproĉis ilin. Marisol maltrafis sian buson trifoje antaŭ la someraj ferioj. Ŝi eĉ demandis min ĉu ŝi povus dormi ĉe ni anstataŭ esti venigita hejmen de sia panjo.

“Mi ŝatus tion, sed bedaŭrinde tio ne eblas”, mi diris. “Mia paĉjo volas nur la familion ĉirkaŭ si, kiam li venas hejmen de sia laboro.”

*La supra novelo estis unue publikigita en La Ondo de Esperanto n-ro 12, 2014.*

## Ne-PIV-aj vortoj:

|              |                           |   |
|--------------|---------------------------|---|
| abrakadabro  | AC CM FD HV RR SSz        | galimatio, sensencaĵo   |
| kiki         | AC BL EDK EV FD HV KP War | piedbati (laŭ <sup>NPIV</sup> nur = ŝoti)                                     |
| Mikeno       | <sup>V Z</sup>            | (= Miceno <sup>NPIV</sup> ) Prahelena urbo kaj kulturo ĉirkaŭ 1600-1050 a.Kr. |
| Narvo        |                           | Estonia urbo ĉe la Rusia limo   |
| Nordlando    | EDK SE                    | Norrland, norda parto de Svedio   |
| pengo        | HL IGB MG OJ TF V         | (hungare <i>pengő</i> ) hungara monunuo inter 1927 kaj 1946                   |
| rakio        |                           | Kreta vinfeĉa brando  |
| SWOT-analizo |                           | identigado de fortoj, malfortoj, oportunoj kaj danĝeroj en organizaĵo         |
| Viŝeu        |                           | (rumane <i>Vișeu</i> ) flankrivero de Tiso                                    |

## Fontoj:

- AC André Cherpillod: NePIVaj vortoj, 1988  
BL [www.bonalingvo.org](http://www.bonalingvo.org)  
CM Carlo Minnaja: Vocabolario italiano-esperanto, 1996.  
EDK Erich-Dieter Krause: Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch, 1999  
EV Ebbe Vilborg: Ordbok Svenska-Esperanto, 1992  
FD Fernando de Diego: Gran Diccionario Español-Esperanto, 2003.  
HL Hajpin Li: Esperanto-Korea Vortaro, 1983  
HV Henri Vatré: Neologisma glosaro, 1989  
IGB I. G. Braga: Esperanto-Portugala Vortaro  
KP Karolo Piĉ: La Litomiŝla tombejo  
MG Marinko Gjivoje: Esperanto-Serbokroata Vortaro, 1958  
NPIV Nova Plena Ilustrita Vortaro, 2002, sed ne en <sup>PIV</sup> 1981  
OJ Okamoto Joŝicugu: Nova Esperanto-Japana Vortaro, 1963  
RR Reto Rossetti: El la maniko, 1955  
SE Stellan Engholm: Homoj sur la tero, 1931  
SSz Uzita de Sándor Szathmári  
TF Tudela-Flores: Esperanto-Hispana Vortaro, 1959  
V Vikipedio  
War Uzita de Gaston Waringhien  
Z Zamenhofa